

LA INTERNACIA LINGVO

FAKTOJ PRI ESPERANTO

**Esperanto kiel solvo de la problemo
de internacia lingvo.**

**La Esperanto-organizaĵoj, iliaj
celoj kaj laboro.**

U.E.A. : historio kaj laboro.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
HERONSGATE, RICKMANSWORTH, ANGLUJO

LA INTERNACIA LINGVO

LA INTERNACIA LINGVO

(FAKTOJ PRI ESPERANTO)

Redaktita originale en Esperanto
de

D-ro Ivo Lapenna

Eksprofesoro en la Universitato de Zagreb
Honorofica Direktoro de CED

1954

Universala Esperanto-Asocio

Centro de Esploro kaj
Dokumentado
Londono

Reprodukto, ekstrakto aŭ traduko en
kiun ajn lingvon nur kun la permeso de
Universala Esperanto-Asocio (Centro de Esploro kaj
Dokumentado)

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

Elektronika eldono 2001 kun permeso de
Birthe Lapenna

www.kehlet.com

Copyright

Made and printed in Great Britain

ENHAVO

	Paĝo
ANTAŬPAROLO	9
ENKONDUKAJ VORTOJ	11

UNUA PARTO

ESPERANTO KIEL SOLVO DE LA PROBLEMO DE INTERNACIA LINGVO

I

FORMIĜO, EKESTO KAJ EVOLUO DE ESPERANTO	17
A. Faktoroj influantaj la lingvoevoluan	18
1. Diferencigaj faktoroj	18
2. Unuecigaj faktoroj	21
B. Formiĝo de Esperanto	25
C. Strukturo de Esperanto	28
D. Evoluo de Esperanto	32

II

OPINIOJ PRI LA VALORO KAJ SIGNIFO DE ESPERANTO	38
--	----

III

INSTRUADO DE ESPERANTO	44
A. Ŝlosiloj	45
B. Lernolibroj	45
C. Instrumetodoj	46
D. Kursoj	48
E. Lernejoj kaj universitatoj en kiuj oni instruas Esperanton	49

IV

LA ESPERANTA LITERATURO	52
A. Originala literaturo	52
1. Gazetoj	52
2. Apartaj originalaj verkoj	53
3. Originala poezio	58
B. Traduka literaturo	62
1. Antologioj	62
2. Tradukoj el aliaj lingvoj	67

V

SCIENCA, FAKA KAJ POPULARSCIENCA LITERATURO	79
A. La lingva problemo en la scienco	79
B. La valoro de Esperanto por la scienco	80
C. Praktika aplikado	84
1. Tradukitaj verkoj	84
2. Originalaj verkoj	86

VI

FAKAJ VORTAROJ KAJ TERMINAROJ	89
-------------------------------	----

VII

GAZETARO	94
----------	----

VIII

DIVERSAJ FORMOJ DE PRAKTIKA APLIKADO DE ESPERANTO	100
A. Esperanto en komerco	100
B. Esperanto en turismo	102
C. Esperanto en radio	104
D. Esperanto en poŝto, telegrafo, telefono	105
E. Esperanto en sonfilmo	107
F. Prelegvojaĝoj, privataj vojaĝoj, korespondado	108

Paĝo

IX

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEJO EN WIEN	III
A. Historio de IEMW	III
B. Celo	II4

DUA PARTO

ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ, ILIAJ CELOJ KAJ LABORO

X

ORGANIZAĴOJ POR DISVASTIGO DE ESPERANTO	II9
A. Landaj Asocioj aliĝintaj al UEA	II0
B. Landaj Asocioj nealiĝintaj al UEA	II1

XI

ORGANIZAĴOJ POR PRAKTIKA UTILIGO DE ESPERANTO	II4
A. Fakaj organizaĵoj	II4
B. Aliaj specialaj organizaĵoj	II6

TRIA PARTO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

XII

HISTORIO DE UEA	II3I
-----------------	------

XIII

LA NUNA ORGANIZA FORMO DE UEA	II40
A. Celo kaj fundamentaj principoj	II40
B. Konsisto (Membreco)	II4I
C. Organoj	II42
D. Centroj	II44

XIV

KULTURA AGADO DE UEA	146
A. Internacia Somera Universitato	146
B. Belartaj konkursoj	149
C. Oratoraj konkursoj	150

XV

PRAKTIKAJ SERVOJ DE UEA	152
A. Delegita reto	152
B. Koresponda Servo kaj Gazetara Servo	155
C. Helpo de UEA dum la militoj	156
D. Atingoj de UEA ĉe la Ligo de Nacioj, UNO kaj UNESKO	160

XVI

ALIAJ AKTIVECOJ DE UEA POR INTERFRATIGO DE LA POPOLOJ	166
A. Universalaj kongresoj	166
1. Organizo	166
2. Nombro	169
3. Gravaj deklarioj	169
4. Signifo	170
B. Internaciaj konferencoj, kursoj, renkontiĝoj	171
C. Disvastigo de humanecaj ideoj	172

XVII

KONKLUDO	174
BIBLIOGRAFIO KAJ DOKUMENTOJ	176
INDEKSO	179

ANTAŬPAROLO

En januaro 1954 la Norvega parlamentano S-ro Carl Henry prezentis proponon al la Norvega Nobel-Komitato, ke Universala Esperanto-Asocio ricevu la premion por la Paco.

La ideo kandidatigi UEA por tiu nobla premio maturiĝis jam en la jaro 1952, sed la propono ne povis esti farita antaŭ ol estis kolektitaj ĉiuj faktoj pri UEA. Sekve la Estraro komisiis al sia membro Prof. Ivo Lapenna, Honorofica Direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kolekti la necesan materialon kaj redakti la dokumentaron. Dum la laboro montriĝis necese pritrakti la bazon mem de la interlingva problemo aldone al la historio kaj la nuna stato de la Esperanto-Movado kaj de UEA aparte.

Kiam la dokumentaro estis preta, la Estraro trovis ĝin tiel abunda kaj tiel valora por la tutmonda esperantistaro, ke estis decidite aperigi ĝin en formo de libro. Eluzante kiel bazon la jam kolektitan materialon Prof. Lapenna verkis plurajn aldonajn partojn kaj finpretigis tiun ĉi publikaĵon. Mi forte esperas, ke la esperantistoj ofte ĉerpos el tiu ĉi fonto de argumentoj.

Fine mi deziras esprimi sinceran dankon de UEA al Prof. Lapenna pro la granda laboro, kies rezulto estas tiu ĉi laŭorde aranĝita, science objektiva verko.

E. MALMGREN,
Prezidanto de UEA.

Nuda paĝo por teni la vicordon de
la originaj paĝoj

ENKONDUKAJ VORTOJ

Tiu ĉi verko—la unua, kiun en formo de libro eldonas la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) de Universala Esperanto-Asocio—havas duoblan taskon:

Antaŭ ĉio ĝi celas prezenti al la Esperantistaro, precipe al la pli junaj generacioj, en la plej konciza maniero almenaŭ la ĉefajn rezultojn atingitajn en la Internacia Lingvo kaj pere de ĝi en ĝia 66-jara ekzistado. Multaj el la faktoj estas ĝenerale konataj. Pri aliaj scias nur limigita nombro da personoj. Kelkaj tute ne estis publikigitaj ĝis nun. La ĉefa celo de la verko nepre postulis, ke oni prenu en konsideron ĉiujn tri kategoriojn. Tiamaniere la libro donas tutecan bildon pri la vere impona laboro jam farita kaj senĉese farata sur la kampo de la Internacia Lingvo. Estus dezirinde, ke ĉiu Esperantisto en la mondo ne nur atente tralegu ĉiun unuopan paĝon, eĉ ĉiun linion, sed ankaŭ plej serioze pripensu kiom da laboro, kiom da energio kaj tempo estis necesaj por krei tiun grandiozan tuthoman konstruaĵon de edukado, kulturo kaj praktikaj servoj. CED esperas, ke ĉiu leganto ĉerpos el tiu studo novan fidon je la grandaj valoroj de Esperanto kaj ricevos pli profundan konvinkon ne nur pri la jam realigita estanteco, sed ankaŭ pri la absolute certigita estonteco de la Internacia Lingvo.

La dua, same grava, celo estas doni en la manojn de la Esperantistaro novan batalilon en formo de taŭge ordigitaj faktoj. Ĉiu persono, kiu laboras sur la kampo de informado kaj ĝenerale klopodas disvastigi la lingvon, povos trovi en la libro abundan materialon por kunmeto de prelegoj, por verkado de artikoloj, por dokumentado de la afero de la Internacia Lingvo antaŭ diversaj instancoj. La verko havas tian karak-

teron, ke ĝi povas esti ankaŭ tradukita, ĉu komplete, ĉu nur parte, en la naciajn lingvojn. Ĝuste tial en ĝin eniris kelkaj punktoj (ekzemple pri la strukturo de la Internacia Lingvo), kiuj certe ne havas intereson por la Esperantistoj, sed kiuj estas tre gravaj por korekta informado de la ne-esperantista publiko. Por faciligi la eventualajn nur partajn tradukojn estis necese redakti la verkon tiel, ke ĉiu unuopa ĉapitro—kvankam logike kunligita al la aliaj—prezentu per si mem ĝis la plej alta grado kompletan tuton. Tial—ne pro manko de atentemo, sed intence—kelkfoje la sama penso estis plurloke ripetita.

CED deziras, ke la Esperantistaro larĝe utiligu la verkon ankaŭ por tiu dua celo. Ĝi, tamen, insiste petas, ke por ĉiu traduko, eĉ parta, kiu aperos en la naciaj lingvoj sub la nomo de CED, oni nepre havigu *antaŭ* la publikigo ĝian permeson.

La libro estas kompilita surbaze de verkoj, studoj, disertacioj kaj dokumentoj, menciitaj en la “Bibliografio kaj Dokumentoj” ĉe ĝia fino. La redaktinto esprimas koran dankon al ĉiuj kunlaborantoj de CED, kiuj per siaj valoraj kontribuajoj grave faciligis lian taskon. Tute specialan dankon al S-ro Reto Rossetti (Birmingham), kiu verkis la ĉ. IV pri la Esperanta Literaturo; al S-ro Hans Jakob (Genevo), kies ampleksa studo pri la historio de UEA servis kiel bazo por la verkado de la ĉ. XII; al S-ro William Auld (Glasgo), kiu ellaboris la Bibliografion pri la Esperanto-Eldonaĵoj de 1945 ĝis 1953. Apartan dankon al S-roj C. C. Goldsmith, C. D. A. Capp kaj E. P. Ockey (ĉiuj Londono) pro iliaj tre utilaj sugestoj kaj konsiloj, kiel ankaŭ al F-inoj Marianne Vermaas (Roterdamo) kaj Ethel Ford (Londono) pro ilia sindona diversflanka teknika helpo.

La financajn rimedojn por la eldono de la verko prunte kaj senprofite havigis nobla persono, kiu

deziras resti anonima. Espereble ankaŭ en la estonteco troviĝos rimedoj por la eldonoj de CED. Tamen, la rapida disvendiĝo de tiu ĉi libro havas tre grandan signifon por la plua eldona aktiveco de tiu ĉi Instituto. Ju pli baldaŭ la verko disvendiĝos, des pli baldaŭ kaj des pli facile CED povos prezenti novajn dokumentitajn publikaĵojn.

Ankoraŭ rimarketo:

La redaktinto ĉiam uzas la formon *-io* por la landnomoj. Ne estas ĉi tie la loko por ekspliki la kaŭzojn. Kiel konate, UEA uzas en ĉiuj siaj publikaĵoj la formon *-ujo* ĝis la Akademio oficialigos ankaŭ la formon *-io*. Ĉar la verko estas oficiala eldono de CED, do de institucio apartenanta al UEA, la redaktinto aplikis en ĝi, pro emo al disciplino interne de la Asocio, la formon *-ujo*. Ŝajnan escepton faras nur la vorto Jugoslavio. Por tiu lando, fakte, estas neeble diri Jugoslavujo, ĉar ne ekzistas “jugoslava” popolo, sed ekzistas pluraj diversaj popoloj (Kroatoj, Serboj, Slovenoj, Makedonoj, Montenegranoj kaj aliaj), kiuj vivas sur la teritorio de Jugoslavio. La radiko, do, estas *Jugoslavi-* kaj ĝi ne povas indiki la popolon (kiu ne ekzistas), sed nur la landon.

Publikigante tiun ĉi unuan sian verkon en formo de libro, CED varme deziras, ke la Esperantista publiko akceptu ĝin kun same tiom da amo, kun kiom da bona volo la kunlaborantoj kaj la redaktinto ĝin transdonas. CED, plue, esprimas la esperon, ke en la estonteco ĝi ricevos ankoraŭ pli fortan moralan apogon kaj ankoraŭ pli grandan financon helpon, tiel ke ĝi povos sen malfacilaĵoj plene disvolvi sian aktivecon por la realigo de ĉiuj celoj, por kiuj ĝi estas fondita kaj kiuj respondas al la esencaj taskoj de la Esperanto-Movado.

En Londono, la 2-an de Januaro 1954.

I. L.

Nuda paĝo por teni la vicordon de
la originaj paĝoj

Unua Parto

**ESPERANTO KIEL SOLVO DE LA
PROBLEMO DE INTERNACIA
LINGVO**

Nuda paĝo por teni la vicordon de
la originaj paĝoj

I

LA FORMIĜO, EKESTO KAJ EVOLUO DE ESPERANTO

LA lingvo estas socia fenomeno kaj ne ia “natura” aŭ “biologia” aĉeraĵo. Tio signifas, ke ĝi povis ekesti, ke ĝi evoluis kaj evoluas ekskluzive en la kadro de la homa socio. La lingvo, do, estas regata de sociologiaj kaj ne de biologiaj leĝoj. Tio ankaŭ signifas, ke la portanto de la lingvo ĉiam estis kaj estas ia homgrupo. Sed tio tute ne signifas, ke tiu portanto estas aŭ devas esti nur la nacio. Ekzistas eĉ hodiaŭ personoj, kiuj emfazas pri la “nacia animo” aŭ pri la “nacia spirito” kiel pri la solaj kreofortoj de la lingvo. Tia erara aserto devas nepre konduki al eraraj konkludoj. Tiele fakte ankaŭ okazas. Malgraŭ la evidentaj faktoj oni ne malofte asertas, ke la Internacia Lingvo estas neebbla, ĉar, ja, ne ekzistas ia “internacia nacio” kun “internacia animo”!

Estante socia fenomeno, la lingvo havas siajn radikojn en la socio, sed samtempe, foje formiĝinte, ĝi mem influas sian propran bazon, do tiun saman socian grupon, kiu ĝin kreis. Tiamaniere la lingvo, same kiel ĉiu alia socia fenomeno, troviĝas en rilato de reciproka funkcio kun la homa socio.

Tiu ĉi fakto havas unuarangan signifon por la ĝusta kompreno ne nur de la esenco mem de la lingvo, sed ankaŭ por la rolo kiun ĝi ludas en la socio. La lingvo estas, unuflanke, subigata al influo de certaj faktoroj (kiuj—cetere—en pli aŭ malpli alta grado ludas sian rolon ankaŭ koncerne ĉiujn aliajn sociajn fenomenojn), sed, aliflanke, ĝi mem fariĝas unu el la faktoroj, eĉ tre grava, kiuj aktive influas la evoluon de la socio.

Kiel ĉiuj lingvoj, ankaŭ la Internacia Lingvo estas

socia fenomeno kaj ĝi estas regata principe de la samaj leĝoj. Ĝuste tial, por pli reliefe prezenti ĝian formiĝon, ekestos kaj evoluon, estas necese priskribi almenaŭ tre koncize la faktorojn kiuj influas la lingvon ĝenerale.

A. Faktoroj influantaj la lingvoevoluan

En la lingvo estas klare rimarkeblaj du kontraŭaj tendencoj: la tendenco al disfalo kaj la tendenco al unueco. Ili estas nenio alia ol manifestiĝo de du antagonismaj kategorioj de faktoroj, kiuj seninterrompe—sed ne kun la sama efiko en ĉiu epoko kaj en ĉiu medio—influas la lingvon. Al la unua kategorio apartenas pluraj diferencigaj faktoroj, kiuj efikas rompe, disige, disfale. La dua kategorio konsistas el unuecigaj faktoroj, kiuj efikas kuntene, maldisige, do unuecige.

(1.) Diferencigaj faktoroj

La ĉefaj diferencigaj faktoroj estas:

(a) *Geografia faktoro.* Klimato, altaj montoj, grandaj maroj, larĝaj riveroj, netrapaseblaj marĉoj, densaj arbaroj, senvivaj dezertoj sendube disigas la homgrupojn unu de la alia, precipe en la primitivaj stadioj de la evoluo. Tial ĉiu homgrupo ne nur kreas al si apartan lingvon, sed la lingvoj ankaŭ restas sen reciproka kontakto. Tio kompreneble malebligas la proksimiĝon de la lingvoj kaj favoras la disfalon de komuna lingvo, kiam, pro kiu ajn kaŭzo, parto de la homoj, apartenintaj al la sama lingva komunaro, disiĝas de tiu grupo kaj ekloĝas aliloke.

La geografia faktoro ludas tre gravan rolon sur la plej malaltaj ŝtupoj de la civilizo, sed eĉ hodiaŭ ĝi ne perdis ĉian signifon. La homgrupoj, kiuj vivas izolate unuj de la aliaj, sen ia ajn kontakto aŭ kun nur tre malmulte da reciprokaj rilatoj, havas apartajn lingvojn, kiuj ne estas komprenataj ekster iliaj respektivaj

medioj. Estas konate, ke la Sudamerikaj indiĝenoj posedas grandegan nombron da lingvoj, kiuj ege diferencas unu de la alia. Centoj da Sudamerikaj lingvoj—diras la fama Meillet en sia verko *Linguistique Historique et Linguistique Générale*—ne proksimiĝis unu al la alia, ĉar la plej granda parto de la kontinento estas maldense loĝata.

Viglan priskribon de la multnombraj lingvoj en Suda Ameriko en la 17-a jarcento donis G. Sagard en sia libro *Granda Vojaĝo en la lando de Huranoj*. Li asertis, ke en la regionoj vizititaj de li, tre malofte du vilaĝoj parolis la saman lingvon. En Birmo oni trovas la saman situacion. Kvankam la Birma literatura lingvo estas ĝenerale uzata kiel komunikilo en Birmo, tamen la grandaj montoĉenoj de la duoninsulo Irawadi izolis plurajn sendependajn tribojn, kiuj parolas siajn proprajn lingvojn. Oni povus citi ankoraŭ multajn tiajn ekzemplojn, el kiuj vidiĝus la granda diferenciga rolo de la geografia faktoro precipe en la primitivaj stadioj de la lingvo.

(b) *Ekonomie-sociaj faktoroj*. Oni povas distingi plurajn faktorojn apartenantajn al tiu ĉi grupo. Jen la plej gravaj:

(i) *Kasta aŭ klasa faktoro*. Ĉiu akra ekonomia diferencigo signifas samtempe ankaŭ socian diferencigon, kaj tio nepre rezultigas lingvan diferencigon. Se la diversaj klasoj estas tre dividitaj unu de la alia, ankaŭ iliaj lingvaj apartaĵoj manifestas gravajn diferencojn. Male, se la klasoj havas pli viglajn reciprokajn kontaktojn, iliaj lingvoj montras malpli da diferencoj.

La kasta socio de antikva Hindujo prezentas tipan ekzemplon de preskaŭ kompleta kasta izoliteco. Tial en Hindujo devis formiĝi tute aparta komuna lingvo por la superaj kasto de Bramanoj kaj nobelaro. Tiu lingvo estis la Sanskrito. La popola amaso, kiu troviĝis ekster la kasto, parolis diversajn praktikajn dialektojn.

Similan fenomenon oni rimarkas en la feŭda meze-poka Eŭropo. La latina estis en tiu epoko la lingvo de la regantaj superaj rondoj, dum la servutulaj popolamasoj parolis la plej diversajn lingvojn kaj dialektojn.

En la moderna epoko, pro la fakto, ke la diversaj socitavoloj estas malpli izolitaj unu de la alia, kiel ankaŭ pro la influo kaj ĉiam pli granda signifo de la unuecigaj faktoroj, la klasa faktoro ne plu ludas tian rolon, ke ĝi povus krei tute apartajn lingvojn. Tamen, la diversaj socitavoloj havas ofte la tendencon amasiĝi en apartaj kvartaloj, tiel ke ankaŭ el teritoria vidpunkto ili estas dividitaj. La rilatoj inter ili fariĝas en tiuj okazoj nur eksteraj. Tio estas precipe rimarkebla en la grandaj urbegoj. La konsekvenco estas, ke ankaŭ la lingvoj de tiuj grupoj sufiĉe diferencas. Observante la lingvon de la burĝaro kaj tiun de la laboristaro en Londono, en Parizo aŭ en kiu ajn alia granda urbo, oni facile povas rimarki, ke la distanco inter ili estas nek malgranda nek sensignifa.

(ii) *Profesia faktoro*. La divido de la laboro kaj, kiel ĝia rezulto, la ekesto de profesioj kaŭzis la kreigon de apartaj, profesiaj aŭ teknikaj lingvoj. Kie ajn ekzistas divido de la laboro, devas ekzisti ankaŭ divido de la lingvo. Ĉiu profesio havas siajn proprajn terminojn, kiuj plej ofte ne estas konataj ekster ĝi. Ju pli la homaro evoluas, ju pli la diversaj fakoj specialiĝas, ju pli la unuopulo dediĉas sian fizikan kaj spiritan aktivecon al sia fako, des pli specialiĝas ankaŭ la koncernaj fakaj lingvoj.

La tuta vortprovizo de la plej evoluintaj lingvoj atingas hodiaŭ plurajn centmilojn da esprimoj. El tiuj esprimoj, nur treege malgranda nombro estas komuna al ĉiuj uzantoj de la koncerna lingvo. Eĉ en Anglujo, do en lando kun tre alte evoluintaj kulturo kaj civilizo, la kamparano kelkloke ne konis pli ol 300-400 vortojn ankoraŭ en la pasinta jarcento, laŭ

la enketo kiun tiam faris la fama lingvisto M. Müller. La hodiaŭa stato certe estas pli bona, sed eĉ hodiaŭ oni ne multe eraras, se oni taksos tiun komunan vortprovizon je ĉirkaŭ 500 vortoj. La kleraj homoj uzas meze ĉ. 3000–4000 vortojn. Nur grandaj pensuloj kaj verkistoj posedis meze 10000 vortojn. Tiel, ekzemple, Shakespeare uzis en ĉiuj siaj verkoj 14500 vortojn, dum la tuta Malnova Testamento estas skribita per 5642 vortoj. Oni povas fakte diri, ke la grandega parto de la vortprovizo de ĉiu unuopa lingvo apartenas al fakaj, profesiaj, teknikaj esprimoj. Tien ĉi oni devas ankaŭ enkalkuli la lingvan materialon, ekestintan surbaze de diversaj akcesoraj homaj aktivecoj, kiaj la sporto, ĉasado, vojaĝado k.t.p.

(iii) *Religia faktoro*. Estas ĝenerale konate, ke preskaŭ ĉiuj religioj uzas apartajn lingvojn por siaj ritoj. La katolika eklezio uzas la latinan lingvon. La ortodoksa aplikas la malnovan slavan. La ritoj de la greka eklezio estas farataj en la antikva greka lingvo. La mahometana religia komunajo uzas la araban literaturan lingvon. . . . Ankaŭ aliaj religioj havas apartajn lingvojn. La religiaj ritoj—diras la granda lingvisto A. Meillet—destinitaj transporti la homon en mondon apartigitan, en mondon sanktecan, postulas lingvon same tiel apartan, lingvon konsekran.

Kiel diferencigajn faktorojn oni povas konsideri ankaŭ aliajn, ekzemple la transdonadon de la lingvo al la novaj generacioj fare de la malnovaj, la politikajn malhelpojn al interregiona aŭ internacia komunikado k.t.p.

(2.) Unuecigaj faktoroj

Multnombraj estas la elementoj, kiuj efektivas tute inversan efikon sur la lingvoevoluo. La unuecigaj faktoroj estas divideblaj je tri ĉefaj grupoj: ekonomiaj-sociaj, teknikaj kaj klerigaj.

(a) *Ekonomiaj-sociaj faktoroj.* La tuta historio de la homaro estas esence historio de celado al superaj, pli larĝaj formoj de kunvivado. Tiu vojo kondukis la homaron de la primitiva hordo, tra la tribo, tra la gento, ĝis la hodiaŭaj nacioj kaj nun ĝia celo estas la estonta unueca homaro.

Sur tiu vojo al la supro, pluraj gravaj elementoj manifestadis ĉiam pli sian unuecigan influon. Jen la ĉefaj:

(i) *Divido de la laboro.* La transpaso al pli progresaj produktosistemoj ebligis la kreon de pli ampleksaj sociaj unuoj kun pli evoluinta divido de la laboro kaj, sekve, kun pli vastaj interŝanĝoj ne nur materiaj, sed ankaŭ spiritaj. Tiamaniere, la divido de la laboro, kiu, unufanke, prezentiĝas kiel diferenca faktoro en senco por tiel diri vertikala (formiĝo de profesiaj lingvoj en la kadroj de la sama lingva komunado), aliflanke interdependigas ekonomie la homojn sur larĝaj teritorioj kaj, sekve, montriĝas kiel potenca unueca faktoro en senco horizontala. Ju pli dividita estas la laboro, ju pli specialiĝas la aktiveco de unuopulo, des pli dependa li fariĝas de la aliula laboro. La interŝanĝoj devas multobliĝi space kaj ampleksiĝi teritorie. Hodiaŭ ili transpasas la limojn de unuopaj nacioj kaj etendiĝas sur la tuta terglobo. Ĉiuj artaj provoj haltigi tiun normalan ekonomian kaj socian evoluprocezon per rimedoj aŭtarkiaj, fiaskis kaj devos fiaski komplete ankaŭ en la estonteco.

Ĝuste tiu interdependeco montriĝas kiel potenca unueca faktoro ankaŭ sur la lingva kampo. Ĝi troviĝas en la fundamentoj mem, sur kiuj elkreskis kaj la grandaj unuecaj literaturaj naciaj lingvoj kaj, poste, la Internacia Lingvo Esperanto.

(ii) *Priegalecaj ideoj.* La progresado en la materia vivo de la socio estis akompanata de progresado sur kampo spirita. Apartan signifon havas la ideo pri la

egaleco de la homoj, kiu ricevas ĉiam pli larĝan kaj pli profundan enhavon. La konscio pri la esenca egaleco de la homa naturo, super ĉiuj akcesoraj diferencoj, traboris kaj traboras al si la vojon tre malrapide, sed sendube, ankaŭ sur tiu ĉi kampo, oni marŝas antaŭen. La akcepto de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj estas klara simptomo de tiu fakto.

La egaligado de la kulturo kaj civilizo en la tuta mondo (kio, kompreneble, ne signifas ilian unuformiĝon), la demokratigado de la publika vivo kaj de la politikaj institucioj—ĉio ĉi ebligas pli viglajn kontaktojn inter la homoj, ĉio ĉi respeguliĝas en la proksimiĝo de la lingvoj.

(b) *Teknikaj faktoroj.* La evoluo de plej diversaj trafikiloj kaj komunikiloj ebligis grandskalajn kaj ĉiaspecajn kontaktojn ne nur en naciaj kadroj, sed ankaŭ en la internacia. Ŝipoj, fervojoj, aviadiloj, aŭtomobiloj, aŭtobusoj, telegrafo, telefono, radio, televido estas teknikaj rimedoj de rilatado, sed samtempe—ĝuste tial—potencaj fortoj de lingvoproksimiĝo. Per ili veturas kaj flugas de regiono al regiono, de lando al lando ne nur varoj, ne nur homoj, sed ankaŭ vortoj. Samtempe, pro la sama kaŭzo, ankaŭ la esprimmaniero egaligas. Tio, sendube, firmigas la kuntenon de la naciaj literaturaj lingvoj, sed ĝi samtempe plirapidigas la tendencon al unuiĝo de la lingvoj ĝenerale, tendencon, kies esprimo estas la Internacia Lingvo.

(c) *Klerigaj faktoroj.* La eltrovo de la skribo, la ekesto de la literaturo, la invento de la presmaŝino, la modernepoka ekfloro de la sciencoj, la lernejoj kaj universitatoj, la bibliotekoj kaj legejoj, la teatro kaj sonfilmo, la radio kaj televido—jen estas nur kelkaj el la multnombraj klerigaj faktoroj. Amasiĝante kaj multiĝante paralele kun la progresado sur la aliaj

kampoj, ili estas treege potencaj subtenantoj de la unueciga evolulinio de la lingvo. Miloj da instruistoj kaj profesoroj instruas dum multaj jaroj la unuecan literaturan lingvon de sia nacio al centmiloj da infanoj en la lernejoj. Ĝin la popolo ĉiutage aŭdas el radio-aparatoj, de sur la scenejoj, en kinejoj. Ĝin oni legas en gazetoj kaj en libroj. . . . Se hodiaŭ la civilizitaj popoloj havas siajn grandajn, unuecajn, komunajn lingvojn, tio estas grandparte rezulto de la klerigaj faktoroj, post kiuj troviĝas la deviga potenco de la ŝtato, tuta armeo da klerigaj soldatoj kaj konsiderindaj financaj kaj ĝenerale materiaj rimedoj. Estas kompreneble, ke en tiaj kondiĉoj ekzistas preskaŭ nenia ebleco por disfalo de la unuecaj naciaj lingvoj en dialektojn. La vojo estis kaj estas inversa. La literaturaj, do skribe fiksitaj, lingvoj ne disfalas, sed, male, la dialektoj perdiĝas aŭ fariĝas tute sensignifaj.

* * * * *

Ĉiuj ĉi unuecigaj kaj diferencigaj faktoroj, tuŝitaj nur tre ĝenerale, agas samtempe, interplektiĝas, helpas sin reciproke aŭ kontraŭstaras unu la alian. Sed, se oni ĵetas nur rapidan rigardon al la traktata fenomeno, oni tuj rimarkas, ke *kun la ĝenerala progresado de la homaro la unuecigaj faktoroj amasiĝas kaj fariĝas ĉiam pli gravaj, dum la diferencigaj ludas ĉiam pli modestan rolon.*

Por korekta kaj objektiva taksado de la pozicio de Esperanto en la kadroj de tiu ĉi ĝenerala lingvoevoluo, la konstatita fakto havas unuarangan signifon.

Kiel ĉiu alia lingvo, ankaŭ Esperanto ekestis sur difinita ŝtupo de evoluo. Kiel ĉiu alia lingvo, ankaŭ ĝi havas sian portanton en la homa socio. Estas jam akcentite, ke tute ne gravas ĉu la homgrupo, kiu estas la kreanto de la lingvo, estas nomata tiel aŭ alie. En difinitaj historiaj kondiĉoj ĝi estas hordo, en aliaj ĝi estas tribo, aŭ kasto, aŭ klaso, aŭ religia grupo, aŭ

nacio, aŭ, en apartaj kondiĉoj, grupo da homoj sentantaj efektive sian apartenon al la homaro kaj komprenantaj, ke tiu ĉi sento povas havi utilajn praktikajn konsekvencojn, unuflanke, kaj plifortiĝi, ĝi mem, aliflanke, nur per akcepto kaj praktika aplikado de neŭtrala internacia komunikilo. Gravas ĉiam la fakto, ke temas pri homa grupo. Ĝi ĉiam estis kaj estas la plej supera leĝdona instanco de la lingvo, kvankam ankaŭ individuo povas havi tre elstaran kaj signifan rolon se, kompreneble, lia lingvokrea aktiveco estas konforma al la leĝoj regantaj la lingvoevoluan.

La homgrupo, tamen, ne povas krei sian lingvon tute arbitre, plene laŭplaĉe. La lingvo estas ĝis certa grado kondiĉita de la medio kaj de ĝia tuta historia evoluo kaj koncerne sian enhavon kaj koncerne sian formon.

B. Formiĝo de Esperanto

La Internacia Lingvo povis ekesti nur en tiaj historiaj kondiĉoj kiam, unuflanke, la progreso de la internaciaj rilatoj en la plej larĝa senco de la vorto atingis tioman gradon, ke ili sentigis efektivan bezonon pri ĝi kaj kiam, aliflanke, tiu sama progresado kreis sufiĉan internacian lingvomaterialon por konstrui el ĝi vere internacian lingvon, t.e. lingvon, kiu laŭ internaj elementoj estos sintezo de la priparolita evoluprocezo sur la lingva kampo. Tion bonege kaj genie komprenis la aŭtoro de Esperanto, Doktoro L. L. Zamenhof. Sian penson li formulis en mallonga frazo: "*Por ke la lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nur nomi ĝin tia.*" Tiu granda vero estis presita sur la titolpaĝo de la unua lernolibro de Esperanto, aperinta en la jaro 1887.

Kiel konate, la ideo pri komuna lingvo estas multe pli malnova ol la Internacia Lingvo mem. Malnovaj rakontoj kaj legendoj el la antikva epoko pravas, ke

jam tiam oni sentis tie kaj tie la mankon de komuna lingvo por interpopola rilatado. Sed en tiu epoko neniuj internacia lingvo ekestis nek povis ekesti. En tiu tempo nek la bezono por ĝi povis esti tre sentebla, nek la ĝis tiam atingita evoluŝtupo estis kreinta sufiĉan internacian lingvomaterialon, el kiu povus esti formita internacia lingvo. Necesis, ke pasu multaj jarcentoj, por ke la ĝeneralaj kondiĉoj maturiĝu. Tio okazis en la nova epoko kiam, interalie, la unuecigaj faktoroj venke ekmarŝis kontraŭ la diferencigajn.

La transpaso de feŭdismo al moderna epoko—karakterizata de amasa produktado por la merkato, de ĉiam pli detala labordivido, de granda internacia komerco, de senĉese kreskantaj eblecoj de komunikado—havis pluroblan efikon sur la lingvon.

(a) “La tria klaso”—la progresema burĝaro—ĉie starigas la postulon pri kreo de unuecaj ŝtatoj, sen internaj doganlimoj, sen iaj ajn malhelpoj al komerco kaj komunikado. Detruante la feŭdan disrompitecon, ĝi sukcesas iom post iom krei unuecajn naciajn ŝtatojn. Paralele kun la formiĝo de la nacioj kaj de la naciaj ŝtatoj, formiĝas kaj plue evoluas la grandaj, komunaj naciaj literaturaj lingvoj.

(b) La mezepoka latina lingvo, kies socia portanto estis la feŭda reganta klaso, malaperas iom post iom kune kun sia portanto kaj ĝi restas nur en la uzo de la romkatolika eklezio kiel aparta religia lingvo. Tiun sorton de la latina klare antaŭvidis unu el la plej grandaj humanistoj de sia tempo, la Hispano J. L. Vives, en sia libro *De Disciplinis* (1532), en kiu li skribis: “Estus feliĉo, se ekzistus unu sola lingvo kiun povus uzi ĉiuj popoloj . . . Pereos la latina lingvo kaj tiam venos grava konfuzo en ĉiuj sciencoj, grava fremdiĝo inter la homa gento”.

(c) Pro la malapero de la latina, pro la aliflanka kreskanta internacia rilatado, sentiĝis ĉiam pli kaj pli

forta bezono por neŭtrala internacia lingvo. Estas akcentinde, ke la materiaj rilatoj, precipe interŝanĝoj de varoj, treege progresis, dum la spiritaĵoj multe postrestis ĝuste pro manko de komuna lingvo. La lernado de pluraj fremdaj naciaj lingvoj en ĉiuj lernejoj kaj universitatoj, malgraŭ la milionoj kaj milionoj da laborhoroj oferataj al tiu celo, malgraŭ la grandegaj kapitaloj elspezataj por ĝi, donis vere mizerajn rezultojn, kiujn ĉiu povas facile konstati vojaĝante de lando al lando aŭ partoprenante kiun ajn internacian kongreson, konferencon aŭ alian renkontiĝon. La manko de komuna internacia lingvo sentiĝis tiel forte, ke amasiĝis provoj ĝin krei. De la filozofoj Descartes (1629), Leibnitz (1666), Komensky (1641) dum la 17-a, 18-a, 19-a jarcentoj ĝis la plej nova tempo senĉese daŭras provoj skizi strukturajn bazojn kaj fundamentajn formojn de nova lingvo. Unu post la alia scienculoj kaj pensuloj ellaboradis projektojn de pazigrafioj (ideografiaj skriboj), de gestaj lingvoj, de filozofiaj aprioraj lingvoj, bazitaj sur sistemoj de logika klasifiko, de komunhomaj simbolaj k.t.p. La utopiisto Thomas More (1516) skizis bazojn de la estonta lingvo. Ankaŭ Fourier kaj Cabet sin okupis pri tiu problemo. Tamen, la nesufiĉaj konoj rilate al la esenco de la lingvo kaj al la vojoj de ĝia evoluo, la apartigo de la lingvo-instrumento for de la socio, for de la formoj kaj kondiĉoj de la ekzistado de tiu socio, malebligis la aperigon de praktike realigebla projekto de internacia lingvo.

En la 19-a jarcento la problemo de komuna lingvo interesis ĉiam pli vastajn tavolojn. Tio klarigas ankaŭ la akcepton de pluraj sistemoj de diversaj internaciaj signaroj, kiel la lumtura signalaro (1865), la mara signalaro (1871), la decimala klasifika sistemo por bibliotekoj k.t.p. Tio klarigas ankaŭ la kvantan kreskon de projektoj de internacia lingvo.

(d) Sendepende de tiuj pli ol 300 provoj, tute spontanee formiĝis kaj senĉese formiĝas ĉiam pli ampleksa, vere internacia lingvomaterialo. Ĝi konsistas ne nur el internacia radikaro, sed gravan ĝian parton formas ankaŭ la proksimiĝo de la esprimmaniero, kiel tion bele montris Maks Müller en sia verko *Novaj Lekcioj pri la Lingvoscienco*.

Tiele, surbaze de konstanta egaligado de la kulturo kaj civilizo, ekĝermis la fundamentoj de la Internacia Lingvo en la sino mem de la tuthomara socio. Tiusence ĝi estas kondiĉita, determinita ĝis certa grado, same kiel ĉiu ajn alia lingvo.

La genio de Doktoro Zamenhof tion bone komprenis. Tial li ellaboris sian projekton sur tiu ĉi internacia lingvomaterialo kaj ĝuste pro tio li sukcesis; lia projekto estas vera sintezo de tiu ĵus priparolita procezo de iom-post-ioma formiĝado de la Internacia Lingvo. La projekto—per akcepto kaj plua evoluigo fare de senĉese grandiĝanta homgrupo—baldaŭ transformiĝis en vivantan kaj plene funkciantan lingvon.

Esprimo ideologia de difinitaj unuecigaj tendencoj de la homa socio, la Internacia Lingvo Esperanto mem fariĝas forta instrumento de plua unuecigo. Ankaŭ tiurilate ĝia funkcio estas identa al tiu de kiu ajn alia lingvo, kaj tute speciale de la naciaj lingvoj. Se tiuj ĉi estas la plej fortaj spiritaĵoj kunteniloj de la nacioj, la Internacia Lingvo, adekvate, estas unu el la plej potencaj apogiloj kaj antaŭenigantoj de la tuthomara solidareco. Tiun sian rolon Esperanto larĝe pruvis en sia pli ol 66-jara ekzistado, kiel tio vidiĝos el aliaj partoj de tiu ĉi studo.

C. Strukturo de Esperanto

La aŭtoro de Esperanto, D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, naskiĝis en Bjalistok, kiu tiam apartenis al

Rusujo, en la jaro 1859. Lia patro estis instruisto de fremdaj lingvoj.

En letera respondo al N. Borovko, kiu estis lin demandinta pri la deveno de Esperanto, Zamenhof diris, ke li ne rememoras precize kiam ĝuste li venis al ideo pri internacia lingvo. Liaj plej frutempaj rememoroj estas ligitaj al tiu ĉi ideo. La cirkonstancoj de lia infaneco tre akcelis ĝian formiĝon. Bjalistok estis enloĝata de kvar nacioj kun kvar diversaj lingvoj: la rusa, la pola, la germana kaj la hebrea. Tiuj popoloj vivis en konstanta reciproka malamo, kiu manifestiĝis ankaŭ en batalo por sia gepatra lingvo kaj kontraŭ la lingvo de la najbaroj. Estante ankoraŭ knabo li opiniis, ke tiu ĉi situacio povus esti forigita per kreo de iu neŭtrala lingvo. En gimnazio li konvinkiĝis, ke la komplikeco de la gramatikoj de la lingvoj estas peza kaj nebezona. Tial li komencis prilabori simpligitan gramatikon.

Kompreneble, lingvo devas havi ankaŭ vortaron. La grandiozeco de la afero tre fortimigis lin ĝis kiam li komprenis, ke pere de afiksoj oni povas formi el unu radiko multajn vortojn kaj ke tio tre faciligas la laboron de la memoro. Koncerne la radikojn—Zamenhof plue klarigis en la menciita letero al Borovko—li en la unua tempo pensis, ke ili devus esti kiel eble plej mallongaj, do elpensitaj *apriora*. Baldaŭ li forĵetis tiun penson, rimarkinte, ke tiaj radikoj—vere tute artefaritaj—estus tre malfacile memoreblaj. Li rimarkis la fenomenon, kiun ni prezentis pli supre, nome, ke en la modernaj lingvoj ĉiam pli granda nombro da internaciaj radikoj estas ĝenerale uzata. Tiujn radikojn li prenis kiel bazon de sia vortaro.

Jam en la jaro 1878, estante en la lasta klaso de gimnazio, Zamenhof estis fininta la unuan projekton de la lingvo. Studante en la universitato, Zamenhof dum plenaj sep jaroj, ĝis la jaro 1885, prilaboradis

sian lingvon. Tio estis la plej malfacila periodo de lia vivo, laŭ lia propra konfeso en la letero al Borovko. Timante esti mokata aŭ konsiderata kiel frenezulo, li parolis al neniu pri siaj laboroj, sed en kaŝiteco, en soleco, li daŭre tradukadis, verkadis kaj pensadis en sia lingvo. Fine, en la jaro 1887 aperis la unua lernolibro sub la titolo *Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto*. Sian projekton li tute prave nomis “Internacia Lingvo”, ĉar ĝi fakte estis plene internacia laŭ siaj elementoj. Pro modesteco kaj ankaŭ tial, ĉar li deziris ligi kiom eble plej malmulte la lingvon al sia personeco, li ne eldonis la lernolibron sub sia nomo, sed sub la pseŭdonimo “Doktoro Esperanto”, tio estas “kiu esperas”. Poste, la lingvo mem estis ofte nomata laŭ tiu pseŭdonimo.

La eldono de la unuaj lernolibroj kaj de la unuaj literaturaj verkoj en la nova lingvo baldaŭ forglutis la plej grandan parton de la financaj rimedoj, pri kiuj disponis Doktoro Zamenhof, dum lia kuracista-okulista praktiko alportis al li nur tre modestajn enspezojn. Tiel jam en la fino de 1889 li estis en granda mizero. Tiu stato daŭris multajn jarojn, kaj nur ĉe la fino de sia vivo li sukcesis plibonigi sian financon situacion.

La gramatiko de Esperanto estas tre simpla. La alfabeto konsistas el 28 literoj, el kiuj 5 estas duonfermitaj vokaloj (kiel en la itala), kio donas al la lingvo grandan klarecon kaj belsonecon. La gramatiko konsistas el 16 mallongaj reguloj, kiujn oni povas ellerni en duonhoro. Ne ekzistas esceptoj. La akcento troviĝas sur la antaŭlasta silabo. La partoj de la parolo diferenciĝas per finaĵa vokalo: la substantivo finiĝas per -o, la adjektivoj per -a, la adverboj per -e, la verboj en infinitivo per -i. El la sama radiko oni povas formi substantivon, adjektivon, adverbon kaj verbon, se la senco tion permesas. La pluralo estas formata per aldono de la finaĵo -j al la adjektivoj kaj substantivoj.

La akuzativon oni formas per la finaĵo -n. La verboj en la konjugacio ŝanĝiĝas nur laŭ la tempoj: -as por la estanta, -is por la pasinta, -os por la estonta. La imperativo kaj konjunktivo estas formataj per la finaĵo -u kaj la kondicionalo per la finaĵo -us. La aktivaj participoj havas la finaĵojn -anta por la estanta tempo, -inta por la estinta tempo kaj -onta por la estonta. Same tiel la pasivaj participoj havas la finaĵojn -ata, -ita, -ota. Tio estas la tuta gramatiko de Esperanto. Se oni ĝin komparas kun kiu ajn alia gramatiko, oni facile vidas la geniecon de la simpleco. Sufiĉas konsideri, ke en la franca lingvo ekzistas pli ol 2300 finaĵoj nur por la verboj. En Esperanto ili estas 12 kaj ili ebligas eĉ tiajn komplikajn verboformojn, kia estas la gerundio de la pasiva modo en la estonta tempo.

La Esperanta vortaro konsistas grandparte el internaciaj radikoj. Pro la internacieco de la radikoj, la latinidaj popoloj konas ĝis 80% de la radikaro sen lerni Esperanton, dum ĉe la slavaj popoloj tiu procento estas malpli alta, sed ĝi tamen atingas proksimume 50%. Same tiel ĉe la nordaj popoloj. En Azio tiu procento estas ankoraŭ malpli granda. Sed aliflanke, en Azio la ekstereŭropa karaktero de la gramatiko de Esperanto tre faciligas la lernadon. La morfologia strukturo de Esperanto estas tre parenca al la lingvoj de Malproksima Oriento, ekzemple al la Ĉina, kaj tute speciale al la lingvoj aglutinaj, ekzemple Turkaj-tataraj. Tiu karaktero de Esperanto cetere pravas ke ĝi, estante laŭ la konsisto de la vortaro pli romandevena, samtempe laŭ sia strukturo pli similas diversajn lingvojn ekstereŭropajn. Ankaŭ en tiu senco Esperanto do estas efektive lingvo internacia.

La granda fleksebleco de Esperanto estas pruvita en pluraj eksperimentoj. Tiel ekzemple, en la jaro 1913, sub la gvido de Tristan Bernard, oni ekzamenis la flekseblecon de Esperanto en speciala komisiono.

Difinita literatura teksto estis tradukita en plurajn lingvojn, interalie ankaŭ en Esperanton, kaj poste tiu sama teksto estis retradukita de aliaj tradukantoj, nekonantaj la originalan tekston, en la lingvon de la originalo. Montriĝis, ke plej perfektaj tradukoj estis faritaj pere de Esperanto, ĉar la retradukita teksto el Esperanto estis la plej proksima al la originalo.

Konklude: Esperanto estas la Internacia Lingvo de la hodiaŭo kaj ĝuste pro sia internacieco ĝi estas facile lernebla. Ĝia belsoneco kaj fleksebleco plene kontentigas ĉiujn postulojn de ne nur logika, sed ankaŭ arta esprimado.

D. Evoluo de Esperanto

Koncerne la evoluon de Esperanto la konata Esperanta leksikologo, Prof. Emile Grosjean-Maupin, skribis artikolon en *Enciklopedio de Esperanto*, Volumo I (1934), el kiu ni ĉerpas jenajn partojn:

La koncepto pri evoluo propre apartenas al la biologiaj sciencoj, tio estas al la sciencoj, kiuj pristudas la vivantajn estaĵojn. En la ceteraj sciencoj kaj aparte en lingvistiko, la vorto *evoluo* same kiel la vortoj *organismo* aŭ *vivanta*, povas esti uzata nur metafore kaj ricevas sian ĝustan kaj precizan sencon nur kompare al sia malo *revolucio*. Dum *revolucio* estas la abrupta, rapida kaj detrua transformiĝo en ia organizaĵo, evoluo estas vico de malrapidaj iom-post-iomaj ŝanĝiĝoj, konformaj al la naturo de la objekto kaj al la vivbezonoj. . . . Ĉiuj vivantaj naciaj lingvoj evoluas, ĉar tio, kion oni nomas vivanta lingvo, estas lingvo efektive praktike uzata kaj kies normala evoluo estas certigata per interkonsento de opa sufiĉe multnombra kolektivo da uzantoj. Samo okazas pri Esperanto: “Ĝi devas, asertas Zamenhof, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estis ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj”.

Kaj la faktoj plene pravigis la koncepton de Zamenhof. La evoluo de Esperanto efektiviĝas per jenaj procedoj:

(i) Analoga kaj logika utiligo de ĉiuj eblaĵoj, kiuj estas entenitaj en la strukturo de la lingvo kaj en ĝia fleksebleco, sed kiujn oni antaŭe ne atentis. El tiu ĉi utiligo de la kaŝitaj eblaĵoj sekvas ankaŭ la forlaso de kelkaj malpermesoj, kiuj estis nuraj naciismoj, akceptitaj senkonscie dum la unuaj periodoj, sed kontraŭaj al la logiko.

(ii) Ĝenerala emo al pli mallongaj formoj, kiel *aŭto* anstataŭ *aŭtomobilo*, *fora* anst. *malproksima*, *eta* anst. *malgranda*.

(iii) Modifo de la signifo de kelkaj radikoj ĉu per plilarĝigo aŭ metaforigo ĉu per malplivastigo kaj pliprecizigo.

(iv) Sed la evoluo de Esperanto konsistas precipe en la plimultiĝo de la radikaro. En la lingvon eniris, eniras kaj plue enirados senĉese novaj radikoj, kiuj ekestis kiel rezulto de la ĝenerala evoluo de la homa socio. Aliflanke, aliaj radikoj malaktualiĝas, malnoviĝas, ne plu estas bezonataj kaj elfalas el la lingvo. Tiamaniere la lingvo ĉiam respegulas la faktajn bezonojn de siaj uzantoj.

Kiamaniere la evoluo de Esperanto respeguliĝas je la kresko de la nombro de vortradikoj, vidiĝas el jenaj faktoj:

En la jaro 1887 la lingvo havis entute 904 vortradikojn, el kiuj oni povis formi minimume 10.000 vortojn. La Universala Vortaro de 1894 enhavis 2.599 vortradikojn. La ses oficialaj aldonoj de la Esperanta Akademio enhavas 1.758 vortradikojn plus la nova sufikso *-end*, entute 1.759. Sekve, la oficialaj vortradikoj en la komuna uzo estas 4.423. La Plena Vortaro de Esperanto (dua eldono) enhavas 6.900 vortradikojn kaj la suplemento al tiu vortaro, kiu

estos publikigita komence de la jaro 1954, enhavas 966 vortradikojn. Entute, do, la Plena Vortaro—verko kun granda aŭtoritato kaj en komuna uzo—enhavas 7866 vortradikojn. El tiu vortradika materialo oni povas formi en Esperanto minimume 80.000 vortojn, kiuj respondas al vortoj uzataj en la naciaj literaturaj lingvoj. Sed el tiu vortradika materialo oni povas fari ankoraŭ grandan nombron da aliaj derivitaj vortoj kaj vortkombinoj, kiuj perfekte trafas difinitajn ideojn, sed kiuj ne estas adekvate esprimeblaj en la naciaj literaturaj lingvoj.

La supera lingva instanco estas la Akademio de Esperanto, kiu havas la taskon “konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon” (art. 1 de la Statuto de la Akademio). Estas rimarkinde, ke el la 7866 radikoj en komuna uzo, la fundamentaj kaj oficialigitaj sumiĝas je nur 4.425. Tio ĉi estas rezulto de la granda singardemo de la Akademio, kiu oficialigas iun novan radikon nur tiam, kiam ĝi estas vaste, longe, ĝenerale uzata de la personoj kiuj parolas Esperanton. Tio ĉi prezentas belan ekzemplon de la maniero, laŭ kiu evoluas Esperanto.

Oni devas aldoni, ke, krom tiu ĝenerala vortprovizo, multaj fakaj vortradikoj, ne enirintaj en la Plenan Vortaron, troviĝas en la pli ol 100 fakaj terminaroj kaj vortaroj, publikigitaj ĝis nun en la Internacia Lingvo.

Parolante pri la evoluo de Esperanto oni devas akcenti du gravajn faktojn, kiujn la personoj ne sciantaj la Internacian Lingvon aŭ ne studentaj sufiĉe profunde la demandon, tute simple ne povas kompreni.

La unua fakto estas, ke, malgraŭ tiu grandioza evoluo, kiu faras Esperanton delikata instrumento por esprimi eĉ la plej nuancitajn pensojn, la lingvo nenion

perdis de sia simpleco, fleksebleco kaj facileco. La 16 fundamentaj reguloj de la gramatiko restis la samaj. Aliflanke, por la praktika aplikado de la lingvo en la ĉiutaga vivo ne estas necesaj pli ol 700 ĝis 800 vortradikoj, el kiuj oni povas formi minimume 7000 ĝis 8000 derivitajn vortojn. Depende de la persona, individua klereco tiu ĉi nombro estos pli aŭ malpli granda. La sama fenomeno, cetere, estas rimarkebla ankaŭ rilate al la naciaj lingvoj. Neniam la individua vortprovizo respondas al la tuta vortprovizo de iu lingvo. Kutime la vortoj individue posedataj prezentas nur tre malgrandan parton de la komuna vortprovizo de iu lingvo. La facileco de Esperanto ne konsistas kaj ne povas konsisti en tio, ke en ĝi oni havu limigitan nombron da vortoj, kiel tion pensas kelkaj pseŭdosciencistoj. La facileco de Esperanto konsistas en ĝia simpla kaj logika gramatika strukturo, en la genia sistemo de afiksoj, en la fakto, ke ĉiu persono, kiu ellernas Esperanton, sentas ĝin ne kiel fremdan, sed kiel sian propran lingvon.

La dua grava fakto estas, ke Esperanto ne nur konservis, sed eĉ fortikigis sian plenan unuecon. La personoj, kiuj akceptas Esperanton, faras tion tute certe ne por enigi en ĝin la mallogikaĵojn de siaj naciaj lingvoj, por infekti ĝin per naciaj idiotismoj aŭ per aliaj naciismoj kaj tiamaniere rompi ĝian unuecon, sed, male, *por interkompreniĝi per unu sama komuna lingvo*. Tiu ĉi psikologia stato, tiu ĉi volo konservi la lingvan unuecon, faras ke neniam Esperanto povos disfali. Sed tiu fenomeno ne estas esenca nur por Esperanto. Ĝi estas tute sama en kiu ajn alia lingvo. Ĝis iu komunado, iu kolektivo volas havi komunan lingvon—kaj tiu volo, siavice, estas rezulto de pluraj faktoroj, kiujn ne estas eble prezenti ĉi tie—ĝi konservas tiun lingvon kiel unuecan. Kiam tiu volo ĉesas ekzisti—pro kaŭzoj, kiujn, denove, ne estas eble prezenti en la kadro de tiu ĉi studo—la lingvo ĉesas ekzisti kiel unueca. Tio

povas okazi al la naciaj lingvoj, kiam pro diversaj kaŭzoj—plej ofte ekonomiaj kaj politikaj—rompiĝas la ĝis tiam unueca lingvokomunaĵo en plurajn sociajn unuojn, sed tio ne povas okazi al lingvo internacia, *akceptita libervole ĝuste por la celo servi kiel internacia komunikilo.*

La 66-jaraj spertoj en la funkciado de Esperanto pruvas la absolutan ĝustecon de la supra tezo. Malgraŭ la priskribita evoluo de Esperanto, malgraŭ la ĉiam pli vasta praktika utiligo de la lingvo sur plej diversaj kampoj de la internacia vivo, malgraŭ la grandiganta nombro de la personoj, kiuj parolas la lingvon, Esperanto tamen konservis kaj eĉ plifortigis sian unuecon. Fakte, se en la komencaj jaroj oni povis rimarki iajn diferencojn en la prononcado—diferencojn, kiuj tamen neniel malutilis al la komprenebleco—tiuj diferencoj kun la tempo ĉiam pli kaj pli malaperadis. Tio estas rezulto de ĉiam pli oftaj internaciaj kongresoj, konferencoj, kunvenoj, vojaĝoj kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj. Laŭ la atesto de tiaj objektivaj observantoj, kia estas D-ro Edmond Privat, profesoro en la Universitato de Neuchâtel, kiu sekvis tiun aspekton de la Esperanta evoluo ek de la jaro 1905 ĝis niaj tagoj, la lingvo estas hodiaŭ multe pli unuece prononcata ol ĝi estis en la jaroj antaŭ la unua mondmilito. La plivastiĝo de la kampo sur kiu Esperanto estas praktike utiligata kaj la nombra kresko de personoj, kiuj parolas Esperanton, *kaŭzis plimultiĝon de ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj inter tiuj personoj kaj, rezulte, kontribuis al ĉiam pli granda fortikigo de la lingva unueco.* Okazis, do, precize la malo de tio, kion pseŭdo-sciencistoj siatempe “antaŭvidadis” kaj kion ignorantoj ankaŭ hodiaŭ superece asertas!

Kiel oni vidas, la evoluo de la Internacia Lingvo ne estas diktata de supre, sed ĝi okazas de malsupre, de la personoj kiuj praktikas la lingvon. Al la evoluo de

Esperanto precipe kontribuas la verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj, sciencistoj, kiuj verkas en la Internacia Lingvo. Sed al tiu evoluo grave kontribuas ankaŭ la regula uzado de la lingvo en la kluboj kaj societoj, dum kongresoj kaj konferencoj, en korespondado kaj eĉ en la privata, familia vivo. Ne ekzistas, do, ia ajn principa diferenco inter la maniero, laŭ kiu evoluas la naciaj literaturaj lingvoj, kaj la maniero, laŭ kiu evoluas Esperanto. La sola diferenco eble estas, ke en la evoluo de Esperanto ĉiam venkas la plej internaciaj formoj, dum en la evoluo de la naciaj lingvoj oni povas ofte rimarki preskaŭ perfortan klopodon konservi pure naciajn formojn. Tio ĉi precipe okazas en lingvoj, kies popoloj travivas periodon de forta naciismo, aŭ troviĝas sub regado de naciismaj diktatoraj reĝimoj. Tiu fenomeno estis precipe rimarkebla en Germanujo de Hitler kaj en ĉiuj landoj, kiuj imitis aŭ imitas tiun regadsistemon. En tiuj okazoj oni perforte —per leĝoj, dekretoj, punoj k.t.p.—malebligas la normalan evoluon de la lingvo en senco de internaciigo, malhelpas la enpenetron de internaciaj esprimoj kaj klopodas krei por la samaj ideoj esprimojn el pure naciaj radikoj. Tamen, tiuj provoj kaj klopodoj malsukcesas kaj la popolo, malgraŭ kaj spite al la dekretoj kaj leĝoj, tamen konas kaj tre ofte uzas ĝuste la internaciajn esprimojn. Tiu ĉi fakto estas plia pruvo pri la forto de la unuecigaj tendencoj en la evoluo de la lingvoj ĝenerale. Ĝi estas samtempe plia pruvo pri la normaleco, “natureco” de la evoluo de la Internacia Lingvo Esperanto.

II

OPINIOJ PRI LA VALORO KAJ SIGNIFO DE ESPERANTO

MULTAJ grandaj scienculoj, famaj verkistoj, konataj politikistoj kaj aliaj gravaj personoj esprimis en diversaj okazoj sian opinion pri la lingva valoro de Esperanto kaj pri ĝia signifo sur diversaj kampoj de la internacia publika kaj privata vivo.

Ne estas eble prezenti ĉiujn ĉi opiniojn, sed estas sendube interese doni almenaŭ kelkajn el ili:

Leono Tolstoj, la granda rusa verkisto, skribis al la eldona societo *Posrednik*: “Esperanto estas tiel facila por ellerni, ke ricevinte antaŭ ses jaroj gramatikon, vortaron kaj kelkajn artikolojn en tiu ĉi lingvo, mi povis post du mallongaj horoj, se ne skribi, do almenaŭ legi flue la lingvon. . . . La oferoj, kiujn faros kiu ajn homo de nia Eŭropa mondo, dediĉante iom da tempo al ĝia lernado, estas tiel malgrandaj, kaj la rezultoj, kiuj povas el tio sekvi, tiel grandegaj, ke oni ne povas rifuzi fari tiun ĉi provon.”

A. Meillet, profesoro en *Collège de France*, skribis: “La principo, sur kiu baziĝas Esperanto, estas bona. . . . Eblecon starigi facile lerneblan helpan lingvon kaj la fakton, ke tiu lingvo estas uzebla, demonstris la praktiko. Ĉia teoria diskuto estas vana: Esperanto ekfunkciis.”

F. Nitti, eksprezidanto de la Itala Registaro, kies verko *Eŭropo ĉe la abismo* estis tradukita en Esperanton, skribis: “La eldonisto ĵus informis min, ke la eldono de mia libro en Esperanto havis grandan sukceson kaj ke li ricevis mendojn el ĉiuj landoj. Mi donas grandan signifon al la disvastigo de Esperanto . . . eĉ el vidpunkto politika. Dank’ al sia facileco, ĝi taŭgas

tre bone por la rapida disvastigo de la propagando favore al la paco kaj por la plilarĝigo de la intelektaj kaj komercaj rilatoj inter eĉ la plej malproksimaj popoloj.”

Louis Lumière, membro de la Franca *Académie des Sciences*, diris: “Mi estas konvinkita, ke la ĝeneraligo de la uzo de Esperanto povus havi la plej feliĉajn konsekvencojn por la internaciaj rilatoj kaj por la efektivigo de la universala paco.”

Sir William Ramsay, la fama Angla kemiisto, diris: “La kemio, kiu havas kiel sian kampon de aktiveco la universon, devas posedi universalan lingvon. Se oni pensas al la laboro, kiu nun estas farata por la scienco en Rusujo kaj en Japanujo, kiel ankaŭ al la laboro kiu realiĝos kiam la forta kaj viva inteligento de Ĉinoj dediĉos sin al tiu ĉi branĉo de homa aktiveco, oni vidas la neceson utiligi Esperanton por komunikadi kun tiuj ĉi popoloj, se oni volas eviti la studadon de komplikitaj lingvoj, kaj tute aparte de la lingvo Ĉina kun ĝiaj 40.000 signoj, el kiuj ĉiu reprezentas unu ideon.”

Charles Richet, profesoro kaj membro de la Franca *Académie de Médecine*, Nobelpremiito: “Multaj nekontestablaj kaj nekontestataj faktoj pravas, ke eĉ homoj la malplej kleraj povas facile paroli du hejmajn lingvojn; nu, lingvo internacia . . . estas multe malpli malfacila ol kiu ajn lingvo . . .; do, la homoj, eĉ la malplej kleraj, povos facile aldoni al sia nacia lingvo alian lingvon, internacian . . . kiun ili povos sen malfacilaĵoj paroli kiel gepatran lingvon”.*

* Tiu ĉi penso de profesoro Richet tute realiĝis. Hodiaŭ ekzistas infanoj, kiuj ellernis Esperanton paralele kun la racia lingvo. Parto de tiuj infanoj havis malgrandan kunvenon en Munkeno, en aŭgusto 1951. Ĝin ĉeestis trideko da infanoj el Francujo, Germanujo, Anglujo, Nederlando kaj aliaj landoj. Inter si ili parolis flue Esperanton kaj eĉ ne estis konsciaj pri la fakto, ke ili apartenas al diversaj nacioj.

A. Cotton, membro de la franca *Académie des Sciences*, Nobelpremiito: “Mi partoprenis ok kongresojn de Esperanto kaj mi povas konfirmi, ke la esperantistoj, venintaj eĉ de landoj tre malproksimaj, povas bonege interkompreniĝi. . . . Aliflanke, mi ĉeestis plurajn fojojn sciencajn kongresojn. Oni devas havi la kuraĝon ĝin konfesi: krom kelkaj personoj, kiuj vere havas grandan praktikon en la uzado de pluraj lingvoj, tie oni kompreniĝas tre malbone; plej ofte oni ŝajnigas kvazaŭ oni komprenus. Ofte oni prezentas resumojn de la komunikaĵoj en alia lingvo ol tiu de la aŭtoro. Sed tiuj ĉi resumoj, kiuj ne estas faritaj de la aŭtoro mem, ne reprezentas ĉiam ekzakte lian penson; estas akcentinde, ke plej ofte tiuj resumoj estas farataj en unu sola lingvo kiu—ĝi mem—ne estas komprenata de ĉiuj. Estas pli ol klare, ke la aktuala stato necesigas, krom ĉio, grandan perdon de tempo kaj multege da laboro eĉ ĉe la privilegiitoj, kiuj komprenas, kaj ke tiuj ĉi kongresoj estas malproksimaj de la aktiveco, kiun ili devus montri.”

Odo Bujwid, profesoro kaj konata Pola bakteriologo, skribis: “Mia instruisto kaj amiko, la granda Pasteur, diris tiujn ĉi memorindajn vortojn: Se la scienco ne havas patrujon, la homo de la scienco devas ĝin havi. Aplikante tiun ĉi penson al nia ideo, ni diros, ke se la Lingvo Internacia ne havas patrujon, ĉiu homo kiu ĝin parolas devas ĝin havi. . . . Oni povas hodiaŭ malfacile imagi ĝis kia grado estos faciligitaj la rilatoj inter la popoloj tiun tagon, kiam tiuj ĉi fine komprenos la necescon de komuna lingvo.”

B. Mayor, profesoro de la Latina en la universitato de Cambridge: “Kiel antaŭpreparo por la studo de aliaj lingvoj, lingvo tiel simpla, tiel regula, tiel riĉa je vokaloj kiel Esperanto, havus grandan valoron, tute aparte por la Angloj. Oni devus instrui al la infanoj

unue Esperanton por pasi poste al la Franca, al la Latina, al la Germana kaj al la Greka.”*

Upton Sinclair, la konata Usona verkisto, diris: “Permesu al mi diri, ke estas necesaj multaj jaroj por ellerni nur legi la Anglan aŭ la Francan, la Germanan aŭ la Rusan, sed persono havanta nur mezan instruitedcon povas kompreni Esperanton post 3 aŭ 4 semajnoj.”

Jean Thomas, profesoro kaj helpa ĝenerala direktoro de UNESKO, diris en parolado dum la solena malfermo de la 35-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo (aŭgusto 1950): “Multnombraj estas la punktoj de simileco inter la celoj de Esperanto kaj tiuj de UNESKO. Estas sendube, ke la aŭtoro de Esperanto ne deziris nur krei verkon lingvistan, sed ke li ankaŭ kaj antaŭ ĉio deziris krei rimedon, kiu povas faciligi la proksimigon de la popoloj. Hodiaŭ oni prave povas aserti, ke la monda interlingvo permesis atingi tiun celon multajn fojojn. Interalie ĝi ebligis la aperon, en lingvo komuna, de majstroverkoj de la universala literaturo; ĝi kontribuis al evoluigo de la pli alta humanisma idealo. La moralaj fortoj por la paco kaj la interkompreniĝo ne estas tiel multnombraj, ke ili povus permesi al si ignori unuj la aliajn. Tio ĉi estas la kaŭzo, pro kiu UNESKO deziras esprimi sian admiron por viaj altruistaj aspiroj kaj, tute aparte, por via idealo de la paco.”

* Prof. Mayor ellernis Esperanton dum kelkaj tagoj, dum la Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Cambridge en 1907. Kvankam li tiam jam havis 83 jarojn, li povis ellerni la lingvon tiel bone, ke en la lasta tago de la kongreso li faris paroladon, en kiu li, interalie, diris: “Mi ĵus ĉeestis miraklon de Pentekosto. Mi ĵus ĉeestis la malkovron de nova mondo, kies Kristoforo Kolombo estas Zamenhof. . . . Ovido ne plu skribus *Barbarus hic ego sum, quia non intelligor illis*. Post kelkaj horoj da lernado li povus kun ĝojo eksklami: *Non sum barbarus hic: intelligor omnibus*.”

E. Herriot, Prezidanto de la Franca Nacia Asembleo, en sia letero de la 17-a de Junio 1952, adresita al la 37-a Universala Kongreso de Esperanto en Oslo, diris interalie: “Okaze de la 37-a Universala Kongreso de Esperanto mi estas feliĉa denove esprimi mian simpatian por la Esperanto-Movado. . . . Mi deziras, ke la atento de la ŝtatistoj kaj de la sciencistoj estu altirita al la laboroj de tiu ĉi Kongreso kaj al la praktikaj servoj, kiujn povas prezenti Esperanto. Mi gratulas la Esperantistojn pro iliaj klopodoj por atingi pli bonan interkompreniĝon inter ĉiuj homoj de bona volo.”

André Allix, profesoro kaj rektoro de la Universitato en Lyon, skribis en sia letero de la 12-a de Junio 1952, adresita al la Universala Kongreso de Esperanto en Oslo: “Mi firme esperas, ke la klopodoj de la Esperantistoj de ĉiuj nacioj ne estos vanaj. Ne ekzistas limoj por la homoj de bona volo, kaj la Esperantistoj per sia fido, per sia efika laboro, per sia universala lingvo alportas valoran kontribuon al la realigo de la granda homara frateco, kiun ni ĉiuj deziras.”

Luigi Einaudi, Prezidanto de la Itala Respubliko, en sia telegramo al la 24-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto en Bologna (Septembro 1952), diris interalie: “Mi deziras, ke la kongresanojn, ĉiujn kune, atingu, samtempe kun mia inaŭgura saluto, tiu tributo de neta simpatio, kiu estas donenda al ĉiuj, kiuj kontribuas grandaniman verkon por la proksimigo de la popoloj.”

Josip Broz-Tito, Marŝalo kaj Prezidanto de la Jugoslavia Respubliko, deklaris la 4-an de Junio 1953 en sia palaco en Beograd al delegacio de la Loka Kongresa Komitato de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb, jenon: “Rilate al lingvolernado mi tamen volas diri, ke Esperanto estas multe pli facile lernebla ol kiu ajn alia lingvo. Mi opinias, ke la

lernado de Esperanto nun estas tre aktuala. Scion de Esperanto oni povas en ĉiu lando utiligi. . . . La grandaj nacioj volas, ke ilia lingvo superregu, sed Esperanto havas vere universalan karakteron. Ĉar ĝi havas evolukapablon, ĝi havas estontecon; ĝi estas tre utila afero. . . .”*

* Dokumentoj pri ĉiuj eldiroj reproduktitaj en tiu ĉi ĉapitro troviĝas en la arĥivo de CED.

III

INSTRUADO DE ESPERANTO

POR rapida disvastigo de la Internacia Lingvo grava problemo estis tiu de ĝia instruado, resp. lernado. En sia jam menciita letero al N. Borovko, Zamenhof skribis:

“Dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: ‘Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo’, sed ĉar la ‘mondo’ ne estas ebla sen antaŭaj apartaj ‘unuoj’, la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam ĝia utileco fariĝos por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu jam estas la lingvo akceptita de la mondo aŭ ne. Pri ĉi tiu problemo mi longe pensadis”.

Fine Doktoro Zamenhof venis al la penso aranĝi la lernolibron laŭ la maniero de ŝlosilo, kiu “enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabeto ordigitaj elementoj, donus la eblon al la . . . adresato de kiu ajn nacio tuj kompreni vian leteron”.

La aglutina karaktero de Esperanto ebligis al Doktoro Zamenhof realigi ankaŭ tiun sian ideon. Tiamaniere diversaj personoj, kiuj ricevis la unuajn lernolibrojn, povis facile ne nur ellerni la lingvon, sed ankaŭ, antaŭ ol ĝin ellerni, kompreni tekston skribitan en tiu lingvo. Tion ĉi ankaŭ hodiaŭ ebligas la malgrandaj, tiel nomataj ŝlosiloj.

A. Ŝlosiloj

Temas pri malgrandaj libretoj, kiuj enhavas la tutan gramatikon de Esperanto kaj vortaron de pli ol 2000 radikoj. Ĉiu iom klera persono, kiu trastudas la ŝlosilon povas sen malfacilaĵoj legi kiun ajn tekston skribitan en Esperanto. Al la ideo eldoni tiaspecajn ŝlosilojn venis la Brita Esperantisto Herbert F. Höveler.

Sub la aŭspicioj de UEA ĝis nun aperis tiaj ŝlosiloj en la lingvoj Albana, Angla, Araba, Bulgara, Estona, Flandra, Franca, Germana, Hebrea, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Kataluna, Kimra, Kroata, Latva, Litova, Malaja, Nederlanda, Norvega, Persa, Pola, Portugala, Romanĉa, Rumana, Rusa, Serba, Slovaka, Slovena, Sudafrika, Sveda, Ukraina, dum estas preparataj ŝlosiloj ankaŭ en lingvoj Hindustana, Turka, Malgaŝa, Anama kaj aliaj. Kelkaj eldonoj de la ŝlosilo estis faritaj en tre granda nombro. Ekzemple, la Sveda ŝlosilo estis eldonita ĝis la jaro 1953 en 215.000 ekzempleroj.

B. Lernolibroj

La ŝlosiloj, kompreneble, ne povas kontentigi la bezonojn de serioza studado de Esperanto. Tiucele oni hodiaŭ ĝenerale uzas bonajn gramatikojn, vortarojn kaj aliajn lernolibrojn.

La lernolibroj de Esperanto por diversaj lingvoj komencis aperadi en la jaro 1887. De tiam ĝis hodiaŭ senĉese novaj ĉiam pli bonaj lernolibroj estis kaj estas publikigitaj en diversaj lingvoj. Jen la lingvoj, en kiuj unue estis publikigitaj lernolibroj por studado de Esperanto, kun interkrampe menciita la jaro kiam aperis la unua eldono:

Albana (1928), Angla (1888), Araba (1907), Armena (1909), Astura (1917), Bulgara (1903), Ĉeĥa (1890), Ĉina (1912), Dana (1908), Estona (1893), Finna

(1902), Franca (1887), Friula (1922), Germana (1887), Greka (1907), Hebrea (1888), Hispana (1890), Hungara (1898), Islanda (1909), Itala (1890), Japania (1906), Judgermana (Jidiŝ) (1888), Judhispana (1912), Kartvela (1910), Kataluna (1906), Kimra (1910), Kroata (1909), Latina (1922), Latva (1889), Malaja (1921), Nederlanda (1900), Norvega (1907), Persa (1915), Pola (1887), Portugala (1892), Rumana (1896), Rusa (1887), Serba (1907), Slovaka (1907), Slovena (1910), Sveda (1889), Tatara (1913), Turka (1909), Ukraina (1907), Filipina (1908).

Ekzistas ankaŭ pluraj gramatikoj kaj vortaroj nur Esperantlingvaj. El tiuj precipe menciindaj estas la grandega verko *Plena Gramatiko de Esperanto* de Kalocsay-Waringhien (Budapest 1935) kaj la *Plena Vortaro*, verkita de Prof. E. Grosjean-Maupin, A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld kaj Prof. G. Waringhien. Ĝis nun ĝi havis tri eldonojn kaj en 1954 aperos, la kvara.

Laŭ la statistiko entenita en la verko *Bibliografio de Internacia Lingvo* de P. E. Stojan, ĝis la jaro 1929 estis entute publikigitaj 1,568 diversaj lernolibroj en 50 naciaj lingvoj. De tiam tiu ĉi nombro multe altiĝis kaj hodiaŭ ekzistas pli ol 2,000 diversaj lernolibroj en 84 lingvoj.

C. Instrumetodoj

La plej malnova, pure gramatika metodo, estas entenita en la Fundamento de Esperanto, kiu konsistas el tri partoj kaj en la unua parto prezentas la 16 fundamentajn regulojn de la Esperanta gramatiko. Kompreneble, neniuj alia lingvoj estas lernebla, des malpli sen instruisto, el tiel malabunda materialo. En Esperanto tio estas tute farebla pro ĝia granda facileco. Ĉiuj lernintoj de la 19-a jarcento lernis laŭ tiu maniero.

Ankaŭ hodiaŭ granda parto de esperantistoj ellernis la lingvon laŭ la sama maniero.

Antaŭ la unua mondmilito estis kutimo aldoni al la lernolibroj apartan “Ŝlosilon”, t.e. solvaron de ekzercoj kaj traduktaskoj, por ke la lernanto povu mem kontroli siajn ellaboraĵojn. Tio multe faciligis la studadon de la lingvo al memlernantoj.

Inter la du mondmilitoj aperis en Esperanto taŭgaj lernolibroj, aranĝitaj laŭ nova metodo, kiu estis karakterizata per la interesa enhavo: mallongaj raportoj kaj artikoloj anstataŭ nudaj frazoj.

Tute novan metodon de instruado enkondukis Andreo Cseh, kiu instruis Esperanton al alilingvanoj. La ĉefa karakterizilo de la Cseh-metodo estas, diference de la metodo Berlitz, senigo de lernolibroj. Hodiaŭ jam centoj da instruistoj instruas laŭ Cseh-metodo kaj havas tre bonajn sukcesojn. Estas akcentinde, ke la lernantoj laŭ tiu metodo tre baldaŭ ekparolas en la Internacia Lingvo.

Interesan metodon liveris ankaŭ Prof. E. Privat en sia *Kursa Lernolibro*, instruilo por komencantoj, verkita nur en Esperanto. Ankaŭ tiu ĉi metodo estas multe uzata kaj taŭgas por paroligi.

Miksitan metodon, kiu trovas sian lokon inter la gramatika kaj la senpera, prezentas preskaŭ ĉiuj gravaj lastdataj naciaj kaj internaciaj lernolibroj. La materialo estas kutime dispartigita en 10–30 lecionoj, kiuj liveras en interesa maniero temon por konversacio.

Esperanto estas instruata ankaŭ en korespondaj kursoj, precipe en Nederlando, Svedujo, Francujo, Britujo kaj kelkaj aliaj landoj. Okazadis kaj ankaŭ nun okazas kursoj de Esperanto per radio kaj per gramofonaj diskoj (Linguaphone).

D. Kursoj

Kvankam Esperanto estas facile lernebla ekster la kursoj aŭ lernejoj, tamen la Esperanto-organizaĵoj okazigas ĉiujare kursojn, kiuj daŭras de 3-4 monatoj (precipe en la Slavaj landoj) ĝis maksimume 2 jaroj (precipe en Malproksima Oriento). Kutime oni organizas ankaŭ apartajn superajn kursojn, en kiuj oni pli profunde studas la lingvon, ĝian historion, ĝian literaturon k.t.p.

Estas tre malfacile scii kiom da kursoj de Esperanto okazas ĉiujare. Laŭ la enketo, kiun faris la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, en la lernojaro 1950-1951 estis gvidataj kursoj por komencantoj en jenaj landoj (interkrampe estas menciita la nombro de la kursoj):

Argentino (11), Aŭstralio (8), Bolivio (3), Brazilo (150), Britujo (67), Ĉeĥoslovakujo (90), Ĉilio (2), Danlando (50), Egiptujo (14), Flandra parto de Belgujo (7), Francujo (56), Germanujo (320), Gvatemalo (3), Hispanujo (12), Hungarujo (31), Italujo (30), Islando (2), Izraelo (2), Jugoslavio (28), Maroko (1), Nederlando (40), Nordameriko (65), Norvegujo (35), Novzelando (8), Pollando (13), Svedujo (150), Svislando (4), Urugvajo (1), Venezuelo (4), do en 29 landoj 1267 kursoj.

Pri kelkaj landoj, ekzemple pri Japanujo kaj Ĉinujo, mankis la informoj, sed en ili certe okazis tiaj kursoj. En aliaj landoj, ekzemple en Sovetunio, pro la negativa starpunkto de la registaro, ne povis okazi kursoj.

En la supraj ciferoj ne estas enkalkulitaj la kursoj per korespondado, ĉar ili estas daŭraj kaj la nombro de la lernantoj senĉese ŝanĝiĝas.

Estas akcentinde, ke la kursgvidantoj kutime ricevas nenian rekompencan por sia laboro. La instruado de Esperanto, kiel, cetere, la tuta grandega laboro sur la

kampo de progresigo de la Internacia Lingvo, estas farata senpage de oferemaj personoj.

E. Lernejoj kaj Universitatoj en kiuj oni instruas Esperanton

Esperanto tre malfacile penetras en la lernejojn. Se, dank' al la klopodoj de la Esperanto-organizaĵoj, oni sukcesis tie kaj tie enkonduki Esperanton en iun lernejon, tio estis pli rezulto de la komprenemo de la lokaj klerigaj aŭtoritatoj ol de la ĝenerala kleriga politiko de la koncerna lando. Tamen, en pluraj lernejoj de diversaj landoj Esperanto estas instruata kiel deviga aŭ nedeviga objekto. Laŭ la informoj, ricevita surbaze de enketo, kiun faris la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, unu el la fakaj asocioj de UEA, Esperanto estis instruata en la lerneja jaro 1950/51 en elementaj aŭ mezgradaj lernejoj aŭ porinstruistaj seminarioj en jenaj landoj (interkrampe estas menciita la nombro de lernejoj):

Aŭstrujo (7), Brazilo (1), Britujo (22), Bulgarujo (1), Danlando (1), Finnlando (2), Francujo (28), Germanujo (22), Grekujo (10), Hungarujo (1), Italujo (1), Jugoslavio (2), Nederlando (11), Norvegujo (1), kaj Svedujo (3), do entute en 114 lernejoj en 15 landoj.

La supraj informoj estas donitaj surbaze de respondoj, subskribitaj de respondecaj personoj, ricevitaj rekte el la lernejoj kaj kun la nomoj de la koncernaj instruistoj. Respondoj, kiuj ne plenumis tiujn kondiĉojn, ne estas enkalkulitaj.

Laŭ la enketo, kiun faris por CED ĝia kunlaboranto D. Kennedy, Esperanto estis instruata en la jaro 1953 en elementaj aŭ mezgradaj lernejoj aŭ en porinstruistaj seminarioj en jenaj landoj (interkrampe estas menciita la nombro de lernejoj):

Aŭstrujo (7), Brazilo (1), Britujo (21), Bulgarujo

(1), Danlando (1), Finnlando (2), Francujo (28) Germanujo (23), Grekujo (3), Hungarujo (1), Italujo (2), Jugoslavio (36), Nederlando (11), Norvegujo (1), Svedujo (3), Usono (19), do entute en 160 lernejoj en 16 landoj.

Esperanto estas instruata ankaŭ en pluraj universitatoj. Laŭ la informoj, pri kiuj disponas la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, katedroj aŭ lektoratoj de Esperanto funkciis post la jaro 1949 en jenaj universitatoj:

Filozofia fakultato de la universitato en Graz (Aŭstrujo), Teknika altlernejo en Graz (Aŭstrujo), Filozofia fakultato de la universitato en Innsbruck (Aŭstrujo), Altlernejo por agrikulturo en Vieno (Aŭstrujo), Altlernejo por internacia komerco en Vieno (Aŭstrujo), Teknika altlernejo en Vieno, Filozofia fakultato de la universitato en Liverpool (Britujo), Ĉeĥa teknika altlernejo en Praha (Ĉeĥoslovakujo), Filozofia fakultato de la universitato en Mainz (Germanujo), Filozofia fakultato de la universitato en München (Germanujo), Teknika altlernejo en München (Germanujo), Filozofia fakultato en la universitato de Szeged (Hungarujo) (tiu ĉi katedro estis ĉesigita fine de la jaro 1950), Humanisma fakultato de la universitato en Lodz (Pollando), Kulturscienca fakultato de la fremdlingva kolegio en Kobe (Japanujo), Katedro de Esperanto en fremdlingva kolegio de Osaka (Japanujo), Kulturscienca fakultato de la universitato Otani (Japanujo).

Krom la menciitaj katedroj, Esperanto estis oficiale instruata en kursoj ekster katedroj en la universitatoj aŭ altlernejoj de Bratislava (ĈSR), Tenerife (Kanariaj Insuloj), Forlì (Italujo), Habana (Kubo), Santiago (Ĉilio), Toronto (Kanado), Varna (Bulgarujo), Rollins College, Winterpark, Florida (Usono), Osaka (Japa-

nujo), Tokio (Japanujo), Cairo (Egiptujo), kaj Washington (Usono).

Kiel oni vidas, Esperanto estas relative malmulte instruata en la lernejoj kaj universitatoj. Kompare kun la fremdaj naciaj lingvoj de grandaj popoloj, kiuj estas instruataj en ĉiuj lernejoj de la mondo dum pluraj jaroj fare de profesiaj instruistoj kaj profesoroj, la instruado de Esperanto aspektas tre modeste. Sed, kiam oni konsideras la vere minimumajn rezultojn, kiujn donas la lernado de fremdaj naciaj lingvoj en la lernejoj kaj ekster la lernejoj, kvankam por ilia lernado troviĝas je dispoŝo konvenaj ejoj, salajrataj instruistoj kaj ĝenerale grandaj financaj rimedoj, kaj kiam oni komparas tiujn rezultojn kun la rezultoj, kiujn donas la preskaŭ ĝenerale amatora instruado de Esperanto, tiam oni povas ankoraŭ pli bone kompreni la signifon de la grandega facileco de Esperanto kaj de la interna forto, kiun havas la ideo de Internacia Lingvo en la hodiaŭa mondo.

IV

LA ESPERANTA LITERATURO

A. Originala Literaturo

EN sia letero al N. Borovko pri la estiĝo de Esperanto* D-ro Zamenhof rakontas, kiel li laboris ankoraŭ naŭ jarojn super sia lingvo, kiu en 1878 estis ŝajninta al li preta. Li skribas:

“La praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan ‘ion’, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan tute formitan ‘spiriton’ . . . Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj pensis rekte en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesis jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo . . . kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.”

Elkreante tiamaniere la propran stilon de Esperanto, Zamenhof faris el sia lingvo idiomon pretan por originala verkado, sekve por parolado kaj fine ankaŭ por tradukado de verkoj. Lingvo ne havanta antaŭ ĉio propran originalan stilon ne taŭgas por tradukado, ĉar al la traduko mankus viva toni: ĝi estus nur koda transskribo de la *senco* de la originalo, sen la spirito.

(1.) Gazetoj

Kiam en 1887 aperis la unua libro de Esperanto, ĝi jam enhavis, krom tradukaĵoj, ankaŭ du originalajn poemojn: *Ho Mia Kor'* kaj *Mia Penso*, kiuj ankoraŭ hodiaŭ spiras per senpera sento de vera poezio. Esperanto do debutis kiel embria literatura lingvo, kaj de tiu momento ĝia literatura merito dependis

* Originala Verkaro, p. 421.

pure de la kvanto kaj kvalito de la literaturaj talentoj ĝin uzantaj.

En 1889 fondiĝis la gazeto *La Esperantisto*, kaj dum sia 6-jara ekzisto ĝi rolis literature kiel komunikanto kaj lernilo de la originala Esperanta idiomo. Kiel sola organo internacia de la Esperantistaro, ĝi devis servi por ĉio: por anoncoj, komunikoj, diskuto, kiel ankaŭ por artikoloj kaj literaturaj verkoj.

Kun la plifortiĝo de la movado komencis aperi gazetoj pli akcente servantaj la literaturon. La du posteuloj de *La Esperantisto* havis pli fortan literaturan flankon, kvankam ili estis ankoraŭ ĝeneralaj organoj de la movado: ili estis *Lingvo Internacia* (kiu eliradis dum 19 jaroj) kaj *La Revuo* (kiu eliradis dum 8 jaroj). Komencis eliri ankaŭ gazetoj pure literaturaj. La ĉefaj el tiuj estas *Marto* (aperadis dum 17 jaroj), *La Vagabondo* (7 jaroj), *Tra La Mondo* (3½ jaroj), *La Nova Epoko* kaj *Sennacieca Revuo* (18 jaroj), *Literaturo* (7 jaroj), *Literatura Mondo* (14 jaroj), *Malgranda Revuo*. El Japanujo venis *Samideano*, bele ilustrita per mane koloritaj bildoj.

La ĉefa el tiuj literaturaj organoj estis *Literatura Mondo*, kiu aperadis, kun tri interrompoj, de 1922 ĝis 1949. Ĝi havis la plej internacian kunlaborantaron, eĉ el ekstrema oriento, kaj fariĝis debutejo kaj vartejo por multaj novaj talentoj de prozo kaj poezio. Tre ŝatataj estis la diversaj naciaj numeroj de L.M. (dediĉitaj al la literaturo, arto kaj kulturo de aparta popolo): la sveda, estona, pola, ĉeĥa, jugoslavio, latva, itala, k.t.p.

(2.) Apartaj originalaj verkoj

Tre frue en la historio de la lingvo komencis aperi literaturaj verkoj originalaj kaj tradukitaj. Ni okupiĝos nur pri la pli gravaj kaj komencos per la originala literaturo.

La unua grava originala verko estis “Nevola Mortiginto” (rakonto en versoj de *Devjatnin*) aparte eldonita en 1896. Dum la unuaj dudek jaroj de la lingvo aperis multaj noveloj, legendoj, poemoj, sed nur en 1907 aperis la unua longa romano: “La Kastelo de Prelongo”, de franca doktoro *Vallienne*. Post unu jaro sekvis plua romano el la sama plumo: “Ĉu Li?” Tiuj du verkoj estis aventur-romanoj kun lerte plektita intrigo.

La dua Esperanta romanisto estis *Heinrich Luyken*, Germano britiĝinta en 1910. De li aperis kvar longaj romanoj: “Paŭlo Debenham” (1912), “Mirinda Amo” (1913) kaj, post la milito, “Stranga Heredaĵo” (1922) kaj “Pro Iŝtar” (1924). La verko de Luyken estas romantika kaj havas moralan tendencon, pli fortan ĉe la du unuaj (kiuj memorigas pri Dean Farrar k.a. Viktorinaj verkistoj). “Pro Iŝtar” estas ambicia, grand-skala verko fonanta en la antikva Babela historio.

Menciindaj estas “Nova Sento” de *Hyams* (eldonita en 1915), la unua utopia Esperanta romano, kaj “Pro Kio?” (*Ellersiek*, 1920), la unua kriminala romano.

En 1926 sin anoncis la unua romanisto ĉerpanta rekte el siaj vivospertoj. Tiu estis *Julio Baghy*, Hungaro jam konata kiel Esperanta poeto. Lia romano “Viktimoj” (1926) medias en Siberia militkaptitejo. *Baghy* verkas kun ĝis tiam nekonitaj impeto kaj lingva talento. Sentimento, bonhumoro, realismo, tragiko alternas en la tre kompetente manovrita rakonto. En 1933 sekvis la daŭrigo de “Viktimoj”: “Sur Sanga Tero”, kiu jam estas tute matura romano, en kiu la kalejdoskopaj okazaĵoj estas majstre manipulitaj sur larĝa fono. Malpli sukcesaj estas “Hura!” (1930), groteska satiro kontraŭ la homo kaj la nuna socio, kaj “Printempo en la Aŭtuno” (1931), en kiu *Baghy* lasas tro liberan bridon al sia sentimentalismo.

Baghy montris sin ankaŭ talenta novelisto. “Dancu

Marionetoj” (1927) estis la unua grava novelaro en la lingvo. Sekvis ĝin ankoraŭ tri volumoj: “Migranta Plumo” (noveloj, drametoj, poemoj), “La Teatra Korbo” (noveloj kaj skizoj) kaj “Verdaj Donkiĥotoj” (bonhumoraj satiroj). “La Verda Koro” (1937) estas malgranda romano pri Siberio.

Samtempe verkanta estis *H. Bulthuis*, Nederlandano, aŭtoro de longaj, trankvilaj romanoj vidigantaj elstaran rakontan talenton: “Idoj de Orfeo” (1923); “Jozef kaj la Edzino de Potifar” (1926); “La Vila Mano” (1928) kaj “Inferio” (1938).

En 1923 aperis “Abismoj”, romano, kiu uzas artifikon de okulta povo por vojaĝigi la ĉeffiguron tra la animoj de pluraj personoj implikitaj en la sama historio. Ĝia aŭtoro estis *Jean Forge* (pseŭdonomo de Jan Fethke), pola filmreĝisoro kaj nacilingva aŭtoro. Poste venis “Saltego trans Jarmiloj” (1924) kaj “Mister Tot Aĉetas Mil Okulojn” (1931). *Forge* montras eminentan rakonttalenton: liaj verkoj estas filmecaj en sia movrapido. Ilia impeto venas nur parte de la aventura formo, sed eble ĉefe de la psikologia intereso, plej videbla ĉe la unua kaj tria verkoj.

La Franco *Raymond Schwartz*, plensanga sprita aŭtoro de poemaro “La Verdkata Testamento”, aperigis en 1928 “Prozo Ridetanta”, kolekton da noveloj, kies eminenta bonhumoro baziĝas sane kaj sagace sur la samtempa vivo. En 1930 aperis lia “Anni kaj Montmartre”, mallonga romano fonanta en la apaĉa vivo de Parizo. La trafa observemo, nenion evitanta kaj nenion troiganta, faras tiun ĉi verkon malgranda majstraĵo de la Esperanta literaturo.

La Svedo *Stellan Engholm* estas aŭtoro de kvar nelongaj romanoj: “Al Torento”, “Homoj sur la Tero”, “Infanoj en Torento” I kaj II. En 1946 aperis “Vivo Vokas”. Lia plej matura talento vidiĝas en “Maljunulo Migras” kaj “Venĝo”: du da longaj

noveloj frapantaj per sia viv-aŭtenteco kaj karakter-pentro.

Aliaj gravaj novelkolektoj aŭ noveloj estas: “Se Grenereto . . .”, kaj “Volumo II” (dulingva kolekto aperinta en 1931) de *Kenelm Robinson*, kiuj prezentas al ni Anglajn animojn tra lupeo de originala intelekto; “Por Recenzo” de la simile observema *K. R. C. Sturmer*; “Bakŝiŝ” (skizoj el la vivo de Egiptoj) de *L. N. Newell*—novelaro de unuaranga kvalito; tri volumoj de la Hungaro *F. Szilágyi*: “Trans la Fabeloceano”, “La Granda Aventuro” kaj “Inter Sudo kaj Nordo”. La talento de *Szilágyi* estas tia akuta de ĵurnalisto, kronikanta la interesajn flankojn de la vivo kaj rigardanta la homajn malfortojn per bonhumora okulo.

Lastatempe debutis nova talento *A. Rosbach* (Norvegujo). Lia kolekto de noveloj, skizoj kaj versaĵoj sub titolo “Bagatelaro” (1951) manifestas pozitivan kaj individuan talenton, de kiu oni rajtas esperi verkon pli entan kaj ambician.

El Ruslando venis en 1933 “Metropoliteno” de *Varankin*. Ĝi apartenas al la malmultaj maturaj romanoj de la juna literaturo Esperanta. Sur aktualaj fonoj de Berlino kaj Moskvo ĝi kunigas paralele du rakontojn. La ĉeffiguroj estas psikologie konvinkaj kaj la duobla rakonto estas tre talente manipulita. La ĉeftemo de la romano—la vana lukto kontraŭ komunista burokratismo—versajne kaŭzis ĝian nevarman akcepton en ambaŭ politikaj tendaroj. Ĝi tamen estas verko altmerita.

Menciindaj estas ankaŭ de *J. Weinhengst* (Aŭstro) “Turstrato 4” (1934), sociala romano el la proleta vivo, verkita kun potenca sincero; de *J. D. Sayers* (Usonano) “Invito al Ĉielo” (1950), soci-filozofia verko en formo de vojaĝo al alia planedo; kaj de *Cezaro Rossetti* (Skoto) “Kredu Min, Sinjorino!”

(1951), verko aŭtobiografia, kiu priskribas en plej vigla kaj malkaŝa maniero la vivon de foiristoj kaj ĉarlatanoj, kun brila imito de la metia ĵargono.

Aliaj iom gravaj originalaj verkintoj estas: *N. Barthelmess* (Germano), kiu aperigis "Diablidoj" (1928), "Junece Ardo" (1936), "Vartegoj" (1938); *D. P. Boatman* (Anglo), "La Nekonata Konato" (1932); *Emba* (Hungaro), "Maria kaj la Grupo" (1936); *Marie Hankel* (Germanino), "La Simbolo de l'Amo" kaj "Sableroj" (1911); *Teo Jung* (Germano), "Landoj de l'Fantazio" (1927); *Cicio Mar* (Ĉino), "Forgesitaj Homoj" (1937); *John Merchant* (Anglo), "Tri Angloj Alilande" (1912) kaj "Kompatinda Klem" (1931); *Payson* (Usonano), "Juneco kaj Amo" (1929); *Saĥarov* (Ruso), "Superforta Ambicio" (1913); *Sentis* (Franco), "Urso" (1906) kaj "Blua Kardo" (1923); *F. Omelka* (Ĉeĥo), "La Alaska Stafeto" (1951); *Mason Stuttara* (Anglo), "La Virineto en Bluo" (1946); *Ŝirjaev* (Ruso), "Tra la Loko Ensorĉita" (1913), "Forta Impreso" (1914), "Peko de Kain" (1933) kaj pluraj aliaj noveloj; *Scherer* (Usonano), "Ĉirkaŭ la Mondon kun la Verda Stelo" (1933); *Verda Majo* (Japanino), "En Ĉinio Batalanta".

Paroli vaste pri originalaj teknikaj libroj estas ekster tiu ĉi kadro, sed ni deziras almenaŭ mencii kvar elstarajn verkojn nefikciajn. *E. Aisberg* (Ruso) aperigis "Fine! Nun mi Komprenas la Radion!", amuza populara enkonduko en la radioteknikon. Ĝi estas tradukita el la Esperanta originalo en jenajn 18 lingvojn: Bulgara, Ĉeĥa, Estona, Franca, Germana, Greka, Hispana, Hungara, Itala, Kroata, Latva, Nederlanda, Norvega, Pola, Portugalaj, Rumana, Rusa, kaj Slovena. La Franca kaj Germana havis po 11 eldonoj. De *H. Haefker* (Germano), aperis "Jarmiloj Pasas" (1931), duvoluma mondhistorio el vidpunkto de originala intelekto, Ĝia kvalito memorigos la Anglajn legantojn

pri *The Outline of History* de H. G. Wells. De *D-ro Ivo Lapenna* (Kroato, Jugoslavio), profesoro de internacia juro, venis du gravaj verkoj: "Retoriko" (1950) kaj "Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo" (1952).

(3.) Originala Poezio

Post kiam Zamenhof en la Unua Libro donis du originalajn poemojn, neniam mankis en Esperanto originalaj verskulturantoj. La periodo ĝis la unua mondmilito estis tempo de flugilprovado. Inter multaj poetoj, kies valoro estis pli vere speciala por la lingvo ol ĝenerale grava, aperis nur malmultaj talentoj, kies muzoj atingis pli vastan svingon. Ĉefaj inter ĉi tiuj estas *Stanislav Schulhof*, Ĉeĥo, kaj *Edmond Privat*, Sviso. Schulhof verkis tri malgrandajn poemarojn: "Per Espero al Despero" kaj "Kion la Vivo Alportis" (1911), kaj "Aŭtunaj Floroj" en la sekvinta jaro. En ili oni sentas, ke individua poeta animo alprenis Esperanton kiel ekskluzivan instrumenton de esprimado. "Tra l' Silento" de *Edmond Privat* estas maldika volumo de kelkfoje revelacia artismo.

Dum la unua mondmilito aperis nur unu signifa poemaro: "La Dorna Karesilo" de *Boris Mirski* (Bela Manto).

Tuj post la milito komenciĝis vigla poezia agado, kiu kulminis en la granda talento de *Baghy* kaj la genio de *Kalocsay*, du Hungaroj.

Unue aperis *Eŭgeno Miĥalski*, Ruso profundanima kaj pasia. Lia poeta voĉo sonis kun ankoraŭ ne konitaj ardo kaj impeto, sub kies impulso la ritmoj ofte ŝanĝiĝis de strofo al strofo responde al la fluktuaĵoj humoraj. Post "La Unua Ondo" en 1918 venis "Prologo" (1929) kaj "Kantoj de Amo kaj Sopiro" (1934). En "Fajro Kuracas" (1932) *Miĥalski* sin turnis

al sociaj kaj klasbatalaj temoj, kies vasta patoso tamen tro perfortis lian nepre personan poetecon.

De alia Ruso, *Nikolao Hoĥlov*, aperas en 1928 "La Tajdo", sola poemaro de tiu aŭtoro. En tiuj poemoj la obseda liriko, vestita per belo de senmanka muziko, longe postsorĉas la leganton. Per tiu bedaŭrinde sola verko *Hoĥlov* sin metas en la unuan rangon de la Esperantaj poetoj.

Jaume Grau Casas (Hispano) kaj *Jan van Schoor* (Belgo) estas delikatsentaj poetoj, kiuj bedaŭrinde limigas sian temon preskaŭ nure al la amo.

Per *Raymond Schwartz* (Franco), Esperanto trovis sian bardon de kanzonoj kaj kabaretaĵoj. "La Verdkata Testamento" (1926) malkovris en nesupozita grado la eblojn de la lingvo por vortluda sprito, ironio kaj bonhumoro. En 1931 sekvis egale sukcesa kolekto "La Stranga Butiko". Lastatempe aperis "La Ĝoja Podio" (1949): kolekto de versaĵoj kaj prozaj skizoj, per kiu Schwartz demonstris, ke post 18 jaroj li neniom perdis el sia povo spriti pri homaj malfortoj kaj satiri historiajn okazaĵojn.

Julio Baghy, kiun ni jam menciis kiel verkiston de noveloj kaj romanoj, debutis efektive kiel poeto. "Preter la Vivo" (1923) proklamis poeton arde homecan kaj en patoso inunde sinceran. En 1926 aperis lia ĉefa poemaro "Pilgrimo", kies vasta temogamo kantas interalie abomenon al milito, la amon, gajan bonhumoron kaj socialan proteston. Lia lasta kolekto "La Vagabondo Kantas" (1933) estas relative senpretenda aro da simplaj lirikoĵoj kun kelkaj pli fortaj pecoj.

Preskaŭ samtempe kun *Baghy* elpaŝis alia Hungaro, *Kolomano Kalocsay*. Lia unua volumeto "Mondo kaj Koro" (1921) anoncis, ke artisto novkvalita surpaŝis la scenon. En 1931 sekvis "Streĉita Kordo", la plej grava ĝis nun poemaro de la lingvo. En ĝi poetiko

kaj poezio pompas en neniam antaŭe vidita amplekso. La kunfando de sento, intelekto kaj arto manifestas, ke uzas la lingvon la unua genistatura viro post Zamenhof.

En 1931 *Kalocsay* verkis ankaŭ “Rimportretoj”: majstrajn rondelporetretojn pri 58 eminentaj esperantistoj. La poemaro “Izolo” (1939) pentras la animpremon de mondsenta bardo en veaŭgura epoko. Kiam forŝvebis la fumo de la dua mondmilito, la preskaŭ 60-jara *Kalocsay* reaperis kun verko ankoraŭ pli aktuala, potenca kaj evoluinta: “Tra la Ŝtormo”—poemaro el la militaj jaroj. Bedaŭrinde tiu libro, presata kiam ni vidis ĝin en Budapeŝto, ne plenumiĝis, kaj *Kalocsay* falis en silenton malantaŭ la fera kurteno.

En 1932 aperis verko unika en la Esperanta poezio. Tio estas la “Sekretaj Sonetoj” de aŭtoro kaŝinta sin sub la pseŭdonimo *Peter Peneter*. Ĝi estas taglibro pri amhistorio en formo de 52 sonetoj kun tri enkondukaj versaĵoj, du rondeloj kaj fina balado. La morala aŭdaco, kiel ankaŭ la forma majstreco de tiu ĉi verko, proklamas artiston de la unua kvalito.

La Latvo *Nikolao Kurzens* debutis en 1934 kiel poeto de animpremo kaj senpacienco. En liaj unike mal-longaj poemoj sentiĝas konsterna forto kaj penetra imprespovo.

La sekvintan jaron aperis atentinda volumo “Duonvoĉe” de *Georges E. Maura*. Lia delikata aldo esprimas sensualon kaj la akutan observon de kulturita animo.

Dum kaj post la dua mondmilito elkreskis novaj talentoj, precipe *Vanĉik* (Kroato, Jugoslavio), kaj kvar aŭtoroj en Skotlando.*

* De ili, *W. Auld*, *J. S. Dinwoodie*, *J. Francis* kaj *R. Rossetti*, aperis en 1952 la kolekto “Kvaropo”, grava poezia verko kun antaŭparolo de G. Waringhien. Ĝi signas novan ŝtupon en la evoluo de la Esperanta poezia lingvo. G. Waringhien jene karakterizas la aŭtorojn: “. . . la scivolaj legantoj kapablos mem ŝati

Ni finas tiun ĉi studon pri la originala Esperanta poezio per mallonga refero pri ĝia poetika flanko.

Miĥalski inaŭguris la ritmoŝanĝadon konforme al la turnoj de la poeta humoro. Baghy rompis la kadron de tradiciaj formoj per siaj originalaj strof-konstruoj. Diversaj poetoj sukcese hejmgis en Esperanto, unu post unu, ĉiujn okcidentajn verspiedojn, sed ne—krom per mallongaj streĉatingoj—la klasikajn metrojn.

Plej multon konkeris *Kalocsay*. Sub li la Esperanta poezio ekregis la polan aleksandron, la italan tercionon, la francan baladon, la soneton, trioletan, rondelon kaj la japanan poemformon *tanka*. Unike li aplikis la baladon, ne nur al solenaj kaj sprit-satiraj celoj, sed en mallongaj, kvarpiedaj versoj al brulsarkasma sociala komento (La Balado pri la Atombombo). Li povis ankaŭ manipuli la sonetformon, per tripiedaj versoj, por la tranĉa ciniko (la Cinikaj Sonetoj en Izolo).

Samtempe la “Parnasa Gvidlibro” (*G. Waringhien* kaj *K. Kalocsay*) zorgis pri la teknika flanko de la Esperanta poezio. Tiu libro havas gravan rolon unuecigan kaj ankaŭ perspektivan. En ĝi estas studitaj la Esperanta metriko kaj rimoebloj, la arto poetika (disertacio en versoj) plus kompleta rimvortaro kaj registro de neologismoj aparte utilaj en la poezio.

Konklude ni povas konstati, ke la Esperanta poezio evoluis en 66 jaroj de simpla al multkorda instru-

la anim-ondantan, sensovibran junecon de *William Auld*, la natur-ampleksantan, melankoli-opalecan serenecon de *John S. Dinwoodie*, la imagriĉan, potencon fatalenton de *John Francis*, la jonglistecan, spritfajreran emocisincerecon de *Reto Rossetti*. Nur ke ili lasu sin porti de la sendifekta artismo de la ritmoj kaj rimoj, kaj ili trovos, en la kontemplado de la belo, tiun “porĉiaman ĝojon” al ili promesitan de la Angla poeto. Kaj ili konfesos, same kiel mi, ke tia lingvo, kiu inspiris tiujn versojn, estas io granda, kaj ne povas formorti.” (Rim. de la redaktinto.)

mento, esprimvasta, polurita kaj preta por novaj talentoj aŭ genioj.

B. Traduka Literaturo

En ĉiu lingvo moderne evoluinta al literatura rango la tradukado de verkoj el jam ekzistantaj literaturoj havis gravan rolon. Tio validas pri Esperanto, eĉ en escepta grado, ĉar ĉe Esperanto la motivo traduki estas duobla: unuflanke estas la deziro etendi la povon de Esperanto per konkero de nacilingvaj ĉefverkoj (tiu ĉi celado tuŝas precipe la poezion), kaj aliflanke ekzistas la deziro de Esperantistoj el ĉiuj nacioj konigi al internacia publiko sialandajn literaturajn trezorojn.

La kondiĉoj por tradukado estas ĉe Esperanto escepte favoraj, ĉar en ĉiu eĉ tre malgranda lando troviĝas homoj bone scipovantaj Esperanton kaj tial kompetentaj tradukperi al la mondo sian nacian literaturon. Kontraŭe, en ĉiu el la grandlingvoj: la Angla, Franca, Rusa, Germana k.t.p., oni ja ricevas facile tradukojn el la ceteraj grandlingvoj, sed tre malfacile ricevas tradukojn el la ofte altrangaj literaturoj de malgrandaj nacioj, ĉar apenaŭ oni trovas tradukanton, kiu scias la malgrandnacian lingvon. Tial ni trovas, ke Esperanto faris specialan servon konigi la literaturon de malgrandaj nacioj.

(1.) Antologioj

En 1906 aperis la *Pola Antologio* (155 p., trad. Kabe), volumo de prozaj pecoj el pola literaturo. Tiel modeste ĝermis la antologioj, kiuj unu post unu prezentis la literaturon de diversaj landoj per elektaĵaro el ilia poezio kaj prozo.

Cetere la ĉefaj Polaj verkoj en Esperanto estas jenaj:

Eliza Orzeszko, "Marta" (trad. Zamenhof). Ĉi tiu romano, agitata por emancipo de la virino, tradu-

kiĝis el la Esperanta traduko en japanan lingvon, kie ĝi havis grandan sukceson kaj plurajn eldonojn. Same ĝi tradukiĝis en la ĉinan. Krome de la sama aŭtoro aperis: “Bona Sinjorino” kaj “La Interrompita Kanto” (trad. Kabe).

Boleslav Prus, “La Faraono” (trad. Kabe), trivoluma romano.

Henryk Sienkiewicz,

“Quo Vadis” (trad. Lidja Zamenhof);

“Kaptitaj en Nubio”;

“Ŝi la Tria” (trad. Grabowski);

Noveloj de la sama aŭtoro:

“Noveloj” (trad. Lidja Zamenhof);

“La Juĝo de Oziris” (trad. Grabowski);

“La Lanternisto” (trad. Kabe);

“Ĉe la Fonto” (trad. Kabe).

Sieroszewski, “La Fundo de l’ Mizero” (trad. Kabe).

Sur la kampo de poezio kaj dramo estu menciita unuavice la Pola epopeo “Sinjoro Tadeo” (Pan Tadeusz) de *Mickiewicz*, tradukita de Grabowski laŭ la originala metro el 13-silabaj versoj duope rimitaj. En Angla lingvo ekzistas nur proza traduko de ĉi tiu ĉefverko.

Grabowski tradukis ankaŭ “Mazepa”, la kvinaktan dramon de *Slowacki*, “En Svisujo”, la longan poemon de la sama aŭtoro kaj la operon “Halka” de *Wolski-Moniuszko*.

D-ro Leono Zamenhof, frato de la aŭtoro de Esperanto, liveris bonegajn tradukojn de la dramoj “Aspazio” de *Aleksander Swietochowski* kaj “Protesilas kaj Laodamia”, de *Wyspianski*.

La dua Esperanta antologio de nacia literaturo estas la *Kataluna*, kompilita de Jaume Grau Casas, kiu jam ampleksis (kiel ĉiuj sekvontaj) ankaŭ la poezion. Ĝi havis 416 paĝojn.

Aperis krome kelkaj atentindaj volumoj el la Kataluna literaturo: *Bertrana*, “Barbaraj Prozaĵoj” (trad. Grau, 1926); *Adrià Gual*, “Mistero de Doloro” (3-akta dramo trad. Pujola y Vallés, 1909); “Hejma Prozo” (trad. Bregon Masgrau), kolektitaj tradukoj; *Santiago de Ruysinol*, “Folioj de la Vivo” (trad. Sabadell).

Sekvis la *Bulgara Antologio* (248 paĝoj), kies poezian parton tradukis K. Kalocsay. La ĉefaj aliaj verkoj el la Bulgara estas: *Stamatov*, “Nuntempaj Rakontoj” (fortaj noveloj, kiuj pensigas pri de Maupassant), trad. Krestanov, 1922; *Ivan Vazov*, “Novaj Bulgaraj Rakontoj” kaj “Vagabondoj”; *Smirnenski*, “Tra la Ventego” (poemoj).

La *Belga Antologio* havas du volumojn (la Francan kaj la Flandran partojn) kun sume 580 paĝoj. Krome el la Belga literaturo ni havas jenajn verkojn:

H. Conscience: “La Leono de Flandrujo” (trad. Bulhuis, 1929), “Blinda Rozo”, “Rikke-Tikke-Tak” (trad. M. Posemaer, 1912), kaj “Kion Patrino Povas Suferi”; *Georges Eekhoud*: “Servokapabla” kaj “Marcus Tybout” (trad. Bergiers, 1927); *Timmermans*: “Pallietier” (trad. v. Schoor, 1933); *P. Spaak*: “Kaatje”, blankversa dramo en kvin aktoj, (trad. v.d. Biest, 1911).

La *Litova Almanako* havas 284 paĝojn.

Aperis ankaŭ “El Litova Poezio” (200 paĝoj).

La sekvinta antologio—*la Hungara*—estas ankoraŭ ĝis nun la plej bela kaj grava. Sub ĉefredaktoreco de *Kalocsay*, ĝi ampleksas 468 paĝojn (23×15 cm, kiel la plimultaj antologioj), el kiuj 150 estas poezio. Kun la escepto de 6, ĉiuj poemoj en la volumo estas tradukitaj de Kalocsay mem, kaj la tuta volumo donas eniron en la Hungaran literaturon, kies egalon ni ne konas en la Angla nek en kiu ajn alia lingvo.

Krome, ekzistas vico da elstaraj tradukoj el la

Hungara literaturo. Inter romanoj troviĝas: *Babits*, “La Cikoni-Kalifo” (trad. Bodo, 1929); *Molnár*, “La Knaboj de Paŭlo-Strato”; *Kassak*, “La Vojoj Estas Nekonataj”; *Žilahy*, “Printempo de Morto”; *Jolanta Földes*, “La Strato de l’ Fiŝanta Kato”.

Elstaraj en sia originaleco kaj pensprofundo estas de *Karinthy* la noveloj en “Norda Vento” (trad. Bodo, 1926) kaj de la sama aŭtoro la du pli longaj noveloj “Vojaĝo en Faremidon” kaj “Du Ŝipoj” (trad. Totsche, 1934).

En poezio estas antaŭ ĉio menciinda de *Madách*: “Tragedio de l’ Homo”, versdrama epopeo (trad. Kalocsay, 1924). Plue: *Petőfi*, “Johano la Brava”, popolfabelo en versoj (trad. Kalocsay, 1923); *Karinthy*, “Morgaŭ Matene”, dramo (trad. Kalocsay, 1923); “Kantanta Kamparo”, 101 kantotekstoj (trad. Kalocsay, 1923); “Poemaro el Hungarlando” (trad. Ferenc Szilágyi, 1929).

La *Sveda Antologio*, vol. I, ampleksas en siaj 432 paĝoj la modernan periodon (pretas la manuskripto de la dua vol., el pli frua periodo). Krome aperis tri romanoj de *Selma Lagerlöf*: “Gösta Berling” (1934), “La Infanoj de Betlehem” kaj “La Mono de Sinjoro Arne” (tradukitaj de Engholm, 1933). Jenaj noveloj aperis de la sama aŭtoro: “La Ringo de la Generalo” (trad. Engholm); “La Junulino el Stormyr” (trad. Frode); “La Reĝino de l’ Arbaro” kaj “Sur la Fundo de l’ Granda Kungahella” (trad. Bockström, 1908). La Esperanta traduko de la taglibroj de la *Andrée*-ekspedicio: “Per Balono al la Poluso” (1930) aperis antaŭ la angla eldono. Same rapide aperis la aktuala verko de *Folke Bernadotte*: “La Fino” (1945). Ankaŭ la du laste menciitajn verkojn tradukis la eminenta stilisto Stellan Engholm.

Aperis de *Aŭgust Strindberg*: “Fraŭlino Julie” (trad. Nylen kaj Krikartz, 1908); “Insulo de Feliĉuloj”

(trad. Frode, 1926); “La Konscienco Riproças” (trad. Backman, 1928); “Pario” (trad. Strom, 1908); “Pasko” (trad. Engholm, 1935).

Krome, notindaj estas ankoraŭ du verkoj el la Sveda: *David Flood*, “Mi Serĉis Oron kaj Oleon sed trovis . . .”, kaj “Sveda Novelaro” en traduko de Szilágyi.

De eminenta kvalito estas ankaŭ la *Ĉeĥoslovaka Antologio* (468 p.). El la Ĉeĥoslovaka literaturo tradukigis de *Karel Čapek*: “R.U.R.” kaj “La Blanka Malsano”, ambaŭ dramoj, la spritaj “Skizoj pri Nederlando” kaj “Noveloj” (1934); *Jan Welzl*: “Tridek Jarojn en la Ora Nordo”; *Werner*: “Homoj Sur Floglacio”, moderna dramo, kaj de *Vrba* “Homo de Dio” romano.

Krom ĉi tiuj gravaj prozverkoj estas menciinda el la Ĉeĥa ankaŭ la poemvolumo “Bukedo” de *Erben* en talenta traduko de *Tomaš Pumpr*.

En 1939 eliris la *Svisa Antologio* (540 p.) kun sekcioj Alemana, Velŝa, Tiĉina kaj Romanĉa. Dank’ al tiu ĉi volumo Esperantistoj ĉiulandaj povas akiri pli vastan konon pri la Svisa literaturo, ol la plimulto de la Svisoj, kiuj ne posedas ĉiujn kvar lingvojn de sia lando.

En preparo estas nun trivoluma antologio de la Angla kaj Skota literaturoj; same la Franca antologio, verŝajne ankaŭ trivoluma. Komencitaj antaŭ la dua mondmilito estis ankaŭ antologioj Hispana kaj Itala.

Restas mencii du gravajn poemantologiojn. En 1913 *Grabowski* publikigis sian “El Parnaso de Popoloj”: poemtradukoj el 30 lingvoj (228 p.). La poemoj, tradukitaj fidele laŭ formo, ritmo kaj rimoj, manifestas la grandan teknikan kompetenton de *Grabowski*. El hodiaŭa vidpunkto oni sentas, ke la tonstilo tra la libro estas iom unueca: ia bona, sed “anonima” Esperanta stilo, kiu nemulte redonas la distingajn

spiritojn de la multnaciaj poetoj tie peritaj. Escepto estas la Pola parto, kie la trasenta povo de la granda tradukonto de “Sinjoro Tadeo” bone sentiĝis.

La supra kritiko ne rilatas al la posta kolekto “Eterna Bukedo”, poemoj el 22 lingvoj, de *Kolomano Kalocsay* (1931, 352 paĝoj), kiu signalas novan epokon de la Esperanta poezia lingvo. Tie superba virtuozece estas kunigita kun responda trasento tiel, ke la naciaj kaj eĉ individuaj voĉoj de la poetoj estas interpretitaj en mirinda grado.

(2.) Tradukoj el aliaj lingvoj

El la Hebrea kaj Juda:

El la Hebrea literaturo ni havas ĉefe la Biblion, kiu verdire estas pli ĝuste tuta libraro. La “Malnovan Testamenton” tradukis Zamenhof rekte el la Hebrea: lia teksto estis poste kontrolita de Brita biblia komitato. Krome aperis “Hebreaj Rakontoj” de *Ŝalom Aleĥem* (trad. Muĉnik, 1923), “Merkado la Azenpelisto” de *Naum Ĵeruŝalmi* (trad. L. Wiener, 1933), kaj la dramo “Dibuk”, de *An-Ski* (trad. Lejzerowicz, 1927).

El la Juda estas tradukitaj el *Ŝalom Aleĥem* “La Gimnaziano”, “Ĉe Doktoro” (1931), “Al Ĉiuj Egale” (1949); *Schalom Asch*, “La Sorĉistino el Kastilio” (trad. Lejzerowicz, 1933); *Mohseh Oved*, “Pro la Merito de la Tagoj”; *L. Molaĥ*, “Misisipi” (1939).

El la antikva Greka:

“La Iliado” (2 kantoj), trad. Kofman, 1895; “La Odiseo” (trad. Manders) kaj 31 poemoj en “Eterna Bukedo”, trad. Kalocsay.

El la Latina:

Eneido (trad. Vallienne); Amoro kaj Psiĥe (1910 kaj 1924) el La Ora Azeno de *Apulejus* kaj 9 poemoj en Eterna Bukedo.

El la Angla:

Tradukado el la Angla literaturo estas entute hazarda, neplanita. Unuan impulson donis Zamenhof mem, kiam en 1894 li liveris tradukon de "Hamleto" de *Shakespeare*. La traduko estis revelacio, kiu entuziasmigis la Esperantistojn kaj konvinkis ilin pri la grandaj literaturaj ebloj de la juna lingvo. La vojmontron de Zamenhof sekvis diversaj Anglaj tradukantoj, atakante aliajn dramojn de *Shakespeare* kun variaj rezultoj. Nia opinie neniuj ĝis nun egalas la poeziecon kaj dramforton de la Zamenhofa traduko. Plej bona estas verŝajne la "Songô de Someromeza Nokto" (trad. Louise Briggs, 1921), kiu rekaptis en bela grado la blankversan muzikon de la originalo (*A Midsummer Night's Dream*). Tre laŭdata estas ankaŭ la traduko de "La Venecia Komercisto" (*The Merchant of Venice*) de Wackrill (1914). Tamen oni konsideru ĝin nepre mal-supera al la "Songô". "Reĝo Lear", iom mikskvalita, ĉar ĝin faris du tradukantoj (Ashley kaj Curry), estas entute merithava kaj multloke potencefika. Aperis ankaŭ "Makbeto" (*Macbeth*) en 1908 kaj "Kiel Plaĉas al Vi" (*As you Like It*) en 1910. La eldonoj de tiuj du estas delonge elĉerpitaj, do ni ne povas juĝi ilian kvaliton. La tradukoj de *The Tempest* "La Ventego" (1904), kaj de "Julio Cezaro" (1906) ne estas tre taŭgaj. La tuta "Otelo" estas tradukita kaj aperos en la unua volumo de la pretiĝanta Angla Antologio.

Publikiĝis ankoraŭ jenaj kvar dramoj de *Shakespeare* en proza traduko de S. A. Andrew: "Antonio kaj Kleopatra", "Romeo kaj Julieta", "La Gajaj Edzinoj de Windsor", kaj "Trojlo kaj Kresida". Se ili estus kompletaj ili verŝajne valorus iom analoge al la Angla proza traduko de Pan Tadeusz, sed bedaŭrinde la tradukinto permesis al si cenzuri kelkajn lokojn en la teksto.

Aliaj dramoj, kiuj tradukiĝis, estas de *Oliver Gold-*

smith la komedio: “Ŝi Kliniĝas por Venki” (*She Stoops to Conquer*) kaj de *Oscar Wilde*: “Salome”.

Poemoj el la Angla aperis ĉefe dise en diversaj gazetoj, kaj ne troviĝas registro pri ili. En memstaraj eldonoj aperis: *Byron*: “Manfred”, “Kain”, “Ĉielo kaj Tero”, “Parizina”; *Tennyson*: “Gvinevero”, “In Memoriam”; *Macaulay*: “Horacio” (el Baladoj pri Antikva Romo); *Fitzgerald*: “Rubajtoj de Omar Kajjam”. En Eterna Bukedo troviĝas 27 poemoj el la Angla.

La supran mankon iom bonigos la 200 paĝoj da Anglaj poemoj en la Angla Antologio kaj 100 poem-paĝoj en la Skota volumo.

El la Angla prozo eldoniĝis: *Bunyan*: “La Progresado de la Pilgrimanto”; *Swift*: “Gulliver en Liliputlando”; *Defoe*: “Robinson Crusoe” (adaptita); *C. Brontë*: “Jane Eyre”; *Dickens*: “La Batalo de l’ Vivo”, “Vivo de Nia Sinjoro Jesuo”, “El la Londona Skizlibro”, “Kristnaska Sonorado”; *Stevenson*: “D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde”, “Diablot’ en la Botel’”; *Lewis Carroll*: “Alicio en Mirlando”; *Wiseman*: “Fabiola”; *Jerome K. Jerome*: “Tri Homoj en Boato”; *H. G. Wells*: “La Dormanto Vekiĝas”, “La Tempomaŝino”, “La Lando de la Blinduloj”; *R. Haggard*: “Luno de Izrael”, “Ŝi”; *Arnold Bennett*: “Ok Noveloj”; *G. K. Chesterton*: “La Naiveco de Pastro Brown”; *Agatha Christie*: “Murdo en la Orienta Ekspreso”; *F. W. Crofts*: “Morto de Trajno”; *Axel Munthe*: “La Romano de San Michele”; *Ruskin*: “La Reĝo de la Ora Rivero”.

De *Usonaj* aŭtoroj aperis: *E. A. Poe*: “Ses Noveloj de Mistero kaj Fantazio”, “La Puto kaj la Pendolo”; *Jack London*: “La Fera Kalkanumo”, “La Balenodento”, “La Forto de la Fortoj”, “Ĥinago”; *Upton Sinclair*: “Jimmie Higgins”, “Petrolo”; *Edna Ferber*: “Fanny”; *Michael Gold*: “Judoj sen Mono”; *H. W. van Loon*: “Rigardu la Teron”; *Edward Bellamy*: “Rigardante Malantaŭen”; *Hawthorne*: “La Serĉado

por la Ora Ŝablono", "La Granda Vizaĝo el Ŝtono"; *Irving*: "La Abatejo de Westminster", "El la Skizlibro", "Rip van Winkle".

La jenaj du sudafrikaj verkoj kompletigas la liston: "Romano pri Afrika Bieno" kaj "Undino", de *Olive Schreiner*.

El la Franca:

Zamenhof tradukis "Georgo Dandin" de *Molière*. Eble tio donis al la Francoj apartan stimulon ataki la verkojn de *Molière*. Aperis "Edziĝo Kontraŭvola" (*Le Mariage Forcé*), "L'Avarulo" (*L'Avaré*), trad. Meyer, 1904; "La Nobela Burĝo" (*Le Bourgeois Gentilhomme*), "Don Juan", trad. Boirac, 1906; "Malsanulo pro Imago" (*Le Malade Imaginaire*), trad. Velten, 1911; "Amfitriono" (*Amphytrion*), trad. Legrand, 1922, kaj "La Mizantropo" (*Le Misanthrope*), trad. Boucon, 1930.

Laŭ Prof. G. Waringhien kelkaj el la supraj tradukoj estas plibonigeblaj.

De *Racine* tradukiĝis "Ester" (*Esther*) kaj "Atali" (*Athalie*). Aliaj tradukitaj dramoj estas:

Beaumarchais: "La Barbiro de Sevilla" kaj "La Edziĝo de Figaro"; *De Musset*: "Ne ludetu kun la Amo" (*On ne badine pas avec l'amour*), "Fantazio", "La Kapricoj de Mariano"; *Tristan Bernard*: "Angla Lingvo sen profesoro" (*L'Anglais tel qu'on le Parle*); *Ch. Richet*: "Sokrato"; *J. Romains*: "D-ro Knock" (trad. P. Corret, 1932).

El Franca poezio malmulte eliris en libroformo. Estas notindaj "Elektitaj Fabeloj" de *La Fontaine* kaj 37 poemoj en "Eterna Bukedo".

En la proza fako aperis ĉefe la jenaj verkoj (ni preterlasas i.a. filozofiajn verkojn de *Descartes*, *Leibnitz* kaj *Voltaire*): *Bossuet*: "Funebra Parolado pri L. de Bourbono" (*Oration Funèbre de Pr. de Condé*); *Perrault*:

“Rakontoj de Feinoj” (*Contes de Fées*); *Rochefoucauld*: “Maksimoj”; *B. de St. Pierre*: “Paŭlo kaj Virginio” (trad. Hodler, 1905); *Lesage*: “Gil Blas de Santillana”; *Voltaire*: “Kandid” (*Candide*, trad. Lanti, 1929); *About*: “La Reĝo de la Montoj” (*Le Roi des Montagnes*); *Balzac*: “Eŭgenino Grandet”, “La Firmao de la Kato kiu Pilkludas” (*La Maison du Chat qui Pelote*, trad. Benoit, 1924), “La Vendetta”; *Châteaubriand*: “Aventuroj de l’lasta Abenceraĝo” (*Le Dernier Abencérage*); *Flaubert*: “La Legendo de S-ta Juliano Helpema” (*La Légende de St. Julien Hospitalier*); *A. Houssaye*: “La Reĝlando de l’Rozoj” (*Le Royaume des Roses*); *Victor Hugo*: “La Mizeruloj” (*Les Misérables*) I; *X. de Maistre*: “Vojaĝo Interne de mia Ĉambro” (*Voyage autour de ma Chambre*); *Mérimée*: “Karmen”, “Mateo Falkone k.a. Rakontoj”, “Kolomba”; *A. de Musset*: “La Du Amatinoj” (*Les Deux Maitresses*); “Mimi Pinson”; *P. de Musset*: “S-ro Vento kaj Sinjorino Pluvo” (*M. le Vent et Madame la Pluie*); *Porchat*: “Sub la Neĝo” (*Trois Mois Sous la Neige*); *Daudet*: “Leteroj el Mia Muelejo”; *Alexandre Dumas*: “Tri Rakontoj” el “Impresoj de Vojaĝoj”, “La Kolombo Premio”; *de Maupassant*: “Gas-tejo”, “La Normandaj Rakontoj” (trad. Dupuis, 1953); *Prévost*: “Manon Lescaut” (trad. Vallienne, 1908); *Dalsace*: “Fatala Ŝuldo” (trad. Gense, 1910).

El la Germana:

La Germana lingvo donis ĝis nun jenajn verkojn: *Goethe*: “La Gefratoj” (trad. Grabowski), “Ifigenio en Taŭrido” (trad. Zamenhof), “Faŭsto” (trad. Barthel-mess, 1923); “Hermano kaj Doroteo” (trad. Küster, 1911); “La Taglibro” kaj “Romaj Elegioj” (la du lastaj, en kuna volumo, trad. de Kalocsay, estas vera juvelo de la Esperanta literaturo); *Schiller*: “La Rabistoj” (trad. Zamenhof), “Wilhelm Tell” (trad. L. E. Meier, 1906), “La Nevo kiel Onklo”; *Hebbel*: “Gyges kaj lia Ringo” (versa tragedio, trad. Benne-

mann, 1916); "Maria Magdalena" (trad. Birschitzky, 1922); *Chamisso*: "La Mirinda Historio de Petro Schlemihl" (trad. Wüster, 1922); *Grimm*: "Elektitaj Fabeloj" (trad. Kabe); *Hauff*: "La Kantistino", "La Karavano", "La Almozulino de la 'Pont des Arts'"; *Heine*: "La Rabeno de Baĥaraĥ" (trad. Zamenhof), "Atta Troll", "Elektitaj Prozaĵoj"; *Grillparzer*: "La Monaĥejo ĉe Sendomir"; *Remarque*: "En Okcidento Nenio Nova", "La Vojo Returne" (trad. Berger, 1931); *Rilke*: "Leteroj al Juna Poeto"; *Ĵeluŝiĉ*: "Cezaro" (majstra traduko de I. Rotkviĉ); *D-ro H. Hoffmann*: "La Struvelpetro" (trad. Applebaum, 1921); *K. L. Immermann*: "Leŭtenanto kaj Fraŭlino" el "Epigonoj", "La Karnavalo kaj la Somnambulino"; *W. Kloeŭff*: "Vagabondo kaj Sinjorino" (trad. Goppel, 1933); *A. Latzko*: "Homoj en Milito"; *Lessing*: "Natan la Saĝulo" (trad. Minor, 1923); "Minna de Barnhelm"; *Muschler*: "La Nekonatino"; *Raabe*: "La Nigra Galero"; *Raimund*: "La Malŝparulo"; *Reitzel*: "Aventuroj de Malspertulo"; *Seidel*: "Vintro-fabeloj"; *Bertha von Suttner*: "For la Batalilojn!"; *Ernst Toller*: "La Hirundlibro"; *L. Vetter*: "La 13-a Mortis"; *Heinrich Ŵschokke*: "Aventuro en la Novjara Nokto"; *Stefan Ŵweig*: "La okuloj de la Eterna Frato", "La Brulanta Sekreto" k.a. rakontoj; *Ĵ. C. Heer*: "Ĉe la Sanktaj Akvoj"; *Theodor Storm*: "Imenlago", "Du Majstro-Noveloj"; En "Eterna Bukedo" troviĝas 20 poemoj el la Germana.

El la Itala:

Tiu donis ĝis nun malgrandan rikolton. La ĉefa verko estas la "Infero" de *Dante*, en traduko de Kalocsay. Tiu ĉi superba traduko superas eĉ la plej bonajn Anglajn, parte pro la baza malriĉeco de la Angla lingvo je inaj rimoj. Aperis du dramoj: *Goldoni*: "Kurioza okazaĵo" (trad. Mevo, 1932); *Ĵ. Giacosa*: "Ŝakludado".

Cetere estas notindaj: *Papini*: “La Floretoj de S-ta Francisko” (trad. Pizzi, 1926), “Historio de Kristo” (1931); *E. de Amicis*: “Koro”, “La Floro de l’Pasinto”, “Kverko kaj Floro”; *Collodi*: “Pinocchio”; *Ignazio Silone*: “Fontamara”; *Manzoni*: “La Gefianĉoj”; *Toscani*: “Rakontoj por Geknaboj”; *Verga*: “Kamparana Kavaliro” (*Cavalleria Rusticana*).

El la Rusa:

Puŝkin: “Eŭgeno Onegin” (trad. Nekrasov)—tre talenta traduko, aperinta en 1931, pri kiu oni rajtas fieri. Aliaj verkoj de Puŝkin, kiuj aperis en aparta eldono, estas: “Poltavo”, “Ŝtona Gasto”, “Ruslan kaj Ludmilo”, “Boris Godunov”, “La Kapitan-filino”, “Neĝa Blovado”, “Tri Noveloj”, “La Damo de Piko”; *Lermontov*: “La Demono”, “Novaj Versaĵoj” (92 paĝoj), “Rusaj Noveloj”, 1937; *Gogol*: “La Revizoro” (bonega traduko de Zamenhof); “Portreto”; *Turgenev*: “Kanto de Triumfanta Amo”, “Elektitaj Noveloj”, “Patroj kaj Filoj” (trad. Kabe, 1909), “Versaĵoj en Prozo” (trad. Kabe), “Stranga Historio”, “Anjo”, “Fantomoj”; *L. Tolstoj*: “Ĥodinka”, “Kristanismo kaj Patriotismo”, “Dio—unu por ĉiuj”, “Unu Animo en Ĉiuj”, “Unua Ŝtupo”, “Per kio Homoj estas Vivaj”; “Dio Vidas Veron, sed ne baldaŭ Diros”, “Du Maljunuloj”, “Kie Estas Amo, tie estas Dio”, “Sieĝo de Sebastopolo”, “Kaŭzaka Kaptito”, “Korneo Vasiljev”, “Tri Verkoj”, “Mia Onklino Tatiana Aleksandrova”, “La Konfeso”; *A. Tolstoj*: “Princo Serebrjanij”, “Aelita”, “La Morto de Danton”; *Korolenko*: “La Senlingvulo”, “Arbaro Bruas”, “La Sonĝo de Makaro” (trad. Ŝidlovskaja, 1922); *Furmanov*: “Ĉapajev”; *Isbaĥ*: “Kun Paŝilo kaj Libro”; *Bogdanov*: “Ruĝa Stelo”; *Drozdov*: “Krucumo”; *Novikov-Priboj*: “La Submarinistoj”; *Erdberg*: “Ĉinaj Noveloj”; *Majakovskij*: “Per Voĉo Plena” (Poemoj); *Bezimenski*: “Socialismo” (poemo); *Ĉeĥov*: “La Urso”,

“Mia Dialogo kun Poŝtestro”, “Du Rakontoj”; *Doroŝeviĉ*: “Orientaj Fabeloj”; *Gorkij*: “Kiel Mi Lernis”; *Sibirjak*: “Rusaj Rakontoj” (Fabeloj al Helenjo); kaj lastatempe eliris “Kiso de la Reĝino” de *I. F. Naĵivin*.

El la Nederlanda:

Vondel: “Gysbrecht van Aemstel” (trad. Isbrucker), “Josef en Dotan”; *v. Limburg Brouwer*: “Akbar” (trad. Isbrucker); *van Eeden*: “La Malgranda Johano” (trad. Bulthuis, 1926); *Szekely-Lulofs*: “Kulio”; *Thyssen*: “La Nevenkebla Ĝeno”; *Maria Koenen*: “La Sunkrono”; *A. M. de Jong*: “La Perfido”; *Ina Boudier-Bakker*: “Surprizoj” (trad. T. Flint, 1936); *Hildebrand*: “El la Camera Obscura” (trad. Mees, 1923); *Ulfers*: “Ostlorn” (trad. Wessel); *Rico Bulthuis*: “La Alia Pasinteco” (trad. Isbrucker-Dirksen); *Maurits Dekker*: “La Mondo ne havas Atendejon” (dramo, trad. Faulhaber); *Jef Last*: “La Hispana Tragedio”; *v.d. Broek*: “La Historio de Devi Argreŝi”, “Historio de Mok Miak”; *v.d. Hulst*: “Jaĉjo Holm kaj Liaj Amikoj”; *Ivans*: “La Viro el Francujo”; *Multatuli*: “Historio de Saidjah kaj Adinda”.

El la Hispana:

Benavente: “La Kreitaj Profetoj” (1932), “Hispanaj Dramoj”; “Angora Katino”; *Ibanez*: “Sango kaj Sablo”; *Ignotus*: “La Amo en la Jaro Dekmil”; *J. H. Rodo*: “Ariel”; *Cervantes*: “La Genia Kavaliro Don Kihoto de la Mancha” (kvar libretoj: ĉap. 1; 1.4.61; 22; 61–65), “Du Junaj Fraŭlinoj”, “Korneliino”; *Santiago de Ruysinol*: “La Patrino”, “La Ĉiama Kantaĵo”.

El la Portugala:

Camoes: “El la Luziadoj” (Eterna Bukedo); *Fernando Nery*: “Rui Barbosa”; *Fr. Candido Xavier*: “Antaŭ Du mil Jaroj”; *Alencar*: “La Vidvineto de José Martiniaro”.

El la Dana:

Andersen: “Fabeloj I, II, III” (trad. Zamenhof), “Bildolibro sen Bildoj”; *Bøgh-Høgsted*: “Pli ol Fantazio”, “Misteroj de l’Vivo” (novelkolektoj); *Hans Kirk*: “Taglaboristoj”; *H. Hertz*: “Jolanto” (dramo); *St. St. Blicher*: “Taglibro de Vilaĝ-Pedelo”, “La Pastro en Vejlbbye”.

El la Norvega:

Ibsen: “Peer Gynt” (trad. E. A. Haugen). Tiu ĉi talenta kaj klera traduko, per rimitaj versoj laŭ la originalo, estas gravega aldono al la Esperanta literaturo. De la sama aŭtoro: “Imperiestro kaj Galileano”, “Reaperantoj”; *Hamsun*: “Victoria”; *Björnson*: “Gaja Knabo”, “Synnøve Solbakken”; *Heyerdahl*: “Ekspedicio Kon-Tiki” (trad. Carsten Brynildsen); prozo el Danaj-Norvegaj aŭtoroj.

El la Finna:

Tiu donis nur kelkajn verkojn, sed tiuj estas tre atentindaj. Ili estas:

Alexis Kivi: “Sep Fratoj” (majstra romano), “La Botistoj” (kvinakta komedio), “La Fianĉiĝo” (komedio), “Lea” (teatraĵo); *J. Linnankoski*: “Batalo pri la Domo Heikkilä”.

El la Rumana:

Nur du pli gravaj verkoj, sed tiuj tre bone elektitaj. Ili estas:

Bratescu-Voinesti: “Niĉjo Mensogulo” (trad. Morariu, 1927); *Sadoveanu*: “Nobela Peko” (trad. Morariu, 1929).

El la Kroata:

Tiu donis belsente tradukitan poemaron de *Tadi-janoviĉ*: “Kanto al mia Koro” (trad. Josip Velebit); plue *Maĵuraniĉ*: “La Morto de Smail-Aga Ĉengijiĉ”

(heroa eposo); *A. Ŝenoa*: “La Trezoro de l’Oraĝisto” (romano); *D. Ŝimunoviĉ*: “Ano de l’Ringludo” (romano, trad. Janjiĉ, 1926); *M. Krleža*: “Adriatika Temo”.

La romanon “Cezaro” de la Kroato *Ĵeluŝiĉ* oni alkalkulas al la Germana literaturo.

El la Ĉina:

Pro la delonga maltrankvila stato de la lando, ĝi povis doni ĝis nun tre malmulton al la Esperanta literaturo. Ni notas:

Lu-Sin: “Elektitaj Noveloj”, “Sovaĝa Herbaro”; *M. Ĉ. Kuo*: “Ribelemaj Virinoj” (moderna dramo); *Li Tai Po*: sep poemoj en “Eterna Bukedo”; *Liu Beju*: “Por Nova Afero, Nova Maniero”, “La Plej Forta Voĉo de la Paco”, “Nova Tasko”, “Fajrolumo en la Fronto”.

El la Japanaj:

La plej grava eldono ĝis nun estas la kvinvoluma verko de etnologio, historio kaj mitologio “Kroniko Japanaj”. Krome aperis: *Simaki*: “Karcero”; *Ariŝima*: “Deklaracio”, “Senbedaŭre Amo Rabas”, “Japanaj Rakontoj”; *Hajime Ŝuzin*: “Fonto de Sudroj”, “Danco de Skeletoj”; *Karame Susuki*: “Nokto ĉe Landlimoj”; *Fusao Hajaŝi*: “Bildlibro sen Bildoj”; *Eisaburo Iŝihara*: “Verda Karto”; *Junzo Jamamoto*: “En la Nebulo”, “Infanmurdo”; *Kon Kihuĉi*: “Amo de Tooĵuuroo”, “La Patro Revenas”; *Kido Okamoto*: “Epizodo en Ŝuzenĵi”; *Naŝa Ŝija*: “Krimo de Fan”, “Morto de Paguro”; *Iŝikaŭa Tacuzo*: “Vivantaj Soldatoj”; *S. Tokunoga*: “Malsato en Riĉa Rikolto”.

La volumo “Verda Parnaso” (130 paĝoj) prezentas elekton el la japanaj poezio. Krome la “Eterna Bukedo” de Kalocsay enhavas 44 poemojn el la japanaj lingvo. La japanaj versformoj havis dum la lastaj 20 jaroj klaran influon je la Esperantaj poetoj.

Sciencajn traktatojn el la Japana, kiel ankaŭ religiajn librojn el la Ĉina, Japana kaj Sanskrita, ni preterlasas.

* * *

Por kompletigi, ni menciuj kelkajn gravajn verkojn el la mondliteraturo, kiuj ekzistas en manuskripto. Tiaj estas verŝajne sufiĉe multnombraj; pri ili estas malfacile informiĝi precize. Ekzistas "La Floroj de l' Malbono" (*Les Fleurs du Mal*) de *Baudelaire*, en traduko de Kalocsay kaj Waringhien, kiu prezentas evoluon de la Esperanta poezia lingvo eĉ super la Infero-traduko. Preta estas la manuskripto por la dua volumo de la *Sveda Antologio*. Tradukitaj estas la "Dekameron" de *Boccaccio* (G. Waringhien), "La Fratoj Karamazov" de *Dostojevski*, kaj "Milito kaj Paco" de *Tolstoj*. Ankaŭ pretas tradukoj de "Le Cid" de *Corneille*, "La Mildigo de la Megero" (*The Taming of the Shrew*) de *Shakespeare*.

La klasika Ĉeĥa vers-satiro "La Bapto de Sankta Vladimiro", de *Havliček*, estas ĵus eldonita en brila traduko de Tomáš Pumpr.

Finante, ni menciuj kelkajn ciferojn pri la kresko de la Esperanta literaturo. Laŭ la enketo, farita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, la nombro de la Esperantaj libroj kreskis jene:

En la jaro 1889	ekzistis	29	libroj	en	Esperanto
En la jaro 1894	„	88	„	„	„
En la jaro 1899	„	123	„	„	„
En la jaro 1904	„	211	„	„	„
En la jaro 1909	„	1330	„	„	„
En la jaro 1928	„	3200	„	„	„

En la jaro 1946 la plej granda kaj la plej bone organizita Esperanto-Biblioteko en la mondo, tiu de Brita Esperantista Asocio en Londono, havis entute

28.060 registritajn diversajn publikaĵojn. En tiu ĉi cifero estas inkluzivitaj la kompletoj de 300 Esperantaj gazetoj kaj revuoj (sciencaj, literaturaj, fakaj k.a.), kiel ankaŭ diversaj lernolibroj kaj vortaroj.

La “Bibliografio de Esperanto-Eldonaĵoj”, kiun faris la kunlaboranto de CED W. Auld, montras, ke inter Majo 1945 kaj la 1-a de Jan. 1953 estas entute publikigitaj 558 diversaj libroj kaj broŝuroj, ne kalkulante la kompletojn de gazetoj kaj revuoj.

W. Auld nun ellaboras por CED la bibliografion pri la jaro 1953 kaj pri la periodo 1929 ĝis 1945, tiel ke baldaŭ, kune kun tiu de Petro Stojan, oni havos kompletan bibliografion de ĉio publikigita en la Internacia Lingvo.

Oni devas ne forgesi, ke la merkato de la Esperanta libro estas esence internacia kaj ke tial la disvendiĝo estas tre ĝenata en la postmilitaj jaroj de diversaj valutaj kaj aliaj malfacilaĵoj, kiuj malebligas aŭ malhelpas la sendon de mono de unu lando al alia.

V

SCIENCA, FAKA KAJ POPULARSCIENCA LITERATURO

A. La lingva problemo en la scienco

KVANKAM la demando de komuna lingvo estas tre aktuala en ĉiuj sferoj de la internacia vivo, tamen la lingva problemo havas specialan signifon sur la kampo de la scienco.

Ĉi tie ĝi montras plurajn aspektojn:

(1) La sciencaj esploroj en kiu ajn branĉo de la scienco estas malhelpataj kaj ofte eĉ malebligataj pro manko de komuna lingvo kaj pro la neebleco regi kontentige multajn naciajn lingvojn. Sciencaj esploroj, precipe de sciencistoj apartenantaj al malgrandaj nacioj, restas tute nekonataj kaj, sekve, neutiligeblaj de alilandaj scienculoj. Eĉ se oni kelkfoje sukcesas venki tiun malfacilaĵon, tio estas ĉiam ligita kun grandega tempoperdo kaj kun altaj elspezoj. La perdoj, kiujn devas suferi la scienco pro tiu fakto estas vere nemezureblaj.

(2) La personaj kontaktoj inter la sciencistoj de diversaj landoj estas treege limigitaj. Tio ne nur ĝenas la interŝanĝadon de spertoj, la liberan diskutadon pri sciencaj problemoj kaj la rapidan diskonigon de la sciencaj akiraĵoj, sed tio samtempe prezentas ankaŭ gravegan obstaklon al la kreo de internacia solidareco inter la sciencistoj. Sufiĉas ĉeesti unu solan internacian sciencon kongreson, por ke tiu ĉi bedaŭrinda vero fariĝu plene evidenta. La situacio hodiaŭ estas tia, ke dum gravaj internaciaj renkontiĝoj senĝene evoluigas siajn pensojn nur tiuj sciencistoj, kies gepatraj lingvoj estas la oficialaj, dum la aliaj limigas sin al pasiva aŭskultado kaj ne malofte ili eĉ ne komprenas tion, kio estas dirata. Pro ĉio ĉi vere

viglaĵ kaj larĝaj intelektaj interŝanĝoj forestas en internaciaj kadroj.

(3) La popularigo de la sciencaj akiraĵoj estas malhelpata kaj ne malofte malebligita. Pro la ĉiam pli kaj pli granda specialiĝo de la diversaj sciencaj branĉoj, nur la sciencaj rezultoj, kiuj havas almenaŭ relative ĝeneralan intereson, povas esti publikigitaj en presita formo. Kaj ankaŭ en tiu okazo ĝi povas efektiviĝi nur en la plej gravaj naciaj lingvoj, kiaj estas la Angla, la Franca, la Hispana, la Germana, la Japana, la Ĉina, la Rusa kaj eble iu alia. En la aliaj lingvoj—pro manko de sufiĉa nombro da legantoj specialistoj—tio ne estas ebla. Sed eĉ en la tiel nomataj grandaj lingvoj la publikigo de tre specialaj studoj estas malfacila, tre multekosta kaj kelkfoje tute neebla. Pro tio la diskonigo de la sciencaj akiraĵoj kaj ilia popularigo en pli larĝaj sciencaj tavoloj, por ne paroli pri la amasoj, estas haltigitaj.

Estis tempo, kiam verko de scienculo el kiu ajn lando estis legata de kolegoj en ĉiuj aliaj landoj; kiam ĉiu profesoro povis en la sama lingvo, la Latina, prelegi antaŭ studentoj de kiu ajn universitato tiam ekzistanta. Tiu tempo jam delonge forpasis kaj la scienco baraktas kun grandegaj malfacilaĵoj pro la manko de komuna lingvo.

B. La valoro de Esperanto por la scienco

Tiu bedaŭrinda stato skuis la konsciencojn de sciencistoj kaj diversaj sciencaj medioj ekinteresiĝis en la lasta tempo pri la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo.

Jam en la jaro 1924 oni diskutis la demandon en la Franca *Académie des Sciences*. La rezulto estis, ke 40 membroj de la Akademio, inter kiuj E. Borel, Cotton (Nobelpremiito), Sébert, kiuj mem bone sciis Esperanton, akceptis rezolucion favore al la Internacia

Lingvo. En la rezolucio ili akcentis sian konvinkon, ke la Internacia Lingvo Esperanto, praktike akceptita en la internaciaj rilatoj, “havas grandegajn konsekvencojn el la vidpunkto de la progreso de la scienco kaj de ĝia aplikado”. Tial ili esprimis la deziron, ke tiu ĉi lingvo—“majstroverko de logikeco kaj simpleco”, kiel ili nomis Esperanton en la rezolucio—estu enkondukita en la oficialajn programojn de la sciencaj klasoj almenaŭ kiel nedeviga objekto.

En la jaro 1937 okazis en Parizo, de la 14a ĝis la 17a de majo, granda konferenco “Esperanto en la Moderna Vivo”. Unu el la sekcioj de la konferenco, sub la prezidado de A. Cotton, tiama vicprezidanto de la Franca *Académie des Sciences*, aparte okupiĝis pri la rolo de Esperanto en la scienco. La kunsidoj de la sekcio prezentis la unuan grandan renkontiĝon de sciencistoj el diversaj landoj, dum kiu estis uzata unu sola, vere internacia lingvo.

Post la milito la Japania Scienca Konsilantaro (*Science Council of Japan*) akceptis la 28an de aprilo 1950 gravan rezolucion en kiu, interalie, estis dirite:

“La sciencistoj deziras, ke iliaj studoj estu konataj egale en ĉiuj partoj de la mondo kaj, same tiel, ke la studoj faritaj en ĉiuj partoj de la mondo estu konigitaj al ili. Sen tio ni ne povas atendi veran evoluon de la scienco.”

Samtempe pluraj Japanaj sciencistoj iniciatis kampanjon, por ke Japanaj sciencistoj de diversaj branĉoj publikigu siajn verkojn kaj disertaciojn en Esperanto. La ĉefaj iniciatintoj de tiu kampanjo estis D-ro F. Egami, profesoro de la Nagoya-Universitato, D-ro M. Hukuhara, profesoro de la Tokio-Universitato, D-ro T. Kuwahara, membro de la *Science Council of Japan*, D-ro E. Minami, profesoro de la Tokio-Universitato, D-ro S. Miyahara, profesoro de la Hokkaido-Universitato, D-ro M. Nagumo, profesoro de la Osaka-

Universitato, D-ro H. Oka, profesoro de la Tokio-Universitato, D-ro M. Suzuki, profesoro de la Tiba-Universitato, Ing. H. Tamaki, membro de la Scienca Esplora Instituto kaj D-ro H. Yagi, profesoro de la Okayama-Universitato. Laŭ ilia iniciato ĝis aŭgusto 1950 85 Japanaj sciencistoj, el kio 68 universitataj profesoroj, subskribis specialan promeson, laŭ kiu ili devigas sin publikigi en Esperanto almenaŭ unu el la disertacioj, kiujn ili verkos en ĉiu jaro, kaj aldoni Esperantlingvan resumon al ĉiu traktato verkata en alia lingvo.

En la “promeso” la subskribintoj akcentas:

“La sciencaj esploroj devas ne esti izolitaj al unuopaj landoj kaj iliaj rezultatoj devas ne esti akaparitaj de unuj laboratorioj aŭ individuaj esplorantoj. Scienco estas komuna klopodo de la homoj por fari sin estuloj vere meritaj de la nomo ‘homo sapiens’. . . . La subskribintoj agnoskas, ke la enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo por internacia publikigo de sciencaj laboroj estas tre efika rimedo por plisolidarigo de la internacia kunlaboro de la sciencistoj.”

Pri la ĝisnunaj spertoj de la Japanaj sciencistoj, kiuj publikigis siajn verkojn en Esperanto, la dokumento diras:

“Kelkaj el ni jam delonge tion . . . praktikas; kaj kvankam niaj verkoj en Esperanto estis publikigitaj nur individue kaj hazarde, tamen ĉoj el eksterlando ne estis malgrandaj. Estas antaŭvideble, ke ni vekos multe pli grandan ĉhon, se ni agos sisteme kaj kolektive. Al la Eŭropaj kaj Amerikaj sciencistoj estas preskaŭ nebezzone speciale lerni Esperanton por legi Esperantajn traktatojn. . . . Ni estas certaj, ke niajn ekzemplojn baldaŭ sekvos alilandaj kolegoj kaj tio malfermos la vojon al plifaciligado de la internacia kunlaborado de la sciencistoj.”

Baldaŭ, en majo 1951, alvenis ankaŭ rezolucio de Ĉinaj sciencistoj. Dudek profesoroj de diversaj Ĉinaj universitatoj publikigis en Esperanto rezolucion en kiu, interalie, ili skribas:

“La sciencistoj, kiuj malfeliĉe parolas aliajn lingvojn kaj kiuj deziras tamen ion krei en siaj propraj sferoj, devas eluzi

pli ol duonon de sia vivtempo por ellerni 4 aŭ 5 fremdajn lingvojn, ĉar alie ili ne povas digesti la konojn jam ekzistantajn, des malpli fari ian indan kontribuon. Tia tro konsumo de tempo kaj de energio estas vere nekompensebla perdedo de la scienco. Ni volas adopti la simplan, facile lerneblan Lingvon Internacian, Esperanto, kiel la sciencon lingvon por internacia uzado kaj por publikigi niajn verkojn en ĝi.”

Ankaŭ en Eŭropo sciencistoj-esperantistoj kunvenis en du gravaj konferencoj, en Parizo 1950 kaj en Munkeno 1951, por esplori la teknikan flankon kaj la spiritan-moralan aspekton de la lingva problemo en la scienco. Tiuj konferencoj, kiujn partoprenis pli ol 100 sciencistoj el diversaj landoj, akceptis plurajn decidojn koncerne la pluan utiligon de Esperanto por sciencaj celoj. En la Alvoko de la Munkena Konferenco estas, interalie, dirite:

“Ni povis konstati, verkante mem en tiu lingvo, ĝian plenan taŭgecon tute aparte por sciencaj celoj. . . . Ni opinias, ke la Internacia Lingvo, pruvita praktike en sia pli ol 60-jara ekzistado, meritas seriozan konsideron fare de la scienco.”

Tiun Alvokon subskribis, en la nomo de la konferenco, ĝiaj prezidantoj, inter kiuj D-ro G. Canuto, profesoro kaj rektoro de la Universitato en Parma (Italujo), D-ro I. Lapenna, eksprofesoro de la Universitato en Zagreb (Jugoslavio) kaj membro de la *Académie Internationale Libre des Sciences et des Lettres* (Paris), D-ro E. Privat, profesoro en la Universitato de Neuchâtel (Svislando) kaj D-ro H. Sirk, profesoro en la Universitato de Wien (Aŭstrujo).

La supraj opinioj, kompreneble, ne estas rezulto de nur teoria studado de Esperanto kaj de ĝia valoro por la scienco, sed ili multe pli baziĝis sur la praktike pruvita taŭgeco de Esperanto por sciencaj celoj.*

* Ĉiuj dokumentoj cititaj en tiu ĉi parto troviĝas en la arĥivo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de Universala Esperanto-Asocio.

C. Praktika aplikado

Jam antaŭ la unua mondmilito estis publikigitaj en Esperanto kelkaj sciencaj verkoj, disertacioj kaj studoj. Inter la du militoj kaj precipe post la dua mondmilito regule estis kaj estas publikigataj sciencaj verkoj en Esperanto. Aparte menciindaj estas la laboraĵoj en Esperanto de la Japanaj sciencistoj kiuj, ek de la jaro 1947 ĝis hodiaŭ, publikigis plurajn dekojn da diversaj verkoj, studoj kaj disertacioj en Esperanto precipe el la kemio, fiziko, matematiko, geologio.

Estas interese rimarkigi, ke kelkaj sciencaj verkoj aperis kun la oficiala subteno de registaroj. Tiel, ekzemple, Brazilo daŭrigis la eldonadon de la impona verko "Statistika resumo pri Brazilo", kaj post la milito aperis nova kajero de 256 grandformataj paĝoj en la lingvoj Portugala, Esperanta kaj Angla.

Ne estas eble mencii ĉi tie eĉ parteton de ĉiuj sciencaj aŭ popularsciencaj verkoj aperintaj ĝis nun en Esperanto. Tamen, por doni nur palan bildon pri la diversflankeco de la Esperanta scienca aŭ popularscienca literaturo, ĉi tie estas menciitaj nur kelkaj tradukaj kaj originalaj verkoj el ĉiuj branĉoj de la scienco kaj filozofio.

(1) Tradukitaj verkoj.

Leibnitz: Monadologio; *Descartes*: Parolado pri la metodo; *Renan*: La vivo de Jesuo; *Mazzini*: Devoj de la homo; *Pellico*: Pri la devoj de l'homoj; *J. Novak*: Jan Amos Komensky; *P. Bovet*: Psikanalizo kaj edukado; *A. Mills*: Penspotenco; *Moch*: Historio resuma de l'arbitracio konstanta; *Dicommun*: Fundamentoj de l'pacifismo; *Carnegie*: Por arbitracio; *D'Estrournelles de Constant*: Limigo de l' armadoj; *Fried*: Problemo de l' malarmo; *Laisney kaj Moch*: Por la dua Haga konferenco; *Richet*: Paco kaj milito; *Umfrid*: Formulo pri malarmo; *Angell N.*: Moralaj

kaŭzoj de la militoj; *Lochner*: Neŭtrala konferenco por daŭra pacperado; *Hyde*: Internacia parlamento; Kontrakto de la Ligo de Nacioj; *Coudenhove-Kalergi*: Paneŭropa manifesto; *Kant*: Al eterna paco; *Marks-Engels*: La komunista manifesto; *Liebkehnicht*: Por ataki kaj por defendi; *Lassalle*: Pri la esenco de konstitucio; *Kropotkin*: La salajro; Etiko; *Honnorat*: La sendanĝereco de Francujo; *Nitti*: Eŭropo ĉe la abismo; Paco; *Lenin*: Ŝtato kaj revolucio; *Mendelejev*: Provo de kemia kompreno de l' monda etero; *Helte*: Pri la teorio de l' jonoj; *Le Monnier*: Evolucio de evoluciismo; *Nordmann*: Metamorfozoj de la steloj; *Laisant*: Inicado matematika; *Reiche*: El la mondbildo de l' nova fiziko; *Fersman*: La kemio de l' Universo; La vojo al scienco de estonto; *Keith A.*: Pri la origino de l' homo; *Dardel*: La tekniko de la termala kuracado; *Thiroux*: Raporto hidrologia; *Bauer*: Nova terapio de diabeto; *Good*: Higieno kaj moralo; *Burwinkel*: La kormalsanoj; *Swiecicki*: Pri estetiko en medicino; *Murata Masataka*: La plej simpla metodo por serodiagnozo de sifiliso; *Ohshima Hiroshi*: Pri la maturiĝo kaj fekundiĝo; *Ogata Tomosaburo*: Pri la stato de inkubacio; *Ogata Tomosaburo*, *Shintaro*, *Kawakita Susumu Suzuki*, *Shigeru Kago-shima*: Pri la rizmalsano de birdoj—Pri la kvanto de vitamino B rezervita en organoj ĉe beribero (du volumoj); *Maeda kaj Yamane*: La konsisto de magnezioksiklorida cemento; *Hayashi kaj Tamura*: Farmakologia praktiko; *Wates, G. F.*: De tutmonda perforto al tutmonda frateco; *Folke Bernadotte*: La fino; *Thirring*: Mondpaco kiel psikologia problemoj; *Gille*: Skizo pri filozofio de la homa digno; *Zinnoo Sjootoo Ki* (Japana historio); *Minkov*: La alia Ameriko; *J. F. Horrabin*: Skizo de ekonomia geografio; *Rostand*: La nuna stato de l'evoluiismo; *Bento de Jesus Caraca*: Galileo Galilei (Scienca kaj Morala Valoroj de Lia Verko); *A. P. Andersen*: Pri bredado de abeloj; *Prof. A. da Silva*: La Araneoj; *Piccard* en la Stratosfero; *Prof. D-ro H.*

Nothnagel: La Mortado; *R. Vanbšéry*: Kriminologio; *D-ro Emile Javal*: Inter Blinduloj (konsiloj por uzado de ĵusblindiĝintoj); *K. Wlostowski kaj W. Dobrowolski*: Surdmutuloj pri si mem; *D-ro O. F. de Battaglia*: La mistero de l' sango; *Frank Booth*: Arboj de la arbaro kaj kampo; *Gaumont*: Kontoro ĝenerala de fotografado; *Huttig*: Foto; Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj; Aŭstralio—lando kaj popolo; Kroniko Japana; Faktoj pri Danlando; Faktoj pri Norvegujo.

(2) Originalaj verkoj.

K. A. Ars: Eco de la logika pensado; *N. Kolovrat*: Teorio pri evolucio de kono; *Boirac*: Pri la homa radiado; *Baudouin*: La arto de memdisciplino; *Ziegler*: Sekspsikologio; *Vallienne*: Evolucio de la religia ideo; *Moch*: Pri malarmo; *Klingenberg*: La pacparlamento; *Brossier*: La Paco; *Hodler*: La pacproblemo; *Fricke*: Batalantoj por homara paco; *Levy*: Nuna stato de bimetalismo; *Bragajota*: Federacio interregna; *Fujisava*: Pri historia evoluado; *Nekrasov*: Patri-ideo en la nuna rusa poezio; *Bricard*: Matematika terminaro; *Dom-browski*: Pri novaj trigonometriaj sistemoj; *De Saussure*: Geometrio folietara; *Vörös*: Analitika geometrio absoluta; Elementoj de la geometrio absoluta; *Bujwid*: Kvin prelegoj pri bakterioj; *Wüster*: Fizikaj grandoj kaj iliaj unuoj; *Oishi*: Raporto de la aerologia observatorio de Tateno apud Tutiura, Japanujo (1926–1929); *Muravkin*: La mondbildo de l' nova fiziko; *Collinson*: La homa lingvo; *Nippa*: Simpla metodo de la agronomia profitkalkulado; *Krestanov*: Bulgara lando kaj popolo; *Aisberg*: Fine! Nun mi komprenas la radion! (tradukita ĝis nun en 18 naciaj lingvoj); *Privat*: Interpopola konduto; Vivo de Zamenhof; Historio de la lingvo Esperanto; *Lapenna*: Retoriko, kun aparta konsidero al Esperanta parolarto; Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo; *Glück*: La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo; *Manders*: Inter-

lingvistiko kaj Esperantologio; *Waringhien*: Leteroj de L. L. Zamenhof; *Björn-Collinder*: La problemo de Internacia Lingvo; *Drezen*: Historio de la mondlingvo; *Stojan*: Bibliografio de Internacia Lingvo; *Ŝirjaev*, *Kökény*, *Bleier*: Enciklopedio de Esperanto (du volumoj); *Lanti kaj Ivon*: Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetunio?; *Thézard*: Polusaj glacioj sub noktomeza suno; *Isbrucker*: La evoluo de la telefonio; *Nordenstreng*: La Homaj rasoj de la Mondo; *Haefker*: Jarmiloj Pasas, historio de la mondo; Somera Universitato (Kolekto de prelegoj, faritaj en la ISU, Malmö); *Reiersøl*: Diferencialaj ekvacioj de specimenaraj distribuoj; *Jukito Ota*: Malhelpa afiniteco de benzedrino-derivaĵoj al animo-oksidado; *Masuo Hukuhara*: Pri singula punkto de la ordinara diferenciala ekvacio de unua ordo; Pri la evoluado de solvo de diferencialaj ekvacioj en la ĉirkaŭaĵo de ilia singula punkto; *Tokui Sato*: Pri etendo de la teoremo de Carleman-Hukuhara rilate al asimptotaj serioj; Pri fikspunkta teoremo; Pri la limo de funkci-sekvaĵoj; *M. Nagumo*: Rimarkoj pri fikspunkta teoremo en funkcialaj spacoj; *Secumi Miyamura*: Tertrema movado kaj kvalito de grundo ĉirkaŭ la urbeto de Gobo, Wakayama prefektejo; *Kei Yosida* kaj *Syohei Miyahara*: Pri la teorio alojteorimaniera de feromagnetismo; *Syohei Miyahara*: Pri la teorio de kolektivaj elektronoj de feromagnetismo; Historio de Yukawa Teorio; *Ernest Dodge*: Flugado Alimonden; *Florence Barker*: La lingvo de la bestoj; *A. Carles*: Kurludo de Toroj; *H. W. Southcombe*: Tutmondaj Fajro-kutimoj; *Paul Neergaard*: Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredo kaj raso; Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj; *Pastro J. Bianchini*: Hebrea kalendaro kiun uzadis la Izraelidoj dum la jarcento de Jesuo Kristo; *Jakob Rosenberg*: Multiplika tabelaro; *Hermann Wagner*: Internacia logaritmo-tabelaro; *Karlo-Verks*: Elementa fotografa optiko; *Hideo Yagi*: Medicina krestomatio.

Konsiderinda nombro da disertacioj kaj studoj aperis en sciencaj, teknikaj kaj fakaj revuoj. Inter tiuj estas menciindaj: Internacia Scienca Revuo, nun aperanta kiel Scienca Revuo (1904-); Scienca Gazeto (1912-1914); Teknika Revuo (1918-1919); Bulteno de la aerologia observatorio (1927—neregule aperanta); Internacia Medicina Revuo, nun aperanta kiel Medicina Revuo (1923-); Fotorevuo (1906-1909); Internacia Radio Revuo (1926-1929); Bulteno de la Internacia Laboroficejo (1923-1928); La Fervojisto (1923-1928); Internacia Pedagogia Revuo (1908-1922); Tutmonda Esperantista Pedagogia Servo (1925-1928); Internacia Socia Revuo, Sennacieca Revuo (1921-); Esperantologio (1949-); Scienco kaj Tekniko (1947-); Scienca Ligilo (1947-) kaj aliaj.

Estas rimarkinde, ke pluraj sciencistoj aldonas al siaj nacilingvaj verkoj mallongajn resumojn en Esperanto. Ankaŭ kelkaj nacilingvaj sciencaj revuoj, ekzemple "Progress of Theoretical Physics" en Japanujo, aŭ "Acta Orthopaedica Belgica" en Belgujo, aperigas resumojn en la Internacia Lingvo. Jam hodiaŭ ekzistas kelkaj centoj da Esperantlingvaj resumoj de nacilingve skribitaj verkoj, disertacioj kaj studoj.

Tre grava institucio por popularigo de la scienco pere de Esperanto estas la Internacia Somera Universitato, kies aktiveco estas priskribita aliloke. Ĉi tie estas menciinde, ke ĝis nun okazis ses serioj da prelegoj de universitataj profesoroj kaj aliaj fakuloj kaj ke tiujn prelegojn ĉeestis entute proksimume 20,000 aŭskultantoj.

Por la evoluigo de la Esperantlingva scienca literaturo unuarangan signifon havas la fakvortaroj. Pro ilia graveco, al tiu ĉi punkto estas dediĉita aparta ĉapitro.

VI

FAKAJ VORTAROJ KAJ TERMINAROJ EN ESPERANTO

GRAVAN parton de la porlingva aktiveco jam frue okupis la kreo de fakaj vortaroj kaj terminaroj en Esperanto. Sub tio oni komprenas vortarojn kaj terminarojn pri diversaj branĉoj ne nur de la scienco kaj tekniko, sed ankaŭ de diversaj metioj kaj aliaj specialaj homaj aktivecoj, ekzemple la sporto, ludoj k.a.

Estas jam prezentita la internacia karaktero de Esperanto. Pro tiu sia karaktero, Esperanto aŭtomate akceptas ĉiujn internaciajn radikojn, jam kreitajn en diversaj branĉoj de la scienco kaj tekniko. Unu el la 16 reguloj de la Internacia Lingvo, la regulo 15-a, tekstas laŭ la teksto en la rusa eldono de 1887:

Fremdvortoj, tio estas tiuj vortoj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fremda fonto, estas uzataj en la Internacia Lingvo senŝanĝe, akceptante nur la internacian ortografion. Sed ĉe diversaj vortoj, kiuj havas komunan radikon, estas pli bone uzi senŝanĝe nur la elementan vorton kaj la aliajn formi laŭ la reguloj de la Internacia Lingvo.

El tio rezultas, ke granda nombro da fakaj esprimoj povas eniri sen iaj specialaj malfacilaĵoj la fakan vortaron aŭ terminaron. Se la sama esprimo estas uzata en pluraj lingvoj, sed kun nuancaj diferencoj en la senco, oni kutime elektas la plej taŭgan elementon kaj difinas la sencon.

La menciita 15-a regulo de la Fundamento de Esperanto, kvankam genia en sia simpleco, tamen ne povas komplete solvi la problemon de fakaj vortaroj kaj terminaroj en la Internacia Lingvo. Se ĉiuj sciencaj kaj teknikaj esprimoj estus vere internaciaj, la afero fakte estus simpla. Sed bedaŭrinde, kvankam granda

parto de tiuj esprimoj estas internaciaj, tamen sufiĉe granda nombro ne havas tian karakteron. Aliflanke oni devas ne forgesi, ke kelkfoje esprimo internacia laŭ la formo ne havas la saman internaciecon laŭ la enhavo. Ekzemple la vortoj “biliono”, “triliono” k.t.p. estas internaciaj, sed ili ne havas la saman signifon en ĉiuj lingvoj, eĉ ne en la Brita kaj Amerika branĉoj de la Angla lingvo. En New York kaj Parizo unu biliono estas mil milionoj, sed en Londono, Berlino, Stokholmo, Moskvo, Romo kaj en Buenos Aires ĝi estas miliono da milionoj. En zoologio, ĥemio, farmakologio kaj en aliaj branĉoj de la scienco kaj tekniko ne malofte okazas, ke la sama objekto estas nomata per diversaj latinaj vortoj. Laŭ E. Wüster oni uzas 7 diversajn latinajn nomojn por la hidratoj de etila alkoholo. Laŭ Profesoro Mario A. Pei de la Columbia Universitato, kiu publikigis rimarkindan artikolon pri la problemo (“*An Interlanguage for Science*”) en *American Esperanto Magazine* (Majo-Aŭgusto 1947), por iuj ĥemiaj komponaĵoj la Angloj uzas la sufikson “-ide” (*chloride, sulphide, iodide*) dum la Italoj uzas la sufikson “-uro” (*cloruro, solfuro, ioduro*).

Tiu ĉi fakto, por kiu estas donitaj nur kelkaj ekzemploj, treege komplikas kaj malfaciligas la laboron je verkado de fakaj vortaroj kaj terminaroj en la Internacia Lingvo. La problemo, kiel oni vidas, estas ligita al la problemo de internacia unuecigo de la terminologio. Por solvi tiun lastan, famaj specialistoj kiel Prof. A. Cotton (iama membro de la Franca Akademio de Sciencoj), E. Drezen (iama membro de la komisiono pri Teknikaj Terminologioj de la Akademio de Sciencoj de Sovetunio) kaj D-ro Ing. E. Wüster (membro de la Germana Komitato pri standardizo) proponis, ke Esperanto estu uzata kiel kodo-lingvo por la normigo de la teknikaj terminologioj.

En sia grava raporto “Interlingual Scientific and

Technical Dictionaries'' (Unesco/NS/SL/1) ankaŭ D-ro J. E. Holmstrom rekomendas Esperanton kiel pontlingvon por tiu celo.

La grandega laboro jam farita kaj farata sur la kampo de Esperantlingvaj vortaroj kaj terminaroj havas unuarangan signifon, kiel oni vidas, ne nur por la riĉigo mem de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ por la normigo de la teknikaj kaj fakaj lingvoj ĝenerale.

La alia grava problemo, kiun devis fronti kaj solvi la Esperanto-movado sur tiu kampo, estis la financa problemo. Ne sufiĉis nur verki teknikajn aŭ alian fakajn vortaron aŭ terminaron, sed oni devis trovi ankaŭ la necesajn financajn rimedojn por ĝin eldoni. Tiuj konsiderindaj financaj rimedoj ne venis ekstere. Neniu subvenciis tiun laboron. Estis denove nur la Esperantistoj kaj la Esperanto-organizaĵoj, kiuj ebligis la publikigon per aĉeto de la verkoj.

Doktoro William Solzbacher publikigis en New York en la jaro 1949 detalan studon sub la titolo *Technical Vocabularies in Esperanto*. Laŭ tiu studo ekzistis en Esperanto 106 presitaj fakaj vortaroj kaj terminaroj por 43 diversaj branĉoj de la scienco, filozofio, tekniko, metioj kaj aliaj specialaj kampoj. Inter la aliaj, ekzistas fakaj vortaroj kaj terminaroj pri anatomio, arĥitekturo, armeo, aviado, botaniko, ĥemio, komerco, edukado, elektrotekniko, juro, maŝinoj, matematiko, medicino, mekaniko, muziko, navigacio, ornitologio, farmacio, filatelo, filozofio, fotografado, fiziko, fitopatologio, telekomunikadoj, psikologio, radio, religio, scienco (ĝenerale), statistiko, teknologio, transportoj, zoologio. Kelkaj branĉoj, ekzemple la komerco, juro k.a. posedas plurajn fakajn vortarojn kaj terminarojn.

La menciitaj 106 vortaroj kaj terminaroj estis presitaj en 19 diversaj landoj. El ili 5 havas po pli ol 300 paĝoj, 8 havas po 200-300 paĝoj, 12 havas 100-200

paĝojn, 7 havas 75-100 paĝojn, dum la aliaj havas malpli ol 75 paĝojn.

Kelkaj el la vortaroj kaj terminaroj havas difinojn nur en Esperanto, dum la aliaj enhavas ankaŭ tradukojn en la lingvoj Latina, Angla, Franca, Hispana, Germana, Rusa, Portugala, Itala, Nederlanda, Dana, Sveda, Norvega, Finna, Ĉeĥa, Pola aŭ Japana. Kelkaj el la vortaroj havas plurlingvajn tradukojn, dum aliaj havas tradukojn nur en unu nacia lingvo.

Estas menciinde, ke ĉiu el la grandaj ĝeneralaj vortaroj de Esperanto enhavas ankaŭ konsiderindan nombron da teknikaj terminoj. Tiele la vortaro de Millidge estas aparte bona por la nomoj de plantoj kaj bestoj; tiu de Wüster por la maŝinoj, matematiko, ĥemio kaj biologio; tiu de Grosjean-Maupin por juro kaj matematiko; tiu de Filip por plantoj, bestoj, mineraloj, filozofio kaj religio; tiu de Boirac por filozofio, medicino kaj juro; tiu de Tellini por biologio, ĥemio kaj medicino. La granda "Plena Vortaro" de Grosjean-Maupin, Esselin, Grenkamp-Kornfeld kaj Waringhien enhavas multajn terminojn pri preskaŭ ĉiuj branĉoj, sed speciale pri sociologio, juro, filozofio, ĥemio, biologio, medicino kaj politika scienco.

Al la verkado de fakaj terminaroj kaj vortaroj donis sian helpon la Akademio de Esperanto, kiu havas apartan sekcion pri teknikaj vortaroj. Tiu sekcio estis pli frue gvidata de la konata fakulo Rollet de l'Isle, ĉefo de la Centra hidrografia oficejo en Parizo, dum la nuna direktoro de la sekcio estas J. Okamoto, Mie-ken, Japanujo.

En la eldonado de fakaj vortaroj kaj terminaroj gravan rolon ludas Universala Esperanto-Asocio, kiu en la lastaj jaroj eldonis plurajn tiajn terminarojn.

Kelkaj el la menciitaj vortaroj kaj terminaroj ne plu estas haveblaj, sed ili troviĝas en la grandaj

bibliotekoj, ekzemple en tiuj de la Brita Esperantista Asocio en Londono, de Universala Esperanto-Asocio en Ĝenevo, en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj en aliaj bibliotekoj de la Esperanto-organizaĵoj.

Post la jaro 1949 aperis novaj terminaroj por la fakoj: marista (1950), fervoja (1953), elektroteknika (1953), svedaj birdoj (1953), tiel ke entute ĝis nun estas publikigitaj 110 fakaj terminaroj kaj vortaroj por 45 diversaj branĉoj de la scienco, filozofio, tekniko, metioj kaj aliaj specialaj kampoj. Novaj fakaj vortaroj kaj terminaroj estas aŭ jam preparitaj en manuskriptoj aŭ nun verkataj. Tiel, ekzemple, la Japana Esperanto-Instituto komencis grandan laboron kun la celo kompili ĝeneralan sciencan terminaron.

Miloj da personoj sinofere helpis al la laboro de centoj da specialistoj, kiuj laboradis kaj laboradas sur tiu grava kampo de la Internacia Lingvo kaj de la progresigo de la scienco ĝenerale. Tiu tuta laboro estis kaj estas farata senpage kun multe da idealismo. Por fini tiun grandegan laboron estis necesaj milionoj da laborhoroj kaj la rezulto estas, ke la Internacia Lingvo estas hodiaŭ ĝis la plej alta grado preparita por funkciado ankaŭ sur tiu kampo.*

* Tiu ĉi ĉapitro estas ellaborita surbaze de la studoj de H. Jakob el Ĝenevo kaj D-ro W. Solzbacher el New York, kunlaborantoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado.

VII

GAZETARO

Tuj en la komenco, preskaŭ samtempe kun la unuaj lernolibroj, kun la unuaj vortaroj kaj kun la unuaj literaturaĵoj, komencis aperadi ankaŭ la unuaj gazetoj en la Internacia Lingvo.

La unua gazeto en Esperanto estis “La Esperantisto”. La unua numero de tiu gazeto estis datita: Nürnberg, 1 sept. 1889, kaj ĝi portis la subtitolon “Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto”. Ĝi estis eldonata de Chr. Schmidt, prezidanto de la Klubo mondlingva en Nürnberg “sub la kunlaborado de Dr. Esperanto (D-ro L. Zamenhof)”. La gazeto estis 8-paĝa kaj ĝi aperadis unu fojon en la monato. Kun kiom da financaj malfacilaĵoj la eldonanto devis lukti, vidiĝas el la fakto, ke ĉe la fino de la jaro 1889 la gazeto havis nur 113 abonantojn, plejparte el Ruslando. “La Esperantisto” tuj fariĝis la plej efika centrigilo kaj kontaktilo inter la diverslandaj personoj, kiuj eklernis la Internacian Lingvon. En la jaro 1890 la gazeto tute transiris en la manojn de D-ro Zamenhof, sed li havis grandegajn malfacilaĵojn por ĝin regule aperigi kun tiel malmultaj abonantoj. En la fino de 1891 D-ro Zamenhof sentis sin devigata, pro financaj malfacilaĵoj, forlasi la tutan aferon. En tiu momento troviĝis W. H. Trompeter, kiu oferis la necesajn financajn rimedojn por subteni la tutan entreprenon de la gazeto ĝis la jaro 1894. En la dua numero de “La Esperantisto” de la jaro 1895 aperis traduko de la verketo de Tolstoj “Prudento kaj Kredo”. Pro tio la rusa cenzuro malpermesis la eniradon de la gazeto en Ruslandon, kie ĝi havis en tiu tempo la plej grandan parton de siaj abonantoj. Tio estis la unua persekuto

al Esperanto de oficiala instanco. Senigita de la plej granda parto de siaj abonantoj, la gazeto ĉesis aperadi en Aŭgusto 1895. Por la ankoraŭ malforta movado tio estis forta bato. Feliĉe troviĝis denove sindonemaj idealistoj, kiuj komencis eldonadi en decembro la revuon "Lingvo Internacia", kiel daŭrigon de "La Esperantisto". Ĉirkaŭ tiu tempo komencis aperadi ankaŭ "L'Espérantiste" kaj "Sciigo de la Estraro de la klubo esperantista en Stockholm."

El tiuj ĉi kernoj evoluis iom post iom, ofte spitante grandegajn malfacilaĵojn, la Esperanto-gazetaro, kiu ludis kaj ludas gravegan rolon ne nur por la evoluigo de la lingvo mem, sed ankaŭ por kunligo de la esperantistoj diverslandaj kaj, tute speciale, por plifirmigo de la internacia solidareco inter la personoj uzantaj la Internacian Lingvon kaj ankaŭ inter la pli larĝaj tavoloj de la popoloj pere de Esperanto.

La malfacilaj politikaj cirkonstancoj, precipe dum la du grandaj mondmilitoj, inter la du militoj kaj post la dua mondmilito, tre malhelpis la Esperanto-gazetaron, kiu estas esence internacia kaj vivas ekskluzive de siaj abonantoj en diversaj landoj. Ĉiuj politikaj okazaĵoj, kiuj malhelpis aŭ detruis la internaciajn rilatojn (militoj, devizaj malfacilaĵoj, cenzuro k.t.p.), negative reflektiĝis sur la Esperanto-gazetaro, kiu, perdante pro tiuj kaŭzoj siajn abonantojn, devis malaperi. Sed, aliflanke, ĉiam ree troviĝis oferemaj idealistoj, kiuj rekomencis la eldonadon de novaj gazetoj kaj revuoj. Kioma estas la persisto sur tiu ĉi kampo, vidiĝas el la fakto, ke eĉ dum la dua granda mondmilito aperadis kelkaj presitaj Esperanto-gazetoj kaj, eĉ sur la teritorio okupita de la germanaj trupoj, kelkaj sekretaj Esperanto-bultenoj.

Laŭ la granda verko "Bibliografio de Internacia Lingvo" de P. E. Stojan, ĝis la jaro 1929 entute aperis 689 diversaj gazetoj kaj revuoj. Tiu ĉi nombro enhavas

la grandajn kaj gravajn revuojn, sed ankaŭ la malgrandajn, efemerajn gazetojn. Ĝi tamen ne entenas la unuope aperintajn, neregulajn multobligitajn bultenojn, foliojn k.s.

Ne estas loko ĉi tie por prezenti ĉiujn ĉi, eĉ ne la plej gravajn, revuojn kaj gazetojn, kiuj aperadis en Esperanto. Estas, tamen, menciinde, ke kelkaj el ili ludis rimarkindan rolon sur kampoj literatura kaj scienca. Inter ili apartan lokon okupas la bonege redaktita "La Revuo", monata periodaĵo en kiu kunlaboris multaj famaj Esperantistoj, inter la aliaj ankaŭ D-ro Zamenhof mem; "Lingvo Internacia", redaktita de Prof. Cart; "Literatura Mondo", monata revuo pri literaturo kaj arto; "Sennacieca Revuo", periodaĵo kun kontribuaĵoj el literaturo, poezio, scienco kaj kulturo ĝenerale. Tiuj revuoj, kiel ankaŭ la aliaj pli gravaj revuoj kaj gazetoj, kolektitaj en pluraj bibliotekoj, inter ili en la *Bibliothèque pour la Langue Internationale* en Palais Wilson, Genève, prezentas riĉan trezoron de valoraj tekstoj.

La gazetoj kaj revuoj en Esperanto, aperantaj komence de la jaro 1953, estas divideblaj je kvar ĉefaj kategorioj.

Al la *unua kategorio* apartenas la grandaj internaciaj revuoj kun ĝenerala enhavo. El tiuj revuoj estas menciindaj:

"*Esperanto*", oficiala organo de UEA, monata, publikigata en Britujo, ĉefe kun informoj pri la Esperanto-movado, sed ankaŭ kun literaturaj kontribuaĵoj, kulturaj informoj.

"*Heroldo de Esperanto*", publikigata du fojojn en la monato, pritraktas ĉefe problemojn de la Esperanto-movado, sed enhavas ankaŭ literatur-aĵojn, publikigata en Nederlando.

Al la *dua kategorio* apartenas la internaciaj literaturaj,

fakaj kaj aliaj specialaj revuoj kaj gazetoj. Inter ili estas aparte menciindaj:

“*Malgranda Revuo*”, aperas en Svedujo, literatura kaj kritika.*

“*La Praktiko*”, aperas en Nederlando, pritraktas problemojn de federalismo, enhavas ankaŭ literaturaĵojn kaj kulturajn informojn el la tuta mondo.

“*Sennacieca Revuo*”, aperas en Francujo, pritraktas ekonomiajn, politikajn, sociajn kaj kulturajn demandojn.

“*Sennaciulo*”, aperas en Francujo, organo de la laborista asocio Sennacieca Asocio Tutmonda, pritraktas problemojn de la laboristaro.

“*Esperantologio*”, aperas en Danlando, pritraktas problemojn de Esperantologio kaj interlingvistiko.

“*Scienca Revuo*”, aperas en Nederlando, pritraktas problemojn de ĉiuj branĉoj de naturaj kaj sociaj sciencoj.

“*Medicina Revuo*”, aperas en Japanujo, pritraktas problemojn de medicino teoria kaj aplikata.

“*La Juna Vivo*”, aperas en Nederlando, pritraktas problemojn de la junularo.

Al la tria kategorio apartenas diversaj organoj de Esperantaj naciaj organizaĵoj. Kelkaj el tiuj organoj estas laŭ siaj enhavo, kunlaborantoj kaj legantoj vere internaciaj revuoj. Ili ofte alportas literaturaĵojn, kulturajn novaĵojn, priskribojn de vivkondiĉoj kaj kutimoj k.t.p. de siaj landoj kaj popoloj, tiel ke ili kontribuas al pli bona internacia interkompreniĝo kaj pliproksimiĝo. Inter tiuj revuoj kaj gazetoj estas menciindaj, precipe pro la tre akcentita kultura enhavo:

* Ĉesis aperi en 1953.

“*La Suda Stelo*”, organo de Jugoslavia Esperanto-Federacio, grandformata, kiu dum 15 jaroj regule enhavas specialan rubrikon “Literaturo-arto-scienco” kun kontribuaĵoj el la literaturo, arto kaj scienco de la popoloj de Jugoslavio.

“*Esperanto en Skotlando*”, organo de la Skota Federacio Esperantista, en kiu kunlaboras pluraj tre talentaj verkistoj kaj poetoj, ekzemple Reto Rossetti, William Auld, J. S. Dinwoodie kaj John Francis, kaj kiu havas multajn literaturajn kontribuaĵojn.

“*The British Esperantist*”, “*Franca Esperantisto*”, “*Brazila Esperantisto*”, “*Esperanta Finnlando*”, “*Norvega Esperantisto*”, “*Svenska Esperanto Tidningen*”, estas ankaŭ gazetoj, kiuj ofte enhavas kulturajn rubrikojn.

Al la *kvara kategorio* apartenas diversaj nacilingvaj revuoj kaj gazetoj, kiuj havas aŭ apartajn rubrikojn en Esperanto, aŭ alportas resumojn en la Internacia Lingvo. Tiaj gazetoj estas ekzemple “*De Zakengids*” en Nederlando, “*Socialist Leader*” en Britujo, “*Notizie Federaliste Mondiali*” en Italujo, “*Mail Chess*” (ŝakludo per poŝto) en Jugoslavio, “*Stolze-Schrey-Post*” (pri stenografio) en Germanujo, kaj pluraj aliaj.

La eldonnombro de la Esperanto-gazetoj estas sufiĉe varia. La plej grandan eldonnombron havas “Esperanto” de UEA (6000–7000). “Sennaciulo” estas eldonata en 4000 ekzempleroj, dum “Praktiko” kaj “Heroldo de Esperanto” estas eldonataj en proksimume 2600–3000 ekzempleroj. La eldonnombro de la aliaj gazetoj estas inter 500 kaj 3,000. Fakte, la nombro de legantoj de la Esperanto-gazetoj estas multe pli granda ol ilia eldonnombro. En la tuta mondo ekzistas proksimume 1100 Esperanto-societoj, kun membraro de 10 ĝis 500, eĉ pli da personoj. Tiuj Esperanto-grupoj kutime abonas plurajn gazetojn, tiel ke unu ekzemplero estas legata de multaj personoj.

Pro tiu fakto la kultura, precipe interfratiga rolo de la Esperanto-gazetaro estas multe pli granda ol oni povus supozi konsiderante nur la eldonnombron de la revuoj kaj gazetoj. Oni devas, krome, ankaŭ akcenti, ke la Esperantaj revuoj kaj gazetoj estas regule konservataj en la bibliotekoj de la societoj, tiel ke ili estas alireblaj al la membraro.

La rolo de la Esperanto-gazetaro estas, do, plurobla:

La Esperanto-gazetaro antaŭ ĉio kunligas forte la personojn, kiuj scias la Internacian Lingvon, kaj kreas aŭ plifortigas ĉe ili la komprenemon por aliaj popoloj, por iliaj kulturaj strebadoj, historio, vivkutimoj, politikaj, ekonomiaj kaj sociaj kondiĉoj.

Aliflanke, la Esperanto-gazetaro, per sia tuta enhavo, grave kontribuis kaj kontribuas al la evoluigo de la lingvo.

Fine, la Esperanto-gazetaro prezentis kaj prezentas riĉan trezoron, kiu estas ofte utiligata por diversaj aranĝoj, ekzemple por publikaj prelegoj, artaj vesperoj, tradukoj en naciajn lingvojn. Tiamaniere ne nur la Esperantistoj, sed ankaŭ la pli larĝa publiko konatiĝas per Esperanto kun la kulturaj valoroj de aliaj popoloj. Tiuj kontribuajtoj estas multe pli grandaj ol oni kutime pensas. Sufiĉos mencii, ke tre granda parto de literaturaj verkoj el la literaturoj de la malgrandaj popoloj de Orienta Eŭropo estas tradukitaj en la Ĉinan lingvon per Esperanto. Same tiel multaj literaturaĵoj kaj artikoloj pri la vivkondiĉoj kaj kutimoj de Malproksima Oriento estas diskonigitaj en Eŭropo, precipe en la Orienta Eŭropo, per Esperanto. En tiu ĉi gravega kultura kaj interfratiga laboro unuarangan rolon ludis kaj ludas la Esperanto-gazetaro.

VIII

DIVERSAJ FORMOJ DE PRAKTIKA APLIKADO DE ESPERANTO

NE nur en literaturo kaj scienco, sed ankaŭ sur plej diversaj kampoj de la internacia vivo Esperanto estis dum sia 66-jara funkciado pli aŭ malpli larĝe aplikata.

Ne estas eble prezenti ĉiujn aspektojn de la uzado de Esperanto en la praktiko, ĉar tiuj aspektoj estas kaj tro multnombraj kaj, almenaŭ kelkaj el ili, tro abundaj. Tial, ĉi tie estos tuŝitaj nur la plej gravaj atingaĵoj sur nur kelkaj kampoj.

A. Esperanto en komerco

Estas klare, ke internacia lingvo, vaste uzata, signifus grandan faciligon por la internacia komerco, precipe por la korespondado, eldonado de prospektoj kaj reklamoj. La komerca mondo iom post iom ekuzis Esperanton ĉefe per reklamado en Esperanto-gazetoj kaj per eldonado de prospektoj precipe por varoj, kiuj interesas la larĝajn tavolojn.

Universala Esperanto-Asocio estis la unua organizaĵo, kiu servis praktike ankaŭ al la komercistoj. Inter la delegitoj de UEA estis jam en la jaro 1914 285 personoj, apartenantaj al la komerca branĉo. En la oficiala organo de UEA troviĝis aparta rubriko “Reciproka Informado”, kiu enhavis demandojn kaj ofertojn pri vendotaj kaj aĉetotaj varoj. Poste tiu rubriko ŝanĝiĝis al “Internacia Komerco”.

Kiom grandaj estis la *servoj faritaj pere de Esperanto*, vidiĝas el statistiko, kunmetita en tiu epoko en la Centro de UEA. Laŭ ĝi, la komercaj delegitoj faris en la jaro 1901 1120 diversajn servojn, en la jaro 1910 la nombro de la faritaj servoj altiĝas al 1513, en la jaro

1911 ĝi estis 2698, en la jaro 1912 ĝi atingis 2835, dum en la jaroj 1913 la nombro de faritaj komercaj servoj estis 3713. La eksplodo de la milito en 1914 malhelpis la daŭrigon de tiu statistiko. Post la unua mondmilito, ĝis la hodiaŭa tago, senĉese estis kaj estas farataj diversaj servoj en la internacia komerco, sed pro la disvastiĝo de la lingvo kaj ĉiam pli granda ampleksiĝo de la plej diversaj servoj ne plu estas eble fari statistikajn kontrolojn.

En la kadro de la Esperanto-movado fondiĝis tre frue ankaŭ apartaj *komercaj fak-grupoj*. Tiele jam en la jaro 1914 estis 10 komercaj fak-grupoj en 7 landoj. En tiu jaro 968 komercaj firmoj en 38 landoj havis inter la personaro almenaŭ po unu persono, kiu sciis la Internacian Lingvon. De tiam tiu nombro sendube kreskis kaj hodiaŭ estas verŝajne pluraj centoj da komercaj entreprenoj, havantaj oficistojn, kiuj scias Esperanton. La firmoj kutime anoncas tiun fakton per malgranda ŝildeto. Inter la hodiaŭaj firmoj, kiuj uzas Esperanton en tiu aŭ alia formo, oni povas mencii la grandan vojaĝoficejon Cook, la Londonan Kooperativan Societon, Rotterdamse Bank en Roterdamo, la Middenstandsbank en Amsterdamo, la Nederlandan aviadilan societon KLM, la Svedan aviadilan societon SAS kaj multajn aliajn.

Frue diversaj firmoj eldonadis komercajn *prospektojn*, *prezarojn* kaj *katalogojn*. En la jaro 1911 ekzistis 11 tiaj katalogoj. Ilia nombro rapide altiĝadis. Antaŭ la unua mondmilito ekzistis jam pluraj centoj da reklamoj kaj katalogoj en Esperanto, inter kiuj estas menciindaj la prospektoj de la entreprenoj Consettferofabriko, de la fotofabriko Hüttig A. S. en Dresden, de la skribmaŝinaj fabrikoj Ideal, Yost, Hammond, Oliver kaj aliaj. Multaj firmoj reklamadis en Esperanto-gazetoj kaj tiuj reklamoj havis kutime bonan efikon. La germana firmo Reiner en Berlino, ekzemple,

anoncis ke surbaze de reklamo en Esperanto-gazetoj ĝi ricevis dum 2 monatoj 439 mendojn el 32 landoj. Ankaŭ hodiaŭ multaj firmoj reklamas ĉu pere de la Esperanto-gazetoj, ĉu pere de apartaj reklamoj kaj katalogoj. Ne estas eble kontroli ilian nombron, sed ili atingas plurajn milojn.

Inter la du militoj la plimulto de la grandaj *internaciaj foiroj* unu post la alia ekuzis Esperanton ne nur por reklamado, sed ankaŭ por korespondado. Kelkaj foiroj, ekzemple tiuj de Leipzig, Frankfurt, Budapeŝto, Lyon, Reichenberg k.t.p. eldonadis afiŝojn, prospektojn, glumarkojn, cirkulerojn, regule ankaŭ en Esperanto. Post la dua mondmilito Esperanto denove estis kaj estas uzata de diversaj foiroj, ekzemple tiuj de Lyon, Parizo, Padova, Budapeŝto, Verona k.a.

En Esperanto aperadis ankaŭ diversaj *komercaj revuoj*. Inter ili estas citindaj la "Internacia Komerca Revuo" (Zürich), "Internacia Komercio" kaj aliaj malpli grandaj. Kelkan tempon Universala Esperanto-Asocio havis en sia gazeto "Esperanto" apartan rubrikon sub titolo "Ekonomia kuriero" kiun redaktis R. Kreutz.

En la jaro 1923 aperis "Komerca Terminaro", kiu multe faciligas la pli vastan uzadon de la Internacia Lingvo en la internacia komercio.

B. Esperanto en turismo

Komence de la jarcento (1900) la Franca "*Touring Club*" ekinteresiĝis pri Esperanto. En ĝia organo aperis pluraj artikoloj, kiuj instigis multajn personojn lerni la Internacian Lingvon. Sed en tiu ĉi frua tempo de la Esperanto-movado ĉiu tiaspeca provado montriĝadis nesufiĉe daŭra, tiel ke la rezultoj de tiu agado estis relative modestaj.

Post la unua mondmilito Universala Esperanto-Asocio montris ankaŭ sur tiu kampo grandan aktivecon

kaj, grandparte kiel rezulto de tiu aktiveco, pli ol 400 urboj eldonis en Esperanto *gvidlibrojn kaj gvidfoliojn*. Kelkaj el ili estas vere rimarkindaj, ekzemple la eldonaĵoj de la Itala “*Touring Club*” pri “Milano kaj lagoj de Lombardio”, aŭ pri “Romo kaj ĉirkaŭaĵoj”. Temas pri luksaj eldonaĵoj kun multaj mapoj kaj planoj, glosaroj, alfabetaj listoj de ĉefaj artaĵoj kaj artistoj, alfabetaj indeksoj k.t.p.

Post la lasta milito oni daŭrigis la laboron sur tiu kampo kaj aperis tre belaj gvidlibroj aŭ prospektoj pri pluraj urboj, ekzemple pri Parizo, Munkeno, Bruĝo, Stokholmo k.a. Entute ĝis hodiaŭ pli ol 600 urboj eldonis prospektojn en Esperanto. Jen kelkaj el ili, krom la menciitaj: Spa, Hago, Bruselo, Cartagena, Londono, Kopenhago, Sofia, Praha, Versailles, Ĝenevo, Berlino, Genova, Brno, San Sebastian, Vladivostok, Dresden, Bjalistok, Stettin, Cannes, Graz, Ljubljana, Varna, Krakov, Arnheim, Sevilla, Zagreb k.t.p., k.t.p. Estis eldonitaj ankaŭ gvidlibroj tra diversaj landoj. El ili estas menciindaj tiuj pri Finnlando, Pollando, Estonio, Aŭstrujo; krome la libroj “Faktoj pri Danlando” (1948), “Aspektoj de Islando” (1950), kaj “Faktoj pri Norvegujo” (1953).

Turismaj servoj funkcias kaj funkcias en la kadroj de diversaj Esperanto-organizaĵoj. El la turismaj servoj menciindaj estas tiuj de Universala Esperanto-Asocio, de la Brita, Sveda, Franca, Norvega, Dana Esperanto-organizaĵoj. Tiuj turismaj servoj organizas ĉiujare kolektivajn vojaĝojn de Esperantistoj al eksterlando. Ĉiujare estas aranĝataj pluraj dekoj da tiaj malmultekostaj vojaĝoj, dum kiuj oni uzas ekskluzive la Internacian Lingvon. Pro la bona kaj forta organizo de la Esperanto-movado, la enlandaj Esperanto-organizaĵoj kaj la enlandaj Esperantistoj ĉiurilate helpas siajn gastojn, aranĝas por ili specialajn prelegojn kaj vizitojn al vidindaĵoj de la lando, tiel ke tiuj vojaĝoj

fariĝas ne nur agrablaj amuzoj, sed ili ankaŭ kontribuas al klerigo de la partoprenantoj, al kreo de internacia amikeco kaj fortaj internaciaj ligoj.

C. Esperanto en radio

La unuaj disaŭdigoj en Esperanto okazis en la jaro 1922. Tiam estis faritaj la unuaj provoj en Newark WYZ (Usono) kaj en Londono. En la jaro 1923 pluraj radiostacioj disaŭdigis la unuan fojon en Esperanto: Moskvo (la 12an de aprilo), Montreal kaj Rio de Janeiro. En la jaro 1924 disaŭdigis Praha (la 31an de januaro), Ĝenevo (la 18an de marto), Helsinki (la 6an de aprilo) kaj Parizo (la 7an de aprilo). Post tio sekvis baldaŭ elsendoj ĉiam pli oftaj kaj pli longaj de diversaj radiostacioj. Laŭ statistiko el la jaro 1934, la antaŭan jaron (1933) 83 sendostacioj el 14 landoj okazigis 1774 disaŭdigojn en aŭ pri Esperanto.

Post la dua mondmilito Esperanto estis tre larĝe aplikata en la radio. Kelkaj radiostacioj de Orienta Eŭropo havis ĉiutagajn elsendojn en Esperanto (ekzemple Praha, Sofia, Brno, Moravska Ostrava). Praha eĉ havis dufoje tage elsendojn en Esperanto kaj, krome, ĝi prezentis unufoje en la monato grandan kulturan programon en la Internacia Lingvo, dum kiu estis prezentataj dramoj kaj operoj en Esperanto. Ankaŭ Radio-Parizo havis ĉiutagajn elsendojn en Esperanto de la jaro 1948 ĝis 1950. Kvankam miloj da leteroj el ĉiuj partoj de la mondo, speciale el la landoj de Orienta Eŭropo, evidente montris la grandan interesiĝon por la elsendoj de Radio-Parizo, tamen, pro manko de financaj rimedoj, la direkto estis devigata ĉesigi tiujn ĉiutagajn elsendojn, samtempe kun la ĉesigo de la elsendoj en kelkaj aliaj lingvoj. La ĉesigo de la elsendoj de Radio-Praha (septembro 1950), Varsovio (novembro 1950) kaj Ostrava (januaro 1950) estas atribueblaj al politikaj kaŭzoj, nome al negativa

starpunkto de la aktuala reĝimo en Sovetunio rilate al Esperanto.

Laŭ la statistiko, farita en la Centro de Esploro kaj Dokumentado, en la jaroj 1951 kaj 1952 entute 15 radiostacioj en 10 landoj elsendis 1820 programojn en Esperanto. En la jaro 1953 regule disaŭdigis Esperanton jenaj radiostacioj: Bern, Rabat (Maroko), Hilversum-VARA (Nederlando), Bauru (Brazilo), Lille (Francujo), Wien (Aŭstrujo), Graz (Aŭstrujo), Guatemala (C. Ameriko), Roma (Italujo), Madrid (Hispanujo), Paris (Francujo), Rio de Janeiro (Brazilo), Valencia (Hispanujo), Hilversum-KRO kaj Hilversum-NCRV (Nederlando), Montevideo (Urugvajo), Zagreb kaj Osijek (Jugoslavio). Entute 18 radiostacioj el 11 landoj elsendis 845 programojn en Esperanto.

D. Esperanto en poŝto, telegrafo, telefono

Iom post iom Esperanto penetras ankaŭ en tiun medion. Jam en la jaro 1892-93 en Rusujo oni sendadis telegramojn en Esperanto sen malhelpo. La administracio donis la 30an de decembro 1904 oficialan permeson sendi telegramojn en Esperanto, sub la kondiĉo ke samtempe estu prezentita traduko en la nacia lingvo.

La 30an de novembro 1906 la gazeto "Boletin Telegrafico" de Brazilo entenis dekreton, laŭ kiu Esperanto estis akceptita kiel klara lingvo por telegramoj en la enlanda servo.

En la jaro 1913 la poŝtadministracio de Nederlando permesis, ke la poŝtistoj parolantaj Esperanton surportu la Esperantan insignon (verdan kvinpintan stelon). En tiu jaro oni povis vidi en Belgujo, en la poŝtoficejo de Charleroi, ŝildeton kun la indiko "Oni parolas Esperanton".

Post la unua mondmilito—en la epoko, kiam la tiama reĝimo en Sovetunio ankoraŭ rilatis favore al Esperanto—aperis 40 diversspecaj poŝtkartoj kaj kovertoj en kelkmiliona eldono kun la surskriboj en Esperanto “Poŝta karto”, “Por respondo”, “Poŝto”, “Fermita letero” k.t.p. Eĉ pli, en la jaro 1925 la poŝtadministracio de USSR eldonis la unuan poŝtmarkon en Esperanto. La sekvintan jaron (1926) aperis en USSR la dua poŝtmarko kun Esperanta teksto. En 1927 aperis en USSR la tria (kaj la lasta) oficiala poŝtmarko kun la teksto en Esperanto. Post la dua mondmilito Bulgarujo, Brazilo, Aŭstrujo kaj Jugoslavio eldonis poŝtmarkojn kun Esperanto-teksto.

En la jaro 1930 la poŝtadministracio de Lichtenstein eldonis poŝtkartojn kun tekstoj en Esperanto.

En ligo kun la diskutoj pri la Internacia Lingvo en la kadro de la estinta Ligo de Nacioj, la Persa delegitaro proponis en la jaro 1924 rezolucion, laŭ kiu Esperanto estis rekomendita kiel “klara lingvo” en la telegrafado. Tiu rezolucio estis ĉiuvoĉe akceptita la 20an de septembro 1924, kaj ĝi do estas la unua interŝtata rekono de Esperanto kiel ekzistanta kaj funkcia lingvo. En la jaro 1925 la Universala Telegrafa Unio, en sia tutmonda konferenco en Parizo, sekvis la rekomendon de la Ligo de Nacioj kaj ŝanĝis sian regularon tiel, ke Esperanto estis allasita kiel “klara lingvo” en la telegrafado. Tiamaniere Esperanto estis oficiala rekonita ankaŭ de la Universala Telegrafa Unio kaj tiun pozicion ĝi konservis ĝis la hodiaŭa tago.

Esperanto estas relative bone disvastigita inter la personaro de PTT en diversaj landoj. Jam en la jaro 1911 estis fondita Internacia Ligo de PTT Esperantistoj (ILEPTT), kiu ĉiam pli disvastigis sian laboron kaj hodiaŭ funkcias sub la nomo de Internacia Ligo por Esperanto en Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Trans-

portoj. La Ligo havas la celon utiligi Esperanton en la medioj de la poŝtoj, telekomunikoj kaj transportoj.

E. Esperanto en sonfilmo

Kelkaj gravaj filmfakuloj, ekz. Laemmle kaj Chaplin, rekonis la valoron de Esperanto por la sonfilmo, precipe pro ĝia granda klareco. Tamen ĝis nun okazis nur kelkaj provoj. En 1929 okaze de la Esperanto-Kongreso de Nord-Ameriko, la Paramount filmkompanio produktis tute mallongan parolfilmon, kiu estis prezentita dum la kongreso. En la jaro 1930 la sama kompanio prezentis alian mallongan filmeton okaze de la 22a Universala Kongreso en Oxford. En la jaro 1933 okaze de la skolta mondtendaro en Gödöllő (Hungarujo) por la granda ĵamborea sonfilmo oni faris sceneton ankaŭ en Esperanto. La unua granda sonfilmo en Esperanto, sub la titolo "Morgaŭ ni komencos la vivon", estis prezentita en la jaro 1934 dum la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. La filmo estis originala fabrikita en la germana lingvo, sed poste oni aldonis Esperantlingvan parolon sub la gvidado de la konata verkisto Jean Forge.

Estas menciinde, ke en la konata filmo de Chaplin "La Diktatoro" ĉiuj surskriboj de la butikoj en la juda kvartalo estas faritaj en Esperanto. Alia iom grava usona filmo kiu uzis Esperanton, estas "*Idiot's Delight*" ("Plezurego de Idioto").

Post la dua mondmilito la Brita Esperantista Asocio donis sian helpon al komerca filmkompanio, kiu produktis filmon pri la lingvaj malfacilaĵoj kaj pri ilia solvo per Esperanto. Same tiel post la milito la Jugoslaviana Filmentrepreno "Triglav" produktis kulturan filmon "Ni obeigos la akvojn" kun Esperantlingvaj klarigoj. En la jaro 1951 tiu filmo estis prezentita en Danlando kun tre granda sukceso, tiel ke la Jugoslavaj filmentreprenoj nun preparas aliajn kulturajn

filmojn kun Esperantlingva parolo. En la jaro 1953 la Aŭstralia Novaĵa kaj Informa Servo (de la Aŭstralia Registaro) pretigis novan, tre interesan sonfilmon "Aŭstralio Hodiaŭ", kun teksto en Esperanto.

Sendube, la ĝis nun atingitaj rezultoj estas ankoraŭ tre modestaj, sed ili povas esti konsiderataj kiel tre sukcesaj eksperimentoj por la utiligo, multe pli vasta, de Esperanto ankaŭ sur tiu ĉi kampo.

F. Prelegvojaĝoj, privataj vojaĝoj, korespondado

La unuaj veraj *prelegvojaĝoj* per Esperanto okazis jam antaŭ la unua mondmilito. La plej notindaj estas tiuj de I. Krestanov (Bulgaro), A. Pitlik (Ĉeĥo), Prof. D-ro Privat (Sviso) kaj D. Parrish (Usonano). Tiu lasta ricevis apartan komision de la Komerca Ĉambro en Los Angeles, travojaĝi Eŭropon kaj diskonigi ĉie per Esperanto-prelegoj kaj lumbildoj la belajojn de Usono. Li travojaĝis 25 diversajn landojn, parolante ĉie nur en Esperanto, kaj havis grandan sukceson.

Post la jaro 1930 okazis multaj prelegvojaĝoj, kiuj havis similan celon: diskonigi la naturajn belajojn kaj precipe la kulturon de la koncernaj landoj. La plej gravaj el tiuj vojaĝoj estas: la vojaĝoj de H. Steiner, R. Frey, R. Ĉech (Aŭstroj); D-ro J. Lukács, D-ro S. Puskás, verkisto J. Baghy, D-ro F. Szilágyi kaj T. Czitrom (Hungaroj); T. Morariu (Rumano); L. Sinha (Hindo); K. Ajayi (Negro el Nigerio); M. Raden (Javano). La plej grava prelegvojaĝo, kiu iam estis entreprenita per Esperanto kaj tre verŝajne entute, estis tiu de J. Scherer (Usonano). Lia vojaĝo daŭris de la jaro 1930 ĝis 1932. Li ĉirkaŭiris la tutan mondon kaj vizitis 41 landojn. Dum la vojaĝo li faris entute 322 paroladojn, kiujn aŭskultis pluraj dekmiloj da personoj.

Post la milito la plej grava paroladvojaĝo estis tiu de Prof. D-ro Ivo Lapenna (Kroato, Jugoslavio), kiu

en la jaroj 1949 ĝis 1951 vizitis ĉ. 150 urbojn de Italujo, Francujo, Belgujo, Nederlando, Britujo kaj Islando. Li faris ĉ. 300 prelegojn ĉu por la larĝa publiko, ĉu en universitatoj pri temoj de sia fako (internaciaj rilatoj kaj internacia juro). Lia vojaĝo estis organizita de UEA.

Ĉiuj ĉi prelegvojaĝoj kontribuis al la diskonigo de la kulturaj valoroj de aliaj popoloj kaj sekve al pli bona internacia kompreniĝo.

Krom tiuj grandaj prelegvojaĝoj, la Esperantistoj senĉese ĉiam pli kaj pli utiligas Esperanton por siaj *privataj vojaĝoj*. Miloĵ da Esperantistoj ĉiujare vizitas aliajn landojn kaj trovas ĉie personojn, kiuj estas pretaj helpi ilin ĉiurilate. Kiam oni vojaĝas kiel Esperantisto, oni havas grandajn avantaĝojn, ĉar la lokaj Esperantistoj helpas al la vojaĝanto montrante al li la plej vidindajn artaĵojn, klarigante al li la kulturajn strebadojn, la historion, la kutimojn de la koncerna lando. Laŭ la atestoj de miloj da personoj, kiuj vojaĝis utiligante la Internacian Lingvon, oni povas sen troigo aserti, ke tiamaniere oni havas pli da utilo el kultura vidpunkto kaj el vidpunkto de internacia proksimiĝo, ol per kiu ajn alia formo de vojaĝado.

Fortaj kaj multnombraj fadenoj ligas la personojn, kiuj parolas la Internacian Lingvon, ankaŭ per la vasta *internacia korespondado*. Miloĵ da personoj tra la tuta mondo ĉiutage korespondas en Esperanto, kreante tiamaniere reton de internacia komprenemo kaj amikeco. Ofte la korespondantoj eĉ ne konas unu la alian persone, ĉar ili neniam havis la okazon renkontiĝi, kaj tamen inter ili formiĝas amikecaj rilatoj. La korespondado, kompreneble, koncernas plej diversajn temojn. De la infanoj en diversaj lernejoj, kiuj interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn, ĝis sciencistoj, kiuj utiligas Esperanton por sia faka laboro. Estas neeble eĉ partete doni ekzemplojn pri la multflankeco de la

utiligo de Esperanto por tiuj celoj. Sufiĉos nur menciĝi, ke ekspozicioj de infandeseĝnaĵoj povis esti aranĝitaj dank' al Esperanto; ke scienca materialo por doktoraj disertacioj povis esti kolektita dank' al Esperanto; ke retrovado de parencoj kaj amikoj ofte okazis dank' al Esperanto; ke internaciaj kulturaj prelegoj povis esti kunmetitaj dank' al informoj ricevita per Esperanto!

Vere, ekzistas multaj internaciaj organizaĵoj, sed ekzistas nur unu Movado, unika en la mondo, kie ne nur la suproj rilatas internacie, sed kie ankaŭ la plej larĝaj tavoloj rilatas reciproke en internacia kadro. Ĝi estas la Esperanto-Movado. Tiu fakto faras ke la Esperanto-Movado povas kun fiero aserti:

La Internacia Lingvo estas ne nur teknika rimedo de internacia komunikado, sed ankaŭ forta instrumento de internacia kompreniĝo, toleremo kaj paco.

IX

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEJO EN WIEN (IEMW)

MULTAJ landaj asocioj, Esperanto-societoj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj formis tre frue siajn bibliotekojn, en kiuj estis kaj estas konstante kolektataj libroj, gazetoj, broŝuroj kaj aliaj esperantaĵoj. La plej bonajn rezultojn en tiuj klopodoj sendube atingis la Brita Esperantista-Asocio, kies biblioteko, lerte prizorgata dum multaj jaroj de la konata Brita esperantisto M. C. Butler, estas unu el la plej bonaj tiaspecaj institucioj en la mondo.

Mankis, tamen, institucio kun internacia karaktero, en kiu estus kolektita ĉio kreita en Esperanto kaj pere de ĝi. Tial Felikso Zamenhof, la frato de la aŭtoro de Esperanto, proponis en kunsido de reprezentantoj de 38 nacioj, dum la XIX-a Universala Kongreso de Esperanto en Danzig (1927), ke ie en la mondo oni fondu internacian Esperanto-bibliotekon. La Aŭstra reprezentanto, reveninte al Vieno, raportis pri la afero al la tiama Aŭstra Federacia Kanceliero D-ro Ignaz Seipel kaj prezentis planon fondi ne simplan bibliotekon, sed multe pli ampleksan Esperanto-Muzeon, kies tasko estus kolekti la tutan materialon ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri la dumjarcentaj klopodoj solvi la lingvan problemon. Kanceliero Seipel kun intereso trastudis la planon kaj promesis subteni ĝian realigon. Fakte li tuj helpis, unuavice per disponigo de malgranda ejo por tiu celo al la iniciatinto, Hugo Steiner.

A. Historio de IEMW

Al la fondinto de la Muzeo estis klare tuj en la komenco, ke li ne povos realigi la planon en plena amplekso nur per libervolaj financaj kontribuoj fare

de la Esperantistaro. La luado de indaj, sufiĉe grandaj ejoj, ilia mebligo, la bindigo de libroj, lumigado, hejtado kaj honorarioj por la personoj agantaj en la Muzeo—ĉio—ĉi postulis sufiĉe grandajn financajn rimedojn. Tial H. Steiner venis al la ideo, ke la plej bona solvo de la problemo estus instali la Muzeon sub ŝtata administrado. Tio ne nur garantius la fondiĝon de la Muzeo en konvena maniero, sed ankaŭ prezentus sekurecon por ĝia daŭra ekzistado kaj evoluado. Post intertraktadoj kun la Ĝenerala Direktoro de la fama Aŭstra Nacia Biblioteko en Vieno, H. Steiner sukcesis atingi, interkonsente kun la Ministerio pri Edukado, konvenan kontrakton kun la Aŭstra Nacia Biblioteko (Aŭgusto 1928). Per tiu kontrakto la Muzeo estis alligita al tiu grava kultura institucio por “eterna tempo” kiel speciala fako (*corpus separatum*). La ŝtato devigis sin senpage disponigi la necesajn ejojn, pagi la bindigon de la libroj, havigi la rimedojn por lumigado, hejtado, purigado kaj la necesa oficeja materialo.

En Junio de la jaro 1928 la registaro disponigis por la celoj de la Muzeo ne tre taŭgan ejon en la korto de la Supera Konto-kontrolejo en la centro de Vieno. La saman jaron, la novelektita Aŭstra Federacia Prezidanto Wilhelm Miklas transprenis la patronecon de la IEMW. En la jaro 1929 la Muzeo ricevis unue unu ĉambron kaj poste ankaŭ la duan en la iama Aŭgusteno-monaĥejo, apartenanta al la Nacia Biblioteko.

La 31-an de Aŭgusto 1929 okazis la solena inaŭguro de la Muzeo per granda ekspozicio en la mondfama Pompsalonego de la Nacia Biblioteko. Ĉeestis la Federacia Prezidanto Miklas, la Federacia Kanceliero, la Ministro pri instruado kaj aliaj eminentuloj. Tiu-okaze D-ro Bick, universitata profesoro kaj ĝenerala direktoro de la Nacia Biblioteko, faris malferman paroladon, en kiu li akcentis la gravecon de la Muzeo. “Mi estas fiera—li diris—ke la IEMW trovis sian

lokon en la Nacia Biblioteko, kaj estu konvinkitaj, ke mia Instituto ĉiel forte akcelos ĝian evoluon. La Muzeo estu atestaĵo pri la disvastigo kaj apliko de Esperanto. . . . Fine mi deziras, ke la Muzeo servu al ĉiam pli intima interkonatiĝo de la diversaj popoloj.”

La protektanto de la Muzeo, Prezidanto Wilhelm Miklas, parolis pri la grandaj spiritaj valoroj de Esperanto. Interalie li diris: “Esperanto ne nur servas al la interkompreniĝo de homoj diverslingvaj en la praktika vivo, sed samtempe ĝi ankaŭ akcelas la interŝanĝon de la spiritaj valoroj de la homaro, de ĝiaj ideoj kaj opinioj sur la kampoj kultura kaj ekonomia. . . . Tio estas ankaŭ la celo de Esperanto: iĝi rimedo por la paco inter la popoloj de la tero. . . . La Esperanto-Muzeo, kiun vi instalas en ĉi tiu belega loko, certe altiros la daŭran interesiĝon de kleraj homoj el ĉiuj rasoj kaj klasoj, de ĉiuj regnoj kaj lingvoj. . . . Ĝi certe estas destinita ludi gravan rolon en la spirita vivo de la popoloj.”

En la jaro 1930 la Muzeo translokiĝis en la grandan salonegon de *Neue Burg* (Nova Imperiestra Kastelo) kaj du jarojn poste ĝi ricevis plian grandan salonegon por la biblioteko kaj kiel legejon.

Kiam Hitler okupis Aŭstrujon, la Muzeo, kompreneble, estis tuj fermita. Ĝia direktoro H. Steiner estis enkarcerigita. La materialo tamen povis esti savita, ĉar ĝi estis deponita en la kelon de la kastelo.

Post la finiĝo de la milito, en la jaro 1945, la Aŭstra Kanceliero, D-ro Ing. Figl, disponigis al IEMW kvar salonegojn en la Malnova Imperiestra Kastelo (*Hofburg*) kaj en la jaro 1953 la Muzeo ricevis la kvinan salonegon. Tiamaniere la Muzeo nun konsistas el du salonegoj por la biblioteko kaj la aliaj kolektoj, kiel ankaŭ por la legejo, el unu salonego por la “Konstanta Libroekspozicio”, el la ronda salono kiel

“Panteono” por la pioniroj de la mondlingva demando, el akceptosalono por la direktoro.

De post la jaro 1949 la Muzeo ricevas ĉiun jaron subvencion de la Ministerio pri Edukado por kovri la elspezojn de la eldonado de presaĵoj, afrankoj, honorarioj k.t.p. Ek de la jaro 1927 ĉiuj Aŭstraj kancelieroj kaj ministroj pri instruado aktive subtenis la Muzeon.

B. Celo

La celo de la Muzeo estas kolekti la tutan materialon koncerne la demandon de Internacia komuna Lingvo, ordigi ĝin laŭ scienca metodo kaj konservi ĝin. La Muzeo ne nur kolektas tiun materialon, sed ankaŭ disponigas ĝin al ĉiuj interesiĝantoj, unuavice al scienculoj, kiuj okupiĝas pri lingvistiko, terminologio aŭ alia scienca branĉo, pri kiu troviĝas konvena materialo en la Muzeo. En la Nacia Biblioteko en Vieno troviĝis jam antaŭe multaj, kelkfoje tre maloftaj libroj el pli fruaj jarcentoj, kiuj rilatas al demando de komuna lingvo (Descartes, Leibnitz k.a.). Tiuj libroj estos menciitaj en la katalogo de la kolektoj de la IEMW, ĉar ili apartenas al ĝi.

En la Muzeo nun troviĝas jenaj kolektoj:

(1) Lernolibroj, (2) vortaroj, (3) fakvortaroj, (4) lernolibroj kaj literaturo por infanoj, (5) originala Esperanto-literaturo, (6) traduka literaturo, (7) sciencaj kaj teknikaj verkoj, (8) antologioj, (9) religiaj demandoj, (10) politikaj verkoj, (11) por, kontraŭ kaj pri la Internacia Lingvo, (12) pacmovado, (13) gazetoj (pli ol 1.600 reprezentitaj ĝis nun), (14) Esperanto-kongresoj (universalaj, internaciaj konferencoj, landaj, fakaj), (15) diversaj projektoj de komuna lingvo (ĝis nun verkoj pri pli ol 120), (16) afiŝoj pri foiroj, kongresoj, kursoj k.t.p., (17) gvidlibroj, (18) fotoj de Zamenhof kaj de aliaj eminentuloj, de Esperanto-placoj kaj stratoj, de kongresoj, konferencoj, kunvenoj

k.t.p., (19) korespondaĵoj de la pioniroj, (20) eldiroj de eminentuloj pri la demando de komuna Internacia Lingvo, (21) glumarkoj, (22) muzikaĵoj, (23) diskoj kun Esperanto-teksto, (24) libro-katalogoj, (25) regularoj de Esperanto-organizaĵoj, (26) poŝtkartoj kaj kovertoj kun Esperanta poŝta stampo, (27) ŝlosiloj, (28) poŝtkartoj kun Esperanto-teksto, (29) komercaj propagandiloj, (30) insignoj de kongresoj kaj organizaĵoj, (31) gazetteltranĉaĵoj, (32) diversajoj.

La biblioteko ampleksas nuntempe (1954) pli ol 10.000 erojn.*

* Tiu ĉi ĉapitro estas verkita surbaze de la informoj, donitaj de S-ro H. Steiner, direktoro de la Muzeo en Vieno.

Nuda paĝo por teni la vicordon de
la originaj paĝoj

Dua parto

**ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ, ILIAJ
CELOJ KAJ LABORO**

Nuda paĝo por teni la vicordon de
la originaj paĝoj

X

ORGANIZAĴOJ POR DISVASTIGO DE ESPERANTO

JAM en la frua tempo de Esperanto, la personoj parolantaj la Internacian Lingvon organiziĝis en societoj kaj grupoj. La unua Esperantista societo estis fondita en Decembro 1888 en Nürnberg. Post tio baldaŭ formiĝis similaj grupoj en Rusujo, Francujo, Britujo, Aŭstrujo-Hungarujo kaj en aliaj landoj.

La celo de la grupoj precipe estis diskonigi la novan lingvon, organizi kursojn, aperigi lernolibrojn, ebligi la praktikadon de la lingvo. Kun la tempo la grupoj larĝigis la programon de sia laboro kaj komencis dediĉadi ĉiam pli grandan atenton al la praktika utiligo de Esperanto, nome al la altigo de la kultura nivelo de sia membraro per organizado de prelegoj, literaturaj kaj ĝenerale artaj vesperoj, interŝanĝado de prelegantoj kun aliaj landoj, fondado de bibliotekoj.

La Esperanto-grupoj de unu lando formis kutime landan asocion, kies tasko estis kaj estas disvastigi la lingvon en la kadroj de la koncerna lando.

La plua disvastigo de Esperanto necesigis ankaŭ la fondon de internacia organizaĵo, kiu reprezentus la Esperanto-Movadon en mondaj kadroj. La historio de tiu klopodo estos prezentita en la Tria Parto de tiu ĉi studo. Post diversaj provoj kaj, kelkfoje, eksperimentoj, fine post la dua mondmilito oni trovis konvenan organizformon en la reorganizita Universala Esperanto-Asocio kiu, reprezentante kaj la landajn asociojn kaj la individuajn esperantistojn, estas hodiaŭ la supera instanco de la tuta Esperanto-Movado.

A. Landaj asocioj aliĝintaj al UEA

Komence de la jaro 1953 jenaj landaj asocioj estis kolektivaj membroj de Universala Esperanto-Asocio:

- (1) Argentina Esperanto-Ligo, Buenos Aires, fondita en 1941,
- (2) Aŭstralia Esperanto-Asocio, Melbourne, fondita en 1911,
- (3) Aŭstria Esperantista Federacio, Wien I, fondita en 1935,
- (4) Reĝa Belga Ligo Esperantista, Bruxelles, fondita en 1905,
- (5) Flandra Ligo Esperantista, Brussel, fondita en 1930,
- (6) Brazilia Esperanto-Ligo, Rio de Janeiro, fondita en 1907,
- (7) Brita Esperantista Asocio, London W.11, fondita en 1904,
- (8) Centra Dana Esperantista Ligo, København, fondita en 1908,
- (9) Unuiĝo Esperantista Franca, Paris, fondita en 1898,
- (10) Hispana Esperanto-Federacio, Valencia, fondita en 1948,
- (11) Itala Esperanto-Federacio, Torino, fondita en 1910,
- (12) Jugoslavio Esperanto-Federacio, Zagreb, fondita en 1936, reorganizita en 1946,
- (13) Kroatio Esperanto-Ligo, Zagreb, fondita en 1945,
- (14) Serbia Esperantista Ligo, Beograd, fondita en 1946,
- (15) Slovenio Esperanto-Ligo, Ljubljana, fondita en 1946,
- (16) Nederlanda Esperanto-Asocio, Amsterdam, fondita en 1905,

- (17) Norvega Esperantista Ligo, Oslo, fondita en 1911,
- (18) Novzelanda Esperanto-Asocio, Wellington, fondita en 1910,
- (19) Sveda Esperanto-Federacio, Stockholm, fondita en 1906,
- (20) Svisa Esperanto-Societo, Zürich, fondita en 1902,
- (21) Esperanto Asocio de Nord-Ameriko, New York, fondita en 1905.

Ĝis la jaro 1950 estis kolektivaj membroj de UEA ankaŭ la landaj asocioj de Pollando, Ĉeĥoslovakujo, Bulgarujo kaj Hungarujo. Pro la neebleco pagi la kotizojn el tiuj landoj, kiel ankaŭ pro la plua evoluo de la politika situacio en ili, tiuj landaj asociaj estis devigitaj ĉesigi sian membrecon en UEA.

B. Landaj asocioj nealiĝintaj al UEA

Pluraj landaj asocioj ne povis ankoraŭ aliĝi al UEA ĉu pro neebleco transpigi la kotizojn al la centraj instancoj, ĉu pro manko de necesaj financaj rimedoj. Tiuj landaj asocioj, tamen, havas la saman karakteron kiel la landaj asocioj aliĝintaj al UEA, kaj tial UEA havas kun ili regulajn kontaktojn. La kunlaboro koncerne la disvastigon de Esperanto estas tute sama kiel kun la aliĝintaj landaj asocioj. Sekve, kvankam ili ne aliĝis formale al UEA, tamen ankaŭ ili estas reprezentataj antaŭ la internaciaj organismoj kaj instancoj pere de Universala Esperanto-Asocio. Jen la listo de tiuj landaj asocioj:

- (22) Bosnia-Hercegovina Esperanto-Ligo, Sarajevo, fondita en 1950,
- (23) Germana Esperanto-Asocio, München, refondita en 1947,
- (24) Gvatemala Esperantista Asocio, Guatemala, fondita en 1951,

- (25) Federacio de Islandaj Esperantistoj, Reykjavik, fondita en 1949,
- (26) Esperanto-Ligo Izraelanda, Tel-Aviv, fondita en 1949,
- (27) Japana Esperanto-Instituto, Tokio, fondita en 1919,
- (28) Maroka Esperanto-Asocio, Casablanca, fondita en 1944,
- (29) Kuba Esperanto-Asocio, Habana, fondita en 1948,
- (30) Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa, refondita en 1945,
- (31) Saarlanda Esperanto-Asocio, fondita en 1951,
- (32) Portugala Esperanto-Asocio, Lisboa, refondita en 1951,
- (33) Urugvaja Esperanto-Societo, Montevideo, fondita en 1924,
- (34) Venezuela Esperanto-Asocio, Caracas, fondita en 1951.

Krom la menciitaj landaj asocioj, ankoraŭ ekzistas societoj kaj grupoj (mankas precizaj kaj fidindaj informoj) en (35) Ĉeĥoslovakujo, (36) Hungarujo, (37) Rumanujo, (38) Ĉinujo.

Estas menciinde, ke, krom en la 38 cititaj landoj, Universala Esperanto-Asocio havas individuajn membrojn en 38 aliaj sendependaj aŭ dependaj landoj, tiel ke ĝi havas membrojn en ĉiuj partoj de la mondo kaj prave portas la nomon "Universala".

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, en 32 diversaj landoj (pri la aliaj mankis la informoj) ekzistis en la j. 1951 entute 1,064 Esperanto-societoj kaj grupoj, pri kiuj oni povis havigi fidindajn informojn. La grupoj okazigis en tiu jaro 1,200 kursojn kaj la Esperanto-organizaĵoj disvendis de la finiĝo de la dua mondmilito ĝis la fino de 1951 j. 290,680 lernolibrojn. En la monda gazetaro

aperis en 1951 9,289 artikoloj kaj informoj pri la Internacia Lingvo Esperanto; estis faritaj 684 radio-prelegetoj kaj 780 publikaj prelegoj pri la sama temo; entute estis disdonitaj pli ol 220,000 afiŝoj kaj flugfolioj. Per tiu informa laboro estis tuŝitaj ĉirkaŭ 18,000,000 da personoj. Krom la lasta cifero, kiu estas proksimuma, ĉiuj aliaj ciferoj estas minimumaj, nome pri ili CED havis fidindajn informojn (vidu detalan raporton en "Esperanto", Junio 1952).

En la j. 1952 21 landaj asocioj realigis jenan laboron sur la kampo de informado: 7,307 artikoloj; 338 publikaj prelegoj kun 19,770 ĉeestintoj; 749 radio-prelegoj, 99,800 disdonitaj afiŝoj, flugfolioj kaj broŝuroj (vidu detalan raporton en "Esperanto", Julio 1953).

Tiuj kelkaj ciferoj montras la grandan laboron kiun faras la Esperanto-organizaĵoj. La graveco ankoraŭ pli elsaltas, se oni konsideras, ke ĉio ĉi estas farata preskaŭ sen financaj rimedoj, nur dank' al oferemo de la personoj laborantaj libervole por la Internacia Lingvo.

XI

ORGANIZAĴOJ POR PRAKTIKA UTILIGO DE ESPERANTO

KONFORME al la principo de universaleco de UEA, la Statuto de Universala Esperanto-Asocio ebligas al diversaj fakaj, specialistaj kaj aliaj organizaĵoj, uzantaj Esperanton, partopreni en la aktiveco de la Asocio. Tiu kunlaboro havas grandan valoron, ĉar ĝi ne nur kontribuas al solidareco de la Esperanto-Movado ĝenerale, sed ankaŭ akcelas la disvastigon de fakaj konoj. La reciproka helpo inter UEA kaj tiuj organizaĵoj donis tre bonajn rezultojn en la lastaj jaroj.

La fakaj kaj aliaj specialaj organizaĵoj ligiĝas al UEA per kontrakto, laŭ kiu la kontraktantaj partioj devigas sin al kunlaborado kaj reciproka subteno.

La menciitaj organizaĵoj povas esti dividitaj je du ĉefaj kategorioj: (A) fakaj organizaĵoj, (B) aliaj specialaj organizaĵoj.

A. Fakaj organizaĵoj

La fakaj organizaĵoj, kiuj troviĝas en kontrakta rilato kun UEA komence de la jaro 1953 estas:

(1) *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*.—La celoj de la Ligo estas enkonduki Esperanton en lernejojn, utiligi Esperanton inter lernantoj kaj instruistoj diverslandaj per korespondado kaj vizitoj, pritraktadi per Esperanto fakajn pedagogiajn demandojn. La membroj de la Ligo estas aŭ la landaj asocioj de instruistoj-esperantistoj, aŭ individuaj instruistoj. Tiaj landaj asocioj de esperantistaj instruistoj funkcias en Germanujo, Finnlando, Francujo, Italujo, Nederlando, Britujo kaj Svedujo. La Ligo havas membrojn en multaj aliaj landoj kaj oficialajn reprezentantojn en la jenaj:

Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo, Brazilo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉinujo, Finnlando, Grekujo, Hispanujo, Irlando, Islando, Italujo, Izraelo, Kanariaj Insuloj, Kongo Belga, Maroko, Norvegujo, Novzelando, Triesto, Urugvajo, Usono.

La Ligo okazigis multajn internaciajn renkontiĝojn de geinstruistoj, organizis somerajn lernejojn, evoluigis larĝan korespondadon pri fakaj problemoj inter sia membraro.

(2) *Internacia Ligo por Esperanto en Poŝtoj, Telekomunikoj kaj Transportoj*.—La Ligo havas la celon disvastigi kaj utiligi Esperanton en la medioj de la poŝtoj, telekomunikoj kaj transportoj. La sidejo de la Ligo estas en Berno, sed la Centra Oficejo troviĝas en Parizo. La Ligo havas membrojn tra la tuta mondo kaj delegitojn aŭ reprezentantojn en: Argentino, Aŭstralio, Aŭstrujo, Belgujo, Bolivio, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Egiptujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Irlando, Japanujo, Luksemburgo, Malajo, Nederlando, Norvegujo, Novzelando, Pollando, Rumanujo, Siano, Sudafriko, Svedujo, Svislando, Usono.

(3) *Internacia Scienca Asocio Esperantista*.—La celo de la Asocio estas apliki la Internacian Lingvon en la sciencaj kaj teknikaj rondoj, kaj faciligi ĝian uzadon per ĉiaj rimedoj. La Asocio estis fondita en la j. 1906. Al ĝi kolektive aliĝis la landaj asocioj de sciencistoj-esperantistoj el Britujo, Francujo kaj Nederlando, sed ĝi havas oficialajn reprezentantojn kaj membrojn en: Argentino, Aŭstrujo, Brazilo, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Japanujo, Jugoslavio, Meksikio, Nederlando, Norvegujo, Pollando, Svedujo, Svislando kaj Usono. La organo de la Asocio estas "Scienca Revuo", sed la menciitaj landaj asocioj eldonas siajn organojn "Scienco kaj Tekniko", "Scienca Ligilo" kaj "Mededelingen".

(4) *Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio*.—La celo

de la Asocio estas kunigi ĉiujn ĵurnalistojn, kiuj scias Esperanton, por komuna kunlaboro kaj kunhelpo rilate al korespondado, interŝanĝo de artikoloj, enketoj, informoj pri diversaj demandoj. Ĝia oficiala organo estas "TEĴA-Informilo". Ĝi havas membrojn en diversaj landoj.

(5) *Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio*.—La celo estas disvastigi Esperanton en medicinaj medioj kaj utiligi la lingvon por fakaj medicinaj celoj. Membraro en diversaj landoj. La Asocio estis fondita en la j. 1908 kaj dum sia ekzistado eldonis plurajn fakajn verkojn, el kiuj estas aparte menciinda la "Esperanta Teknika Medicina Vortaro" de Doktoro Briquet.

(6) *Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj*.—La celo de la Federacio estas disvastigi la Internacian Lingvon inter la fervojistoj kaj utiligi ĝin por progresigi la fakajn interesojn de la membraro. La Federacio estis fondita la 4-an de Aŭgusto 1948 en Amsterdamo. La membraro kreskis de 250 en 1948 al 1168 en 1953. La Federacio okazigis ĝis nun 5 kongresojn. La lasta kongreso, okazinta en Utrecht (Nederlando) en Majo 1953, decidis ke la Federacio faru kontraktan aranĝon pri kunlaboro kun UEA. La sekretario de la Federacio estas en Amsterdamo.

B. Aliaj specialaj organizaĵoj

La aliaj specialaj organizaĵoj, kiuj troviĝas en kontrakta rilato kun UEA komence de la jaro 1953, estas:

(1) *Universala Ligo*.—La Ligo estis fondita en Hago la 14-an de Aprilo 1942 jaro. Ĝia Centra Oficejo estas en Hago. La celo de Universala Ligo estas propagandi la ideon de mondfederacio kaj mondregistaro, edukadi la popolojn al la mondcivitaneco. La oficiala lingvo de la Ligo estas Esperanto. La Ligo havas membrojn en ĉiuj landoj de la mondo kaj ĝi mem estas membro de la Mondmovado por Mondfederacio (*World Movement*

for World Federal Government). La organo de la Ligo estas "La Praktiko".

(2) *Internacia Asocio de Poŝtmarkkolektantoj*.—La celo de la Ligo estas kontaktigi pere de Esperanto la kolektantojn de diversaj landoj kaj ĝenerale helpi la filatelistojn en ilia okupiĝo. Membroj en diversaj landoj. Sidejo en Göteborg, Svedujo.

(3) *Skolta Esperantista Ligo*.—La Ligo estis fondita en la j. 1918. Ĝiaj celoj estas disvastigi la skoltajn idealojn per Esperanto kaj disvastigi Esperanton inter ĉiulandaj skoltoj. La sidejo de la Ligo estas en Anglujo. La Ligo havas siajn membrojn kaj agentojn en: Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Irlando, Italujo, Kanado, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Tunisio kaj Usono.

(4) *Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo*.—La organizo estis fondita en 1938. Ĝia celo estas konsciigi la junularon pri tutmonda frateco kaj akceli tion per la disvastigo de Esperanto inter la junularo, aranĝado de internaciaj renkontiĝoj, korespondado. La Organizo aranĝas ĉiujare apartan internacian junularan kunvenon. Post la milito tiaj kunvenoj, kiujn partoprenis po kelkaj centoj da junuloj el diversaj landoj, estis organizitaj en Francujo, Germanujo, Danlando kaj aliaj landoj. La oficiala organo de la Organizo estas la revuo "La juna vivo".

(5) *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista*. — La Unuiĝo estis fondita en 1910. Ĝia celo estas servi per Esperanto al katolikismo. La Unuiĝo havas membrojn en la tuta mondo kaj reprezentantojn en 10 diversaj landoj.

(6) *Kristana Esperantista Ligo Internacia*.—La celo de la Ligo estas krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj eklezioj. La Ligo havas membrojn en la tuta mondo kaj reprezentantojn en 17 diversaj landoj.

(7) *Kvakera Esperantista Societo*.—La Societo estis fondita en la jaro 1921. Ĝia celo estas dissemi la kvakerismon. Membroj en diversaj landoj.

Krom la menciitaj organizaĵoj, ekzistas ankaŭ aliaj, kiuj ne estas ankoraŭ ligitaj al UEA.

La laboristoj esperantistoj fondis en la jaro 1921 sian tutmondan asocion sub la nomo *Sennacieca Asocio Tutmonda*. Ĝia celo estas utiligi Esperanton por la interesoj de la laboristaro, plifaciligi la rilatojn inter la membroj kaj fortikigi ĉe ili la senton de homeca solidaro, klerigadi siajn membrojn, servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, peradi kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo, spegulanta la idealon de la Asocio. SAT havas nun sian sidejon en Parizo, kie troviĝas ankaŭ la redakto de ĝiaj organoj “Sennaciulo” kaj “Sennacieca Revuo”. Ĝi havas membrojn en multaj landoj kaj ĉiujare organizas apartajn internaciajn kongresojn, kiujn ĉeestas meze ĉ. 1,000 reprezentantoj el diversaj landoj. Ĝis nun okazis 26 internaciaj kongresoj de SAT. La lasta estis en Aŭgusto 1953 en Sheffield (Britujo).*

Fine, oni devas aldoni, ke pluraj neesperantistaj organizaĵoj kaj movadoj utiligas Esperanton por siaj celoj. Tiaj, ekzemple, estas *International Friendship League* kun la sidejo en Londono (apoganta asocio de UEA), la granda japana movado Oomoto kun la sidejo en Kameoka (Japanujo), Londona Kooperativa Societo, Danaj junulargastejoj, Internacia organizaĵo de ŝakistoj (kies organo estas redaktata ankaŭ en Esperanto) kaj aliaj.

* Pri SAT vidu la verkon Historio de SAT, Parizo, 1953.

Tria parto

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Nuda paĝo por teni la vicordon de
la originaj paĝoj

XII

HISTORIO DE UEA

POR sukcese disvastigi kaj utiligi la Internacian Lingvon estis necese krei taŭgajn organizaĵojn. La aŭtoro de Esperanto antaŭvidis, tute konforme al sia universaleca koncepto, ligon de individuaj adeptoj, senkonsidere al ilia nacia aparteno. Tamen tiu ideo ne trovis favoran grundon en la komenco. Ĝi povis realiĝi nur kelkajn jarojn poste.

Kontraŭe al tiu universalisma koncepto pri Esperanto-organizaĵo, formiĝis tre frue ankaŭ alia koncepto, kiu antaŭvidis la organiziĝon de la personoj agantaj por Esperanto ne sur plano internacia, sed en kadroj naciaj. Tiu koncepto precipe baziĝis sur la fakto, ke la disvastigon de la lingvo povas pli facile realigi organizaĵoj funkciaj en la unuopaj landoj ol organizaĵoj universalaj, supernaciaj.

La dua tendenco komencis realiĝadi pli frue. Ekestis unue lokaj grupoj, ekzemple tiu de Nürnberg, fondita jam en la jaro 1888. Tiuj grupoj havis la tendencon etendi sian agadkampon ne nur al la koncerna loko, sed ankaŭ al ĝia ĉirkaŭaĵo kaj eĉ al la tuta lando. Tiam karakteron sendube havis la societo en Uppsala, tiu de Peterburgo kaj ankaŭ aliaj. Escepton faras Francujo, kie jam en la jaro 1898 estis fondita tutlanda asocio kun la nomo Franca Societo por la Propagando de Esperanto. Kiel diras la nomo, temis pri organismo kuniganta la lokajn grupojn kun pli malpli sama celo: disvastigi la lingvon per informoj kaj artikoloj, organizi kursojn, kunigi la simpatiantojn kaj militantojn.

Post la jaro 1900 komenciĝis ĉie en Eŭropo grand-skala publika agado por la Internacia Lingvo. Aperis multaj artikoloj, okazis prelegoj, organiziĝis kursoj,

fondiĝis granda nombro da grupoj. La rezulto de tiu aktiveco estis fondiĝo de novaj Esperanto-grupoj, kiuj baldaŭ unuiĝis formante landajn asociojn. La dua tutlanda societo estis fondita en la jaro 1903 en Svislando. Sekvis la Brita en 1904, Germana en 1905 kaj aliaj. En la fino de la jaro 1910 ekzistis entute 12 tutlandaj societoj.

La organiza strukturo de tiuj organizaĵoj estis jena:

(a) Lokaj grupoj, kunigantaj la simpatiantojn kaj agantojn kun la celo praktiki la lingvon, disvastigi ĝin, instrui. Tendenco neŭtraleca, sen politika aŭ religia aspekto, sed kun forte akcentita ideo de universalismo kaj tutmonda paco.

(b) Landa asocio, kuniganta la lokajn grupojn kaj la unuopajn esperantistojn kun la celo centriĝi precipe la laboron koncerne informadon, reprezentadon de la movado ĉe la landaj aŭtoritatoj kaj eldonadon de Esperantlingva organo (kelkfoje kun iom da nacilingva teksto).

Tiu organizformo montriĝis ĝenerale bona kaj celkonforma. Ĝi restis proksimume la sama ĝis la hodiaŭa tago.

En la jaro 1905, kiam okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne sur Mer, estis solvota la demando pri internacia organizaĵo, kiu kunligus ĉiujn agantajn esperantistojn en mondaj kadroj. Tiu kongreso, gravega sendube en la historio de la Internacia Lingvo, tamen ne solvis la organizan demandon. La Kongreso formis la tiel nomatan *Lingvan Komitaton* kun la *Akademio de Esperanto*, sed la celo de tiu organismo ne estis disvastigi la lingvon aŭ krei praktikajn servojn pere de la lingvo. Ĝia celo limiĝis al kontrolado de la lingvoevoluo kaj tian karakteron havas ankaŭ hodiaŭ la *Akademio de Esperanto*, reorganiziĝinta post la dua mondmilito.

Ĉar la manko de centra internacia organizaĵo sentiĝis ĉiam pli forte, estis kreita en Parizo (en 1905) la *Esperantista Centra Oficejo* dank' al malavara financa helpo de la fama Franca Esperantisto, Generalo Hyppolite Sebert. La oficejo fariĝis vera centro por ĉiuj laboroj koncerne la disvastigon de la lingvo, dokumentadon kaj kongresojn. Por la internaciaj kongresoj estis kreita en 1906 aparta *Konstanta Kongresa Komitato*, kies sidejo estis ĉe la Esperantista Centra Oficejo en Parizo. La Esperantista Centra Oficejo funkciis ĝis la jaro 1920 kaj plenumis la menciitajn taskojn.

Jaron post jaro, precipe post la unua Universala Kongreso de Esperanto, sentiĝis, ke Esperanto sen reala internacia praktikado ne havos altirpovon por la reale pensanta mondo. La ideoj kristaliĝis en la propono farita de A. Carles al la Dua Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Genève en la jaro 1906. Tiu propono tekstis:

“Estus oportune havi en multaj urboj konsulojn, al kiuj oni povus ĉiam sukcese sin turni kaj de kiuj oni povus ricevi ĉiujn petitajn sciigojn, ĉe privatajn informojn pri komercistoj. Ankaŭ la vojaĝantoj ĉiam sciis, kien ili povus sin prezenti por ricevi bonan akcepton kaj ĉiujn postultitajn informojn, ne ĝenante iun ajn.”

La Kongreso rekomendis al la societoj kaj grupoj, ke ili realigu la proponon kie ajn tio estas ebla. Tiu ĉi bonintenca forŝovo de la propono al la grupoj malatentis la neceson de speciala organizo kaj de aparta centro. Tiamaniere la propono estis praktike enterigita.

Preskaŭ du jarojn poste la proponon reprenis Th. Rousseau kaj H. Hodler. En serio da artikoloj Hector Hodler skizis la novan organizaĵon kaj en la numero 30 de la 1-a de Majo 1908 de la gazeto “*Esperanto*” aperis la informo pri la fondo de *Universala Esperanto-Asocio*. La unua oficiala informilo en la sama numero donis la formalajn kaj praktikajn detalojn pri UEA.

Simpla, servopreta, malmultekosta—jen la ĉefaj kvalitoj, kiuj kaŭzis la rapidan kreskon de Universala Esperanto-Asocio.

La unua kunveno de UEA okazis en Dresden en la jaro 1908 dum la kvara Universala Kongreso de Esperanto. La tagordo enhavis la raportojn de la fakoj tiam ekzistantaj, nome (1) administrado, (2) konsuloj kaj oficejoj, (3) turismo. La Jarlibro de la nova organizaĵo, aperinta antaŭ la Kongreso, indikis la tiaman staton de UEA: 206 delegitoj, 46 vicdelegitoj, 94 subdelegitoj, 62 Esperanto-oficejoj, el kiuj 22 plene organizitaj; ĉio en 249 lokoj kaj 23 landoj; pagintaj membroj: 1223.

La eksplodo de la unua mondmilito trafis UEA en la plej bona stato: solida situacio financa, ĝenerala fido ĉe la esperantista publiko, klaraj gvidlinioj, kontentiga membrostato. Tre gravis, ke la delegitoj de UEA en la militantaj landoj ne estis kaptitaj de la milita spirito. Tio permesis al la Centra Oficejo de UEA en Svislando daŭrigi la kutiman laboron kaj entrepreni la gravegan taskon helpi al la viktimoj de la milito.

Kiam la 11-an de Novembro 1918 eksilentis la kanonoj, UEA reprenis sian regulan laboron. La membraro denove rapide kreskis: en 1920 ĝi estis 3894, en 1927 ĝi estis 9100.

La ĉefaj karakterizoj de UEA, laŭ la provizora regularo aperinta en “Esperanto” de la 12-a de Majo 1908, estis la jenaj:

- (a) La celo de la asocio estas la plifaciligo de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter la membroj.
- (b) UEA estas neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco.

- (c) La sola oficiala lingvo estas Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika vortaro.
- (d) La membroj estas individuaj, t.e. la membro rekte aliĝas al la Asocio, kaj ne pere de sia loka grupo aŭ landa societo.
- (e) En la lokoj, kie por tio ekzistas ebleco, unu el la membroj estas delegito (lia adreso aperas en la Jarlibro) kaj li libervole plenumas diversajn praktikajn servojn por la membroj, kiuj sin turnas al li.

Tiuj principoj restis, kun malgrandaj modifoj, la fundamentaj principoj de UEA ĝis la hodiaŭa tago. La solan escepton parte faras la principo menciita sub (d), kiel oni vidos el la sekvanta ĉapitro.

La financajn rimedojn por bona funkciado de la organizaĵo donis la kotizoj de la membroj.

Per fondiĝo de Universala Esperanto-Asocio estis plenigita grava manko en la ĝistiam Esperanto-Movado. UEA estis ĝuste tiu organismo, kiu ebligis larĝan utiligon de la lingvo por la ĉiutagaj bezonoj de la Esperantistoj. Sed la fondiĝo tamen ankoraŭ ne solvis la organizan problemon en ĝia tuteco. En la jaro 1910, por preni fiksitan punkton, ekzistis kiel organizaĵoj de la Esperanto-Movado:

1. *Landaj asocioj* kun lokaj societoj, grupoj aŭ kluboj en pluraj centoj da lokoj de la mondo. Ilia celo estis disvastigi la lingvon en la landaj aŭ lokaj kadroj.
2. *Universala Esperanto-Asocio* kun individuaj membroj, delegitoj, internacia komitato kaj kun administra centro en Ĝenevo. Ĝia celo: praktika utiligo de la lingvo en internaciaj kadroj.
3. *Esperantista Centra Oficejo* en Parizo kun la celo

disvastigi la lingvon precipe en internaciaj kadroj kaj servi kiel Centro de Dokumentado.

4. *Konstanta Kongresa Komitato* kun la sidejo en Parizo kaj kun la celo organizi universalajn kongresojn de Esperanto.
5. *Lingva Komitato kaj Akademio de Esperanto*, konsistantaj el la plej elstaraj konantoj de la lingvo kaj kun la celo observi la lingvoevoluon (lingvaj institucioj).

Se oni esceptas la lingvajn instituciojn, oni klare vidas, ke la du tendencoj de la Esperanto movado—unuflanke la disvastiga-instrua, aliflanke la praktika—esprimiĝis en du ĉefaj centroj: la unua estis en Parizo, la dua en Ĝenevo. Tiuj du tendencoj samtempe esprimis la du principojn: unu nacia, la alia supernacia.

Tiu ĉi dueco daŭris ĝis la jaro 1922, kiam la Universala Kongreso en Helsinki aprobis principaron, laŭ kiu la du branĉoj de la Esperanto-Movado povis kuniĝi. La landaj asocioj delegis po unu reprezentanto al internacia organismo, kies nomo estis “*Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj Esperantistaj*”. La Konstanta Reprezentantaro, unuflanke, kaj la Universala Esperanto-Asocio, aliflanke, elektis 7-membran organon, kies titolo estis *Internacia Centra Komitato* de la Esperanto-Movado. Tiu Komitato, do, reprezentis ambaŭ branĉojn de la tiama Esperanto-Movado kaj ĝi bone plenumis sian taskon dum pluraj jaroj.

Kun la tempo, tamen, ĝi montriĝis ne sufiĉe efika, ĉar ĝi ĉiam dependis de la du komitatoj—tiu de UEA kaj tiu de KoRo—kiuj estis absolute sendependaj. Dum la Pariza Kongreso en 1932 la KoRo nuligis la Kontrakton de Helsinki, kaj oni elektis komisionon por ellabori novan statuton de internacia organizaĵo. UEA ne partoprenis en la laboroj de tiu komisiono. Sekve oni starigis novan organizaĵon sub la nomo Universala Federacio Esperantista (UFE), al kiu

aliĝis la pli gravaj landaj asocioj. En la jaro 1933, dum la Universala Kongreso en Kolonjo, la reprezentantoj de UEA kaj UFE faris interkonsenton, konatan sub la nomo "Interkonsento de Kolonjo". Laŭ tiu interkonsento UFE estis likvidita kaj UEA fariĝis federacio de landaj asocioj, sed al ĝi plue povis aliĝi individuaj membroj. La lastaj pagis pli altan kotizon kaj ricevadis aŭ la Jarlibron, aŭ la Jarlibron kaj la organon de la Asocio "Esperanto". La gvidado de UEA troviĝis en la manoj de Internacia Komitato, kiu estis elektata de la landaj asocioj kaj de la delegitoj. Tiu komitato elektis la Centran Estraron de UEA. La supera instanco, tamen, estis la ĝenerala voĉdonado de la delegitoj aŭ de la "aktivaj" membroj, kaj ne de la landaj asocioj.

En la jaro 1934, dum la Universala Kongreso en Stokholmo, estis elektita la nova Estraro de UEA sub prezido de Generalo Louis Bastien el Parizo. La nova Estraro havis grandajn malfacilaĵojn pro la malbona financa situacio de UEA. Kiam en la jaro 1936 mortis la direktoro de UEA R. Kreuz kaj la nova direktoro fariĝis C. C. Goldsmith, la Komitato decidis transporti la sidejon de UEA al Londono. Tiu decido estis aprobita de 80% de la delegitoj en la ĝenerala voĉdonado. Parto de la Svisaj membroj de UEA ne estis kontenta pri tiu solvo, sed nepre deziris konservi la sidejon de UEA en Ĝenevo. La klopodoj pri interkonsento ne sukcesis kaj tial la Komitato decidis dum la Universala Kongreso en Vieno fondi novan asocion kun la sidejo en Londono. Tiele, la 18-an de Septembro 1936 ekfunkciis la nova organizaĵo kun la nomo *Internacia Esperanto-Ligo*. Post kelkaj monatoj la Ligo translokiĝis al Rickmansworth, proksime de Londono, kie ĝi ricevis donace domon. Laŭ la Statuto de IEL, la supera instanco en la nova organizaĵo estis la ĝenerala voĉdonado de la landaj asocioj. La granda plimulto de la aktivaj membroj kaj preskaŭ ĉiuj landaj asocioj aliĝis

al IEL. La malnova UEA daŭrigis sian laboron, denove nur kun individuaj membroj, sed ili estis tiel malmultaj, ke UEA ne povis disvolvi ian ajn pli rimarkindan aktivecon. La organo de UEA restis "Esperanto", dum IEL eldonadis sian monatan organon sub la nomo "Esperanto Internacia". Ĉiu el la asocioj eldonadis sian Jarlibron.

Tiel komenciĝis la konata disdiĝo de la neŭtrala Esperanto-Movado.

Krom la financaj kaŭzoj, kiuj troviĝis en la radiko de tiu konflikto, estis ankaŭ aliaj, principaj motivoj. Unu el la ĉefaj estis, ke, laŭ la koncepto de pluraj gvidantoj de la malnova UEA, la Asocio havis la taskon krei praktikajn servojn, sed ne gvidi la tutan Esperanto-Movadon. Male, laŭ la koncepto de la pli junaj gvidantoj de la Movado en diversaj landoj, la tasko de UEA devis esti ne nur krei kaj evoluigi la praktikajn servojn, sed ankaŭ gvidi la Movadon. La sekvo de la unua koncepto estis, ke UEA devas havi nur individuajn membrojn. Kontraŭe, laŭ la alia koncepto, UEA devis konsisti kaj de la landaj asocioj kaj de individuaj membroj. La unua principo restis en la fundamento de la malnova UEA, la dua realiĝis en la nova organizaĵo, en IEL.

IEL rapide kreskis. En la jaro 1938 ĝi havis pli ol 13,000 membrojn en 60 landoj. IEL dediĉis specialan atenton al la informado. Por tiu celo ĝi kreis apartan sektion kun la nomo "Filia Oficejo de IEL—Propaganda Fakto" sub la honorofica gvidado de E. Malmgren en Stokholmo. Tiu fakto dum 10 jaroj kreis bonan kontakton kun la landaj asocioj kaj liveris multajn realecajn proponojn pri la agado sur la kampo de informado al la landaj asocioj. Granda parto de tiuj proponoj estis bone utiligita.

IEL, same kiel UEA, funkciis ankaŭ dum la pasinta mondmilito. Je la fino de 1946 IEL havis preskaŭ

16,000 membrojn en pli ol 60 landoj. En tiu jaro komenciĝis la traktadoj inter la reprezentantoj de UEA kaj IEL kun la celo reunuigi la neŭtralan Esperanto-Movadon. Post pluraj klopodoj trovi konvenan organizformon, kiu esprimus la faktajn bezonojn de la Esperanto-Movado en la novaj postmilitaj kondiĉoj, en la jaro 1947 estis subskribita interkonsento, laŭ kiu la du organizaĵoj kunfandiĝis sub la nomo *Universala Esperanto-Asocio*. La kunfandiĝo okazis la 28-an de Aprilo 1947 kaj ĝin aprobis per voĉdonado la kompetentaj instancoj de ambaŭ organizaĵoj. La statuto de UEA estis reviziita en Aŭgusto 1948 kaj laŭ tiu nova statuto UEA funkcias ankaŭ hodiaŭ.

La bona funkciado de la organizaĵo inter 1947 kaj la hodiaŭa tago evidente pravas, ke ĝuste tio estis la solvo, kiu respondas al la bezonoj de la nuntempo.

XIII

LA NUNA ORGANIZA FORMO DE UEA

LA 28-an de Aprilo 1947 ekfunkciis la reorganizita Universala Esperanto-Asocio, kiu, konservante ĉiujn fundamentajn principojn de la estinta UEA, unuflanke, kaj la taŭgajn organizformojn de la landaj asocioj kun la lokaj grupoj, kiel ankaŭ de internaciaj fakaj asocioj kun naciaj sekcioj, aliflanke, sukcesis en tre konvena formo kunligi ĉiujn elementojn de la neŭtrala Esperanto-Movado. La nova Statuto de UEA prezentas kompromisan solvon de la principo universaleca, supernacia kaj de la principo landa, nacia. Ĝi samtempe prezentas sintezon de la du fundamentaj tendencoj: la tendenco disvastigi la lingvon kaj la tendenco praktike utiligi ĝin. UEA nun kunligas landajn kaj fakajn asociojn (kolektiva principo) kaj unuopajn esperantistojn tra la mondo (individa principo).

A. Celo kaj fundamentaj principoj

Laŭ la Statuto, la celoj de UEA estas: disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto; plifaciligi ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen ia ajn diferenco pri ilia nacieco, raso, religio aŭ lingvo; kreskigi inter la membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj; zorgi pri la kunagado de esperantistaj organizaĵoj; krei internaciajn servojn, uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj transiras la limojn de ilia nacia aŭ lingva teritorio; okazigi universalajn kongresojn de Esperanto kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn (Art. 3 de la Statuto).

Universala Esperanto-Asocio estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj. Tamen, UEA klare deklaris en la artikolo 4 de sia Statuto, ke la respekto de la Homaj Rajtoj estas esenca kondiĉo de ĝia laboro. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur nepolitika bazo klopodas efektivigi ideojn, identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio (Art. 4 de la Statuto).

Kiel oni vidas, kvankam politike neŭtrala, UEA akceptas kiel unu el la fundamentaj principoj de sia agado la respekton de la Homrajtoj kun ĉiuj konsekvencoj, kiujn havas tiu principo. La afero de Internacia Lingvo povas progresi nur en kondiĉoj de amikecaj rilatoj inter la popoloj, esence egalaj inter si en kondiĉoj de libereco. Siavice la Internacia Lingvo, kiel estas akcentite aliloke, treege kontribuas al plifortikigo de tuthoma solidareco. Tial estis necese klare akcenti en la Statuto, ke la neŭtraleco de UEA neniel signifas pasivecon rilate al la fundamentaj Homaj Rajtoj. Laŭ la karaktero mem de la Internacia Lingvo, UEA devas havi pozitivan starpunkton rilate al ĉiuj movadoj, kiuj fortikigas la ideon pri rasa, nacia, religia kaj lingva egaleco de la homoj, sed aliflanke ĝi devas havi negativan starpunkton rilate al ĉiuj tendencoj, kiuj detruas aŭ klopodas detrui la principon de egaleco, libereco kaj frateco.

B. Konsisto (Membreco)

Universala Esperanto-Asocio konsistas el:

1. *Landaj asocioj*, sub kio oni komprenas asociojn, kies aktiveco etendiĝas sur difinita teritorio, kutime sur la teritorio de la koncerna ŝtato. La interna organizformo de tiuj asocioj malmulte varias de lando al lando. Ĉiu landa asocio (nomata ankaŭ societo, federacio k.s.) konsistas el lokaj grupoj, kluboj, societoj kaj ankaŭ el individuaj membroj. La landaj asocioj

membrigas al UEA ĉiujn siajn membrojn kaj pagas por ĉiu el ili tre malaltan jaran kotizon. Tiuj membroj nomiĝas “asociaj membroj” kaj ili rajtas uzi ĉiujn servojn de UEA.

2. *Fakaj asocioj*, sub kio oni komprenas internaciajn Esperanto-organizaĵojn pri diversaj fakoj. La fakaj asocioj faras kun UEA kontrakton pri kunlaborado kaj interŝanĝado de servoj.

3. *Individuaj membroj*, nome personoj, kiuj estas individue enlistigitaj de la Asocio. Krom la membrokarto kaj la membromarko, kiu rajtigas ilin al diversaj servoj de la Asocio, ili ricevas ankaŭ la eldonaĵojn de UEA. Ekzistas pluraj kategorioj de individuaj membroj kaj ankaŭ iliaj kotizoj estas variaj. Kelkaj ricevas nur la Jarlibron de la Asocio, kiu aperas ĉiujare, dum aliaj ricevas ankaŭ la oficialan organon “Esperanto”, kiu aperas ĉiumonate.

Fine de 1953 UEA konsistis el 21 landaj asocioj (vidu la liston en ĉapitro X de tiu ĉi studo), el 13 fakaj asocioj kaj el 1 apoganta asocio. Ĝi havis membrojn en 84 diversaj landoj kaj ĝi reprezentis entute 16,861 organizitajn esperantistojn kaj ĉirkaŭ 380,000 personojn, kiuj parolas la Internacian Lingvon. Tiuj ĉi ciferoj konstante kreskas.

C. Organoj

La ĉefaj organoj de Universala Esperanto-Asocio estas:

1. *La Komitato*, kiu estas iaspeca internacia parlamento de la Esperanto-Movado. Pro la principoj, sur kiuj baziĝas UEA (kolektiva kaj individua), la Komitato konsistas el tri kategorioj de komitatanoj:

(a) Komitatanoj, kiujn elektas la landaj kaj fakaj asocioj, aliĝintaj al UEA, proporcie al la nombro de siaj membroj;

(b) Komitatanoj, kiujn elektas difinita kategorio de individuaj membroj (la delegitoj) el internacia listo, por ĉiuj 250 delegitoj 1 komitatano;

(c) Komitatanoj, kiujn alektas la komitatanoj A kaj B ĝis unu kvarono de sia propra nombro inter la plej konataj esperantistoj de la mondo.

Tiamaniere la Komitato reprezentas kaj la landajn kaj la fakajn asociojn kaj la individuajn membrojn. Ĝi respegulas la konsiston de la Asocio kaj ĝi estas sintezo de la principo supernacia kaj de la principo nacia. Ĉiuj komitatanoj havas absolute egalajn rajtojn.

La Komitato fiksas la ĝeneralan agadon de la Asocio, donas direktivojn al la Estraro, decidas pri la budĝeto kaj kontrolas ĝian efektivigon. Ĝi ankaŭ elektas la Estraron de UEA.

2. *La Estraro* konsistas el prezidanto, vicprezidanto, redaktoro kaj 2 ĝis 4 pliaj estraranoj. La Estraro efektivigas la direktivojn de la Komitato, okazigas la Universalajn Kongresojn kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn, kontrolas la ekzistantajn servojn de la Asocio kaj kreas novajn servojn aŭ aranĝojn. Pri sia laboro la Estraro respondecas al la Komitato.

La Komitato kaj la Estraro laboras ĉefe per cirkuleroj. La Komitato kunvenas minimume unu fojon en la jaro, dum la Universala Kongreso. La Estraro kunvenas minimume du fojojn en la jaro. En la decidoj validas la plimulto de la voĉdonintoj. Ĉiuj komitatanoj kaj estraranoj plenumas sian laboron honorofice.

La nuna Estraro de la Asocio konsistas el: prezidanto E. Malmgren (Svedo), vicprezidanto D. Kennedy (Skoto), Hans Jakob (Sviso), redaktoro de la organo, D-ro P. Kempeneers (Belgo), Prof. I. Lapenna (Kroato, Jugoslavio), A. C. Oliver (Anglo), J. Guillaume (Franco).

D. Centroj

La Asocio havas sian *Centran oficejon* en Heronsgate, Rickmansworth (apud Londono) en sia propra domo. Ĝin administras la ĝenerala sekretario de la Asocio Cecil C. Goldsmith. La Centra oficejo administras la tutan Asocion kaj precipe zorgas pri aliĝoj kaj kotizoj, pri la Jarlibro kaj administrado de la revuo, pri la adresaro de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj tra la tuta mondo. Ankaŭ la jara Universala Kongreso de Esperanto estas organizata de la Centra oficejo sub kontrolo de la Estraro. La Centra oficejo havas apartan libroservon kaj liveras esperantlingvajn verkojn al ĉiuj partoj de la mondo.

En Ĝenevo (Palais Wilson) funkcias la *Serva Centro* de UEA sub la honorofica administrado de Hans Jakob. La ĉefaj taskoj de la Serva Centro estas la aranĝado kaj plenumo de la servaro precipe pri esperantista interhelpo, hotela servo, reklama servo, turisma servo, eldono de ŝlosiloj de Esperanto (pri la ŝlosiloj vidu ĉapitron III de tiu ĉi libro). Krome en la Serva Centro estas redaktata la oficiala organo de UEA.

La 1-an de Januaro 1952 ekfunkciis en Londono la *Centro de Esploro kaj Dokumentado* pri la Internacia Lingvo, kies honorofica direktoro estas D-ro Ivo Lapenna, eksprofesoro ĉe la Universitato en Zagreb. La Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) estas scienca institucio kies taskoj estas: esploroj pri la Internacia Lingvo, pri la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de Esperanto, pri la eblecoj de plua utiligo de la Internacia Lingvo, precipe sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco. La Centro, krome, kolektas kaj ordigas ĉiujn plej gravajn dokumentojn, studojn kaj disertaciojn pri la Internacia Lingvo. Surbaze de tiuj laboroj ĝi organizis vastan informadon

al gravaj internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj, antaŭ ĉio al UNO, UNESKO kaj aliaj. Al ili ĝi regule sendas dokumentojn pri la atingaĵoj de la Internacia Lingvo sur diversaj kampoj de la vivo. Komence de la jaro 1953, la Centro havis 74 kunlaborantojn en 18 landoj.

La Asocio havas sian bibliotekon en Ĝenevo. Kun la biblioteko estas ligita ankaŭ la arĥivejo de la Asocio precipe por la epoko inter 1908 kaj 1947.

La Asocio aranĝas ĉiujare Universalan Kongreson pere de la Loka Kongresa Komitato, konsistanta el elstaraj lokaj esperantistoj kaj helpata de la Konstanta Kongresa Sekretario, kiu estas oficisto de la Asocio.

Tiamaniere la ĉefaj branĉoj de la Esperanto-Movado nun estas kunigitaj en la Universala Esperanto-Asocio.

Multflanka estas la agado de UEA sur plej diversaj kampoj. En la sekvantaj ĉapitroj estos prezentitaj nur tiuj aspektoj de ĝia aktiveco, kiuj precipe kontribuas al internacia interkompreniĝo, toleremo, interfratiĝo kaj tutmonda paco.

XIV

KULTURA AGADO DE UEA

LA tuta agado de UEA estas esence kultura. La laboro koncerne la disvastigon kaj la ĉiuf flankan evoluigon de la Internacia Lingvo, la eldonado de lernolibroj kaj vortaroj, la instruado, la klopodoj kaj helpoj sur kampo de literaturo kaj gazetaro k.t.p., k.t.p., ĉio ĉi reprezentas grandan kulturen aktivecon en tutmondaj kadroj. Ekzistas, tamen, kelkaj kulturaj manifestacioj, organizataj de UEA, kiuj pro sia unikeco meritas apartan atenton.

A. Internacia Somera Universitato

Jam antaŭ la milito, ek de la j. 1925, la organizantoj de universalaj kongresoj venis al la ideo, ke estus utile eluzi tian grandan internacian kunvenon por diskonigo de la akiraĵoj de la scienco. Tiucele estis organizitaj prelegoj de fakuloj pri diversaj temoj. Ekzemple, la 17-a Universala Kongreso de Esperanto en Genevo enhavis serion da prelegoj, kiujn oni nomis "Somera Universitato".

La tiamaj klopodoj havis iom improvizitan karakteron kaj oni ne estis sukcesintaj krei firman institucion, bazitan sur sciencaj principoj kaj koncerne la temaron kaj koncerne la personojn de la prelegantoj. Ne ekzistis statuto, kiu reguligus tiujn demandojn.

Post la dua mondmilito estis renovigitaj la klopodoj kaj estis akceptita la regularo de Internacia Somera Universitato (ISU). Laŭ la artikolo 1 de la Regularo, la ISU estas speciala kultura institucio de Universala Esperanto-Asocio. Ĝia celo estas popularigi ĉiujn sciencajn kaj artajn branĉojn pere de la Internacia Lingvo kaj evoluigi la Esperantan sciencon kaj priartan

literaturon. En la ISU rajtas prelegi universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj, kiuj havas la rajton instrui en universitatoj aŭ en samrangaj lernejoj laŭ la leĝoj de siaj landoj. Escepte povas prelegi ankaŭ aliaj rekonitaj fakuloj, sed ilia nombro devas ne superi la nombron de prelegantoj, kvalifikitaj por supera instruado (Art. 2).

La ISU regule funkcias dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj ĉiu laborperiodo daŭras 7 tagojn. Estas antaŭvidite, ke kun la tempo, se la financa situacio tion permesos, la ISU funkcios ekster la kadro de la universalaj kongresoj en iu grava universitata centro dum la feriaj monatoj.

Ĝis nun okazis ses serioj da prelegoj de la novefondita ISU. La unua serio estis en Malmö (Svedujo), la dua en Bournemouth (Britujo), la tria en Parizo (Francujo), la kvara en Munkeno (Germanujo), la kvina en Oslo (Norvegujo). La sesa laborperiodo okazis en Zagreb (Jugoslavio) en Julio-Aŭgusto 1953.

La ISU havas tri ĉefajn branĉojn:

1. *Naturaj sciencoj*.—En tiu ĉi branĉo estis faritaj pluraj preleg-serioj, ekzemple: Astronomiaj Sensacioj (Prof. K. Lundmark, Svedujo), El la Fronto kontraŭ la Malamikoj de la Kulturplantoj (D-ro P. Neergaard, privata docento en Kopenhago, Danlando), Ĉu oni Povas Vidi la Atomojn? (D-ro Hugo Sirk, profesoro en Vieno, Aŭstrujo), Diversaj Aspektoj de la Elektro kaj Aplikado de Koloroj (D-ro W. J. Nijveld, Nederlando), La Kolorfotografado (D-ro D. R. Duncan, Britujo), La Ŝimfungoj en la Hejmo (D-ro Paul Neergaard, Danlando) k. a.

2. *Sociaj sciencoj kaj filozofio*.—En tiu ĉi branĉo estas menciindaj la prelegoj: La Laponoj kiel Kultura Popolo (Prof. Björn Collinder, Svedujo), Pri la Sveda Koopera Movado (Rektoro S. A. Stahre, Svedujo), Internaciaj geedziĝoj kaj Privata Internacia Juro

(Ed. L. Johnson, M.A., LL.B., docento en la Universitato de Durham, Britujo), Demokrata Edukado (Rektoro Karl Söderberg, Uppsala, Svedujo), UNESKO (E. D. Durrant, Londono, Britujo), La Gramatika Strukturo de la Angla Lingvo Kompare kun tiu de Esperanto (D-ro E. D. Collinson, Profesoro en la Universitato de Liverpool, Britujo), Pri Statistikaj Miskonkludoj (D-ro Olav Reiersøl, docento en la Universitato de Oslo, Norvegujo), La "Serumo" de Vereco (D-ro G. Canuto, Profesoro kaj Rektoro en la Universitato de Parma, Italujo), Juraj kaj Jurmedicinaj Problemoj pri Eŭtanazio (la sama), Evolu-fazoj de la Mondekonomio (Prof. L. Laurat, Parizo, Francujo), Esperanto kaj la Mondcivilizo (la sama), Ĉefprincipoj de la Nuntempa Internacia Juro (D-ro Ivo Lapenna, eksprofesoro en la Universitato de Zagreb, Jugoslavio), La Internacia Kortumo kaj ĝia Rolo en la Interŝtataj Rilatoj (la sama), La Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj (la sama), Fundamentaj Elementoj de Federacia Ŝtato (la sama) k.a.

3. *Arto kaj literaturo*.—La ĉefaj prelegoj de tiu ĉi branĉo estis: La Kimraj Artofestoj (Mag. R. Rossetti, docento en la Artkolegio en Birmingham, Britujo), La Artistoj de la Itala Renesanco (la sama), La Internaciaj Poeziaj Formoj (Prof. G. Waringhien, Parizo, Francujo), La Kalevala Kulturo (Mag. V. Setälä, verkisto en Helsinki, Finnlando), Du Svedaj Humoristoj kaj unu Hungaro (F. Szilágyi, verkisto, Svedujo), Tolstoj kaj Gandhi (D-ro E. Privat, Profesoro en la Universitato de Neuchâtel, Svislando), Giuseppe Verdi (D-ro Vincenzo Musella, Profesoro pri Filozofio en Romo, Italujo), Aŭgust Strindberg (Rektoro Karl Söderberg, Uppsala, Svedujo) k.a.

La tuta profesora kolegio de la ISU konsistis en Septembro 1953 el 27 profesoroj. La Rektoro, kiu estas elektata ĉiujare, estas por la jaro 1953/54 Prof.

D-ro H. Badaliĉ, membro de la Jugoslavia Akademio de Scienco kaj Arto (Zagreb). La konstanta sekretario de la ISU estas D-ro Ivo Lapenna, eksprofesoro pri Internacia publika juro en la Universitato de Zagreb, Jugoslavio, nun en Londono.

La prelegoj de la ISU estas vizitataj meze de 300 ĝis 1000 personoj. Ili okazas nur en la Internacia Lingvo, kiu estas komuna kaj por la prelegantoj kaj por la aŭskultantaro.

B. Belartaj konkursoj

La belartaj konkursoj de UEA havas la celon evoluigi la diversajn artobranĉojn en la Internacia Lingvo aŭ pere de ĝi. Ili okazas sub la aŭspicioj de UEA dum la universalaj kongresoj de Esperanto.

Laŭ la Regularo pri la Belartaj Konkursoj, ili enhavas jenajn branĉojn: (a) poezio originala, (b) poezio traduka, (c) prozo originala, (d) prozo traduka, (e) teatraĵo originala, (f) teatraĵo traduka. Krome, la Estraro de UEA povas decidi, ke la konkurso enhavu ankaŭ aliajn artajn branĉojn, ekzemple kantojn, humoraĵojn, desegnaĵojn, amatorajn filmojn aŭ fotografaĵojn, hejmajn artlaborojn, folklorajn dancojn kaj simile.

Nevalidaj por la konkurso estas verkoj, jam aperintaj en presa formo.

La prijuĝa komisiono konsistas el konstanta sekretario de la belartaj konkursoj, el 4 pliaj membroj kaj el 2 anstataŭantoj, elektitaj inter konataj specialistoj. La prijuĝa komisiono decidas pri la tri unuaj premiindaj verkoj en ĉiu el la konkursaj branĉoj. La membroj de la komisiono devas aparteni al minimume 5 diversaj nacioj. Tiamaniere ĝi havas forte akcentitan internacian karakteron.

En speciala kunveno de la kongreso la aŭtoroj de la

premiitaj verkoj legas aŭ legigas ilin. La premiitaj teatraĵetoj estas publike ludataj. En la solena ferma kunsido de la kongreso oni disdonas al la premiitoj arte ellaboritajn diplomojn kaj diversajn premiojn, kiujn donas aŭ UEA, aŭ aliaj Esperantaj aŭ neesperantaj organizaĵoj, aŭ privatuloj.

La unua belarta konkurso laŭ tiu ĉi nova principaro okazis en Parizo dum la 35-a Universala Kongreso de Esperanto en 1950. La dua belarta konkurso okazis dum la Universala Kongreso en Munkeno en la jaro 1951, la tria en Oslo en Aŭgusto 1952, la kvara en Zagreb en Julio-Aŭgusto 1953.

La partopreno en la konkursoj estas granda. Ekzemple, en la jaro 1952 ĝin partoprenis 43 poetoj kaj aliaj aŭtoroj de 18 landoj per 109 konkursaĵoj. En la jaro 1953 la konkurson partoprenis 53 verkistoj kaj poetoj el 16 landoj per 96 konkursaĵoj: 33 originalaj poemoj, 23 originalaj prozaĵoj, 7 originalaj teatraĵoj kaj 33 tradukitaj poemoj.

La konstanta sekretario de la belartaj konkursoj estis ĝis Aprilo 1953 Mag. Reto Rossetti, docento en la Arta Kolegio en Birmingham, Britujo. Nun havas tiun funkcion F. Szilágyi (Svedujo).

La Belartaj konkursoj de UEA havas pluroblan signifon. Ili kontribuas al evoluigo kaj riĉigo de la literaturo en Esperanto. Ili helpas al diskonigo de poeziaj kaj ĝenerale de literaturaj valoroj, precipe de malgrandaj nacioj, al larĝa publiko. Ili pliproksimigas la poetojn kaj verkistojn. Pro ĉio ĉi ili kontribuas al pli bona internacia kompreniĝo.

C. Oratoraj konkursoj

Kun la celo evoluigi la oratoran arton en la Internacia Lingvo kaj fortikigi la senton de internacia solidareco, UEA organizas ĉiujare oratorajn konkursojn por gejunuloj ĝis 28-jaraj.

En la oratora konkurso de UEA rajtas partopreni ĉiu junulo kaj ĉiu junulino, kiu ĉeestas la koncernan universalan kongreson de Esperanto. La oratora konkurso, kompreneble, okazas en la Internacia Lingvo. La kandidatoj ne rajtas transpasi la fiksitan limtempon. Ili devas paroli pri la temo libere, sen antaŭe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notetojn.

La konkurso okazas publike. Por ĉiu oratora konkurso la Estraro de UEA nomas internacian komisionon, konsistantan el prezidanto, du membroj kaj du anstataŭantoj. La komisiono decidas pri la temo aŭ la temoj de la konkurso, fiksas la limtempon de la paroladetoj, akceptas la aliĝojn kaj decidas pri la gajnintoj. La komisiono decidas per plimulto de voĉoj konsiderante ĉiujn elementojn de bona parolado: (a) la enhavon, (b) la lingvan korektecon, (c) la stilon kaj formon, (d) la oratoran teknikon.

La nomoj de la gajnintoj estas solene proklamataj dum la ferma kunsido de la kongreso. Ĉiu gajninto ricevas diplomon de UEA, diversajn premiojn de Esperantaj aŭ neesperantaj organizaĵoj aŭ de privataj personoj.

La unua oratora konkurso okazis en la jaro 1949 en Bournemouth (Britujo) dum la 34-a Universala Kongreso de Esperanto. Post tio okazis ĉiujare la oratoraj konkursoj: en Parizo (1950), en Munkeno (1951), en Oslo (1952), en Zagreb (1953).

La temoj de la konkursoj ĉiam rilatas al internacia frateco, monda paco, idea signifo de Esperanto kaj similaj. Ili respondas al la fundamenta celo de UEA: evoluigi kaj fortikigi la sentojn de internacia solidareco.

La interesiĝo pri la oratoraj konkursoj estas relative granda. Ilin aktive partoprenas gejunuloj de diversaj nacioj, dum la publiko konsistas kutime el proksimume 500–700 personoj.

PRAKTIKAJ SERVOJ DE UEA

LA ĉefa celo, por kiu estis origine fondita Universala Esperanto-Asocio (la 28-an de Aprilo 1908), estis krei praktikajn servojn en la kadroj de la Esperanto-Movado. En la Statuto de la jaro 1908 estis fiksita la celo de la Asocio:

Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo;

Kreskigi inter la membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj;

Krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia gento aŭ lingva teritorio.

Tiu ĉi teksto restis ĝis la hodiaŭa tago en la Statuto de UEA, sed ĝi estis kompletigita en la jaro 1947.

Kiamaniere, do, UEA realigis kaj realigas tiun gravan parton de sia aktiveco?

A. Delegita reto

Estas jam menciite, ke en la jaro 1906, dum la 2-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Ĝenevo, estis farita propono, ke en multaj urboj oni nomu inter la esperantistoj “konsulojn”, al kiuj oni povus sukcese sin turni kaj de kiuj oni povus ricevi diversajn informojn. Poste, kiam fondiĝis UEA, oni akceptis la ideon, sed oni ne akceptis la nomon “konsulo”, ĉar ĝi estus konfuziga kaj neoportuna pro la sama nomo, kiun havas la ŝtataj konsuloj. Anstataŭ tiu netaŭga nomo, estis elektita alia, nome “delegito” de UEA. Tiu nomo restas ĝis la hodiaŭa tago.

Delegito estas persono, kiu parolas Esperanton, kiu estas individua membro-abonanto de UEA (sekve ricevas la Jarlibron kaj la oficialan organon) kaj kiu deklaras sin preta plenumi senpage diversajn servojn, fiksitajn en la Statuto kaj Regularoj de UEA. La delegitoj estas elektataj aŭ nomataj ĉiun trian jaron. En la landoj, kies asocioj estas membroj de UEA, la koncerna landa asocio nomas aŭ nomigas la delegitojn interkonsente kun la ĉefdelegito de UEA. En la aliaj landoj la delegitoj estas nomataj de la ĉefdelegito aŭ de la ĝenerala sekretario, se en la koncerna loko loĝas malpli ol 10 individuaj membroj de UEA. En pli grava loko la individuaj membroj mem elektas la delegiton por tiu loko konforme al la reguloj en la Ĝenerala Regularo de UEA.

En unu loko estas nomata ĉiam nur unu delegito kaj, laŭ neceso, pluraj vicdelegitoj kaj fakdelegitoj. La vicdelegito helpas la delegiton kaj anstataŭas lin. La fakdelegito estas specialisto pri sia fako, ekzemple pri juro, medicino, astronomio, komerco k.t.p. Ĉiuj delegitoj kaj fakdelegitoj de iu lando estas administrataj de la ĉefdelegito kaj, se necese, de la vicĉefdelegito. En lando, kies asocio aliĝis al UEA, la ĉefdelegito kaj lia anstataŭanto estas nomataj de la landa asocio interkonsente kun la prezidanto de UEA. En la aliaj landoj la prezidanto de UEA nomas ilin.

Ĉiu membro de la Asocio rajtas uzi la servojn de la delegitoj. La servoj mem estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la efektivajn elspezojn de la delegito. Oni rajtas peti informojn pri plej diversaj aferoj, ekzemple pri komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajroj, turismo, instruado, studentaj problemoj, diversaj sciencaj demandoj k.a. Pri ĉiuj fakaj demandoj la membroj, kompreneble, turnas sin al la koncerna fakdelegito, se tia ekzistas. Se ne, oni povas sin turni ankaŭ al la loka delegito, kiu havigos la korektan respondon de iu fakulo.

Oni ne rajtas peti informojn pri la komerca pago-kapablo, nek pri la morala indeco de la persono. Cetere, la delegito aŭ fakdelegito rajtas rifuzi servojn, kiujn li juĝas kontraŭaj al sia honoro aŭ konscienco.

Principe la servoj estas farataj nur al la membroj aŭ pere de la membroj, sed neniuj malhelpas la delegiton fari servojn ankaŭ al aliaj personoj, tute egale ĉu ili parolas Esperanton aŭ ne. Tamen, en ĉiu okazo la peto devas esti farita en la Internacia Lingvo, kiu estas la sola oficiala lingvo de UEA.

Por ke la delegito sciu ke iu persono, kiu petas lin pri servo, estas membro de UEA, ĉiu membro ricevas plurajn tiel nomatajn membromarkojn. La petanto surgluas tiun marketon sur la leteron kaj tiamaniere atestas sian membrecon.

La nomoj de ĉiuj ĉefdelegitoj, delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj aperas ĉiujare en la oficiala Jarlibro de UEA. Ili estas ordigitaj laŭ la aboca ordo de la landoj kaj, en la kadro de ĉiu lando, de la lokoj. Krome, aparta listo de fakoj indikas en kiu loko troviĝas fakdelegito por la koncerna fakoj. Tiamaniere, la adreso de kiu ajn delegito aŭ fakdelegito estas facile trovebla.

En la jaro 1952 UEA havis en 61 landoj 1025 delegitojn, 182 vicdelegitojn kaj 811 fakdelegitojn, do, entute 2018 diversajn delegitojn.

La delegitoj de UEA plenumas ĉiujare centojn ĉe milojn da plej diversaj servoj. Ili helpas multege al la vojaĝantaj esperantistoj, donante al ili konsilojn koncerne la restadon, vizitadon de la urbo, konatiĝon kun la lokaj kulturaj institucioj kaj aliaj vidindaĵoj. Ili donas informojn pri laborkondiĉoj, studkondiĉoj, vivkutimoj. Ili havigas sciigojn pri juraj demandoj, pri novaj akiraĵoj de la scienco kaj simile. Doktoraj disertacioj kaj sciencaj verkoj estis ellaboritaj ne malofte dank' al la havigo de konvena materialo fare

de la fakaj delegitoj. Personoj perditaj estis retrovitaj pere de la delegitoj de UEA. Malfacile havigeblaj medikamentoj estis havigitaj el aliaj landoj denove pere de la delegitoj de UEA. Malfacilaj procesoj estis kontentige solvitaj dank' al la helpo de fakaj delegitoj de UEA. Nepriskribebbla estas la varieco de la servoj farataj per la potenca delegita reto de Universala Esperanto-Asocio. Tiuj noblaj, servopretaj homoj ĉiutage solvas problemojn por personoj, kiujn ili eĉ ne konas, kaj donas ne nur multege da ĝojo, sed ofte eĉ savas homajn vivojn. La delegita reto de UEA estas vere unika institucio en la mondo. Neniu alia organizaĵo, nacia aŭ internacia, registara aŭ neregistara, plenumas tiel akurate, tiel rapide, tiel sindoneme tiom da plej diversaj praktikaj servoj.

Komence UEA kontrolis la funkciadon de la delegita reto. En la Centra Oficejo estis gvidata ampleksa sliparo, en kiu estis enregistrita ĉiu unuopa servo. Tiu ĉi laboro estis farata ĝis la jaro 1939 kaj ĝi montras, ke ĉiujare la delegitoj de UEA plenumis de 12,000 ĝis 15,000 diversaj servoj, pruvitaj per dokumentoj. La ĉiam pli granda amplekso de la servoj kaj la fakto, ke post kelkaj jaroj la maŝino rutine funkciis, igis la gvidan instancon de UEA nuligi la pluan statistikadon. Ek de 1952 la Centra oficejo de UEA denove komencis fari statistikon pri la servoj.

B. Koresponda Servo kaj Gazetara Servo

Ekster la kadroj de la delegita reto, kiu havas apartajn taskojn, UEA formis du pliajn servojn por faciligi la internaciajn rilatojn inter la personoj, kiuj uzas la Internacian Lingvon.

La Koresponda Servo havas la taskon kontaktigi personojn de diversaj nacioj, kiuj deziras korespondi pri difinitaj temoj, kutime fakaj. Miloj da personoj tra la tuta mondo ĉiutage interŝanĝas leterojn, pli-

proksimiĝas unu al la alia, amikiĝas kaj tiamaniere fortikigas la internacian solidarecon. La tuta gazetaro de UEA kaj de la organizaĵoj aliĝintaj al UEA enhavas regule rubrikon "Korespondado", en kiu troviĝas adresoj de personoj, kiuj deziras internacie korespondi.

La Internacia Gazetara Servo estas praktika klopodo utili kaj al la ĝenerala publiko kaj al la Esperanto-Movado. La peranto de la Internacia Gazetaro-Servo kolektas informojn rilatajn al Esperanto, sed kun ĝenerala intereso, kaj pere de la Centra Oficejo de UEA distribuas ilin inter diverslandaj komisiitoj, kies tasko estas traduki la tekstojn en la naciajn lingvojn kaj dissendi ilin al la redaktoroj de la landaj gazetoj. En tiu grava laboro partoprenas la informaj servoj de la landaj Esperanto-Asocioj kaj unuopaj profesiaj ĵurnalistoj. Laŭ la statistiko ellaborita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, en la laborjaro 1950/51 estis entute publikigitaj 9289 artikoloj kaj informoj en la gazetoj kaj revuoj de la mondo. En la jaro 1952 ilia nombro estis 7,307.

C. Helpo de UEA dum la militoj

Kiam eksplodis la unua mondmilito en 1914, miloj da homoj troviĝis en fremdaj landoj ĉu por ferii, ĉu por studi, ĉu kiel laboristoj, oficistoj, entreprenistoj. De unu tago al alia, tiuj ĉi "gastoj" fariĝis subite "malamikoj".

Tiu ĉi stato igis Universalan Esperanto-Asociion krei novan servon, kiu post kelka tempo fariĝis treege ampleksa. La iniciato venis de la tiama delegito de UEA en Nürnberg, D-ro Orthal, kiu skribis al la Centra Oficejo en Genevo petante informojn pri personoj troviĝantaj tiam en la "malamikaj" landoj kaj ne plu donantaj vivosignojn. Inspirita de tiu ĉi servopeto, la fondinto kaj tiama Direktoro de UEA, Hektor

Hodler, venis al la ideo ĝeneraligi la servadon de UEA al pli vasta publiko.

Tuj estis preparita cirkulero, kiu estis sendita al ĉiuj delegitoj de UEA tra la tuta mondo. La delegitoj tradukis la tekston kaj ĝi aperis en centoj da gazetoj en plej diversaj naciaj lingvoj. Ni donas la kompletan tekston de tiu grava informo:

“Ĉar la militagoj okazis preskaŭ subite, multaj personoj troviĝis surprizitaj en la malamikaj landoj kaj ne plu havas la eblon korespondi kun siaj parencoj kaj amikoj. Por laŭeble helpi ilin, la Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, sidanta en Ĝenevo, ĵus informis siajn delegitojn en la militantaj landoj, ke ĝi volonte servos kiel perilo por la interŝanĝado de privataj korespondaĵoj inter la malamikaj landoj. La leteroj estas ricevataj ĉe la Ĝeneva Oficejo, de kie ili estas transdonataj al la adresato, se bezone post traduko. Estas akceptataj nur la nefermitaj korespondaĵoj havantaj absolute nenian politikan aŭ militistan karakteron. La personoj, kiuj deziras uzi tiun ĉi servon, nun en plena funkciado, estas petataj sendi ĉiujn leterojn kun 2 internaciaj respondkuponoj al Universala Esperanto-Asocio, 10, Rue de la Bourse, Genève.”

Tiu ĉi mallonga teksto aperis en la taga gazetaro de preskaŭ ĉiuj landoj en la mondo. La rezulto estis preskaŭ timiga. En la komenco venis 10–15 petoj tage. Poste tiu nombro kreskis al kvindeko, al centoj da petoj, ĝis ĝi fine estis meze 400 informpetoj en la tago. Oni devas rimarkigi ĉi tie, ke la Internacia Ruĝa Kruco okupis sin nur pri la soldatoj, poste ankaŭ pri la ekzilitoj, sed lasis la civilulojn al UEA.

Necesis sin adapti al la nova situacio. La tiama teknika gvidanto de la servaro organizis la laboron kaj alvenis deko da libervolaj helpantoj. La tuta materialo estis dividita en 8 fakoj: (1) simpla perado de korespondaĵoj, (2) serĉado de personoj, (3) sendado de objektoj, (4) civilkaptitoj en koncentrejoj, (5) rehejmigo de junuloj kaj infanoj, (6) militkaptitoj kaj rilatoj kun la koncernaj armeaj estraroj, (7) rilatoj kun la Ruĝa Kruco, (8) diversajoj.

La plej ampleksa estis la fako “perado de korespondaĵoj”. Estis necese starigi grandajn sliparojn kun la nomoj de la sendintoj kaj de la adresatoj, kun ĉiuj necesaj indikoj, por ke ĉio funkciu bone kaj por ke oni povu ĉiam doni la necesajn informojn. Oni serĉadis kaj trovadis ĉiam novajn vojojn por ĉiurilate helpi al la petintoj. Nur kiel ekzemplo estu citita la kazo de la ĉefdelegito de UEA en Moskvo. Kiam la Rusa armeo okupis Galicion, estis tranĉitaj la rilatoj inter la okupita parto kaj la neokupita. Tuj alvenis al Ĝenevo miloj da korespondaĵoj por ke ili estu transsenditaj al la personoj en la okupita parto de Galicio. Por certigiti, la Centro en Ĝenevo ĉiutage sendis la korespondaĵojn en unu pakajo al la ĉefdelegito de UEA en Moskvo. Ĉar la adreso de la ricevonto estis skribita sur la letero mem, la ĉefdelegito en Moskvo enkvertigis ĉiun unuopan leteron, skribis la adreson kaj sendis ĝin al la adresito aŭ pere de la Rusa armea poŝto, aŭ pere de la kutima vojo, laŭ la momenta situacio. Sammaniere oni sendadis leterojn el la okupita parto de Galicio al la neokupita.

Same kiel la ĉefdelegito en Moskvo, ankaŭ aliaj delegitoj de UEA faris grandegajn servojn, kiuj postulis sindonemon kaj multan tempon. Precipe menciindaj estas la delegitoj de UEA en Bordeaux, en Dresdeno, en Rennes, en Berlino.

Pere de tiu servo de UEA miloj da personoj povis korespondi kun siaj parencoj, aliaj miloj retrovis siajn proksimulojn, aliaj miloj estis helpataj per nutraĵoj, vestaĵoj, medikamentoj. . . .

La nombro de servoj tiamaniere plenumitaj de UEA estis pli ol 100,000 en unu jaro. Tiu tuta grandega laboro povis esti kontentige solvita dank’ al la perfekta funkciado de la delegita reto de UEA eĉ dum la militaj tagoj, dank’ al la spirito de humaneco, kiu inspiras la Asocion, dank’ al sinoferemo de centoj da

delegitoj kaj aliaj libervolaj helpantoj, kiuj plenumis tiun tutan laboron absolute senpage, pro pura idealismo kaj amo al la Homo.

Dum la dua mondmilito UEA starigis similan servon, sed en multe malpli granda skalo. La malpermeso de Esperanto kaj de la Esperanto-organizaĵoj en Germanujo kaj en la landoj sub la nazia jugo senigis la Asocion de kunlaborantoj ĝuste en landoj, kie koncentriĝis plej multe da mizero kaj samtempe da espero je helpo.

Jam en la jaro 1936 estis kreita servo sub la nomo *Esperantista Interhelpo*. Ĝia celo estis helpi al la viktimoj de la nazia teroro, precipe al la Judaj Esperantistoj el Germanujo, Ĉeĥoslovakujo, Aŭstrujo, Pollando kaj aliaj landoj, kiuj iom post iom estis okupitaj de la naziaj trupoj. Tiu servo helpis, ke multaj viktimoj, devigitaj forlasi sian hejmon, estis akceptitaj en liberaj landoj.

Dum la milito mem la Esperantista Interhelpo peradis sendon ne nur de korespondaĵoj, sed ankaŭ de nutraĵoj al internigitaj personoj. Tio okazis laŭ sistemo aprobita de la Svisa registaro. Ĝi ankaŭ ebligis transsendon de mono el Usono al viktimoj de la reĝimo en Rumanujo. Atentindan helpon donis tiu ĉi servo al la internigitaj en Francujo: unue al la ekzilitoj el Hispanujo kaj poste al la forpelitaj Judoj el Germanujo kaj Pollando.

La poŝta kontrolo fare de la nazi-reĝimo, la fakta izoligo de Svislando kaj la kvalifiko de UEA kiel kontraŭnazia organizaĵo haltigis tiun servon en la jaro 1942. Post tiam UEA povis havigi al la internigitaj militkaptitoj en diversaj landoj nur materialon por studi, iom da nutraĵo kaj cigaredojn. Estas menciinde, ke la Esperantista Interhelpo havigis seninterrompe al la membroj de la familio Zamenhof vivbezonaĵojn. Unu post la alia ili estis brute mortigitaj de la nazioj,

tiel ke el tiu granda familio nun estas vivantaj nur ankoraŭ kelkaj membroj en Pollando aŭ en la landoj de Okcidenta Eŭropo.

La tuta tre ampleksa dokumentaro pri tiu ĉi humanca aktiveco de UEA dum la du grandaj mondmilitoj estas konservita en la arĥivejo de la Asocio en Ĝenevo.

D. Atingoj de UEA ĉe la Ligo de Nacioj, UNO kaj UNESKO

En pluraj okazoj Universala Esperanto-Asocio proponis siajn servojn kaj helpon por solvi la lingvan ĥaoson al gravaj internaciaj organizaĵoj.

La plej granda klopodo estis farita sub la gvido de Prof. Edmond Privat, tiama Prezidanto de UEA, ĉe la *Ligo de Nacioj*. Unue en la jaro 1920 kelkaj delegitoj proponis rekomendan rezolucion por Esperanto kaj petis, ke la Sekretariaro de la Ligo preparu raporton. En la jaro 1921 estis renovigita la propono. Dume, la anstataŭanto de la Ĝenerala Sekretario de la Ligo, D-ro Nitobe, vizitis la 13-an Universalan Kongreson de Esperanto en Praha (1921) kaj favore raportis al la Ligo pri siaj spertoj. Aliflanke okazis en Ĝenevo en la jaro 1922 Internacia Konferenco pri Esperanto en lernejoj. Tiu konferenco, kunvokita de la Pedagogia Instituto J. J. Rousseau en Ĝenevo kaj partoprenita de centoj da instruistoj el 28 landoj kaj 16 reprezentantoj de registaroj, liveris riĉan materialon al la Sekretariaro de la Ligo. Surbaze de tiuj materialoj la Sekretariaro de la Ligo prezentis sian raporton al la 3-a kunveno de la Asembleo de la Ligo en Septembro 1922. La raporto estis akceptita, sed la demando pri enkonduko de Esperanto en lernejojn estis transdonita al la Komisiono por Intelekta Kooperado. La rezolucio, kiun tiu Komisiono faris en Aŭgusto 1923, estis io tute alia ol oni estus povinta atendi. La Komisiono,

fakte, tute ne solvis la taskon, kiu estis al ĝi donita. Tiu rezolucio ne estis akceptita de la Asembleo kaj tiamaniere la afero restis tia, kia ĝi estis ĝis tiam. La sola rezulto estis, ke Esperanto, kiel menciite aliloke, estis oficiale akceptita kiel klara lingvo en la telegrafado.

Alia grava klopodo estis farita post la dua mondmilito. En multaj lingvoj estis presita mallonga deklaro, en kiu la subskribanto deklaras, ke li opinias la demandon de Internacia Lingvo grava kaj ke ĝi meritas atentan konsideron fare de Unuiĝintaj Nacioj. La Deklaracio tekstas:

“Mi opinias, ke la solvo de la problemo de la Internacia Lingvo havas grandan praktikan gravecon kaj ke la Unuiĝintaj Nacioj devus preni ĝin en seriozan konsideron.

Mi opinias, ke monda helpa lingvo, kiu ne forigos la lingvojn naciajn, sed servos kiel helpa lingvo, estas necesa por faciligi la rilatojn inter la popoloj de la tuta mondo kaj por rapidigi la socian progreson.

Pro la bona akcepto de Esperanto—la sola helpa lingvo, kiu havis rimarkindan sukceson—en ĉiuj partoj de la mondo, mi esperas, ke la Unuiĝintaj Nacioj helpos, per ĉiuj disponeblaj rimedoj, la disvastigon de la uzo de tiu ĉi lingvo, ekzemple kuraĝigante ĝian instruadon en la lernejoj, kiuj disponas pri kompetentaj instruistoj, kaj evoluigante ĝian uzon en la turismo, internacia komerco kaj korespondado.”

En la tuta mondo estis kolektataj subskriboj de gravaj organizaĵoj kaj unuopaj personoj. La Deklaracion subskribis 492 organizaĵoj kun entute 15,454,780 membroj kaj 895,432 unuopaj personoj. La subskriboj estas kolektitaj en 76 landoj.

Inter la individuaj subskribintoj troviĝas la antaŭa Prezidanto de la Franca Respubliko Vincent Auriol, la Ministro-Prezidanto de Nederlando Willem Drees, la Kanceliero de Aŭstrujo Leopold Figl, la Ministroj-Prezidantoj de Pollando Josef Cyrankiewicz kaj de Ĉeĥoslovakujo Antonin Zapotocky. Plue ĝin subskribis 405 membroj de parlamentoj de diversaj

landoj, 1607 lingvistoj, 5,262 universitataj profesoroj kaj aliaj sciencistoj, 40,000 instruistoj de mezgradaj kaj elementaj lernejoj, 1,228 edukaj fakuloj, 1,519 ĵurnalistoj, 5,113 kuracistoj, 211,734 juristoj, inĝenieroj, farmaciistoj kaj konstruistoj, 284,512 komercistoj, pli ol 200,000 diversaj metiistoj, pluraj dekmiloj da diversfakaj laboristoj.

Inter la organizaĵoj, kiuj subskribis la Deklaracion, troviĝas ankaŭ la Laborunio de Okcidenta Germanujo, la Ĉeĥoslovaka gimnastika asocio "*Sokol*", la Aŭstra Popola Partio, la Federacio de Fervojaj Laboristoj de Japanujo, la Norvega Federacio de Laboro, la Japana Unio de PTT-Laboristoj, la Japana Unio de Ministoj k.a. En Norvegujo subskribis la Deklaracion entute 53 organizaĵoj, en Brazilo 16 organizaĵoj, en Japanujo 140 organizaĵoj k.t.p.

Tiuj ĉi ciferoj montras ne nur la interesigon de la larĝaj popoltavoloj pri la demando de komuna lingvo, sed ankaŭ la grandan forton de Universala Esperanto-Asocio. Pere de siaj organizaĵoj kaj aliaj membroj, pere de la delegita reto ĝi povis en tre mallonga tempo fari tiun gravan laboron.

